

K. KALOCSAY

LINGVO STILO FORMO

STUDOJ

**POLSKI KLUB ESPERANCKI
W KRAKOWIE
ul. Smoleńsk L: 9,**



**ELDONIS
LITERATURA MONDO, BUDAPEST**

602

K. KALOCSAY

LINGVO STILO FORMO

STUDOJ

Prof. MIECZ. SYGNARSKI

Ex Libris

L. 263

ELDONIS

LITERATURA MONDO, BUDAPEST

Isper. 294 I



PESTVIDÉKI NYOMDA

VÁCON

1931.

POLSKI KLUB ESPERANCKI
W KRAKOWIE
ul. Smoleńsk L: 9.

Kelkajn vortojn pri la gvidaj principoj de la sekvaj artikoloj.

La *Esperanta Vortfarado* delonge estas mia »amata ĉevaleto«. Ĝi jam aperis plurfoje, ĉiam tralaborita, mi esperas, ke nun fine ĝi ricevis sian definitivan formon. Cetere en ĝi troviĝas nenia novismo, aŭ reformo, ĝi estas sole la interpreto de la lingvouzo. Ankaŭ la ĉefaj principoj ne estas novaj, ili ja estas troveblaj ĉe *de Saussure* kaj *Wüster*. Nova estas sole la malkovro de la *vort-reef-iko*, per kies apliko, laŭ mia opinio, oni povas klarigi la *esencon* de la vortfarado en Esp-o, kaj prui la plenan unuecon de la vortderivo kaj vortkunmeto.

En la *Evoluo de la poezia lingvo* troviĝas kelkaj lokoj, kiuj, siatempe, kiam amiko K. R. C. Sturmer ĝin legis anstataŭ mi en la Somera Universitato de la Oxforda Kongreso, indignigis, kiel mi aŭdis, kelkajn eminentajn aŭskultantojn, per sia troa »revoluciemo«. Nu, se vi atente tralegos ĝin, vi trovos en ĝi nenian »revolucian« iniciaton. Ĝi simple konstatas, kian direkton prenis la lingva evoluo ĉe la poetoj, precipe ĉe Grabowski, kaj el ĉi tio ĝi konkludas kelkajn estontaĵojn. Ĝi estas do simple registra, kaj neniu lingvo povas malhavi tiajn registrajn laborojn. Ĉar ja, ni devas ne fermi strute la okulojn antaŭ la akiraĵoj troveblaj en la verkoj de niaj

plej bonaj poetoj, eĉ oni devas diligente studi kaj utiligi ilin. Nur tiel povas la lingvo progresi, kaj ne tiamaniere, ke ĉiu poeto »memstarigas« sin de ĉiuj antaŭuloj, kaj mem inventas ĉion dekomence, kvazaŭ li skribus la unuan esp-an poemon.

La *Sendemandaj Respondoj* pritraktas kelkajn plimalpli »pendantajn« demandojn. En ili mi klopodis trovi la oran mezvojon inter logikeco kaj lingva tradicio.

La *Esperanta Rimo* kaj *Ritmaj Principoj* volas legitimi kelkajn licencojn, nepre necesajn, sed ĝis nun uzitajn nur kvazaŭ kulpkonscie.

Rilate la *Elparolon*, mi akcentas, ke mi tute ne volas esti leĝdonanto, nur fiksi la elparolmanieron de la *plimulto*. Ke ĉi tiu, *libere evoluinta* prononcado ne estas tiel *unuregula*, kia oni ĝin dezirus teorie, tio ne estas mia kulpo, sed la kulpo de la libera lingvouzo. Kaj ĉi lastan oni vane volus perforte ŝanĝi, pli bone do, ĝin simple registri, por almenaŭ akceli ĝian unuecon.

Budapest. Julio. 1931.

K. Kalocsay.

Esperanta vortfarado

La teorion de la Esperanta vortfarado Zamenhof ne fiksas en reguloj, la vortfaradon li simple montris praktike en ekzemploj. En la Fundamento ni trovas ĉi rilate la solan frazon : »La gramatikaj finiĝoj (kaj sufiksoj) estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.«

Unuavide ĉi tio ŝajnas tro malmulta por esti la tuto de vortfaraj reguloj de lingvo. Kaj al ĉi tiu vortavareco estas atribueble, ke la Esperantan vortfaradon kun tia malmultekosta superemo oni povis deklari sciencia kaj sensistema. Kaj okazis ja provoj por fari tre sciencajn vortteoriojn ; tia estis ekzemple la vortteorio de *Couturat*, kiu la faman *renverseblecon* prenis gvida principo de la vortfarado. Ne estas mia celo nun okupiĝi pri ĉi tiu sistemo, aplikita en la Ido, scivoluloj sin turnu al la libro de *Saussure* : *La Vortteorio en Esperanto*. De tiam evidentiĝis, ke la *renversebleco* ĝuste en Ido mankas, ke la nepran logikecon ankaŭ ĉi tiu sistemo ne solvis, kaj krome, ĝi laboras per arbitraj derivreguloj, kaj per tio malproksimiĝas de la praktiko de l'naturaj lingvoj, kaj de la facila memkomprenebleco de la Esperanta vortfarado.

Post la Ido-skismo multa inko forfluis ankaŭ inter la espistoj pri la vortfarado. Tiel la skismo donis eĉ utilon tiusence, ke la espistoj komencis *esplori* la lingvon, kiun ĝis tiam ili sole *uzadis*. Kaj okazis same, kiel en la naturaj lingvoj : ne teorio kaj reguloj kreis lingvon, sed vivajn regulojn de viva lingvo *konstatis* aposteriorie la gramatikisto. Ĉi tiu gramatikisto estis *René de Saussure*. Eklumigante la esencon de la Esperanta vortfarado, lia vort-teorio klare montras la perfektan logikecon kaj naturecon

de la Esperanta vortderivo, kaj ĝian superecon al ĉiuj rigidaj kaj perfortaj sistemoj. Evidentiĝis, ke la supre cititaj Zamenhofaj vortoj estas tute sufiĉa voĵmontro en la vortfarado. »La gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj«, — ĉi tio signifas, ke ne ekzistas apartaj vortderivaj reguloj ; ĉiu radikoj, sufikso, finaĵo havas sian difinitan senco, kaj ili ligiĝas inter si simple kun ĉi tiu senco. *La vortderivo do estas simpla vortkunmeto.**

La vortteorion de *Saussure*, kompletigitan de *Eugen Wüster*, jene mi resumas mallonge :

1. La *vortradikoj* havas difinitan gramatikan karakteron. La radikoj estas aŭ substantiva (hom-, martel-), aŭ adjektiva (bon-, bel-), aŭ verba (skrib-, am-). Krome estas radikoj senkarakteraj : prepozicioj, konjunkcioj ktp. La karakteron de la radikoj montras la Fundamenta Vortaro. Grandan malfacilon ĉi tio ne

* *Karl Minor* en sia *Esperanto-Deutsches Handwörterbuch* rifuzas la ĝustecon de la de-*Saussure*-a vortteorio kaj akcentas tri gravajn diferencojn inter la memstaraj radikoj unuflanke, kaj sufiksoj kaj finaĵoj aliflanke.

a. la *memstara vorto* en Esperanto respondas al naciilingva memstara vorto, dum la signifo kaj efiko de *afikso* ne estas interpretebla per naciilingva vorto, oni devas ĝin klarigi per ekzemploj.

Ĉi tiu argumento, laŭ mia opinio, ne estas ĝusta. Mi pruvos, ke la afiksoj ligiĝas al la radikoj kun sia senco, kaj ilia vortefiko estas la sama, kiel tiu de la memstaraj radikoj. Nun mi diru solan ekzemplon. *Inda* estas precize la germana *würdig*, *aminda* estas precize la germana *liebenswürdig*.

b. ĉe kunmeto de radikoj la dua radikoj povas ligiĝi al la unua radikoj *nuda* (dormĉambro) kaj ankaŭ al la unua radikoj *finaĵa* (dormoĉambro).

Male, *sufikso* povas ligiĝi nur al la radikoj *nuda*. Nu, laŭ mia opinio, ĉi tiu diferenco estas kaŭzita

prezentas, ĉar la karaktero de la plej multaj radikoj doniĝas per si mem.

2. La gramatika karaktero de la *vortoj* dependas de la finaĵoj. (O : substantivo ; a : adjektivo ; i : verbo). La gramatika karaktero de la vorto povas esti identa kun tiu de la radikoj ; ĉi tiuj estas la sam-elementaj vortoj (martelo, bela, skribi). En ili la finaĵo, el la vidpunkto de la vortderivo, propre estas pleonasma. Sed la finaĵo povas esti ankaŭ alikarakteraj ol la radikoj ; ĉi tiuj estas la *plur-elementaj*, aŭ *malsam-elementaj* vortoj (marteli, belo, skriba). Ĉi tie la finaĵoj funkcias kiel sufiksoj.

3. La gramatikan karakteron de samelementa vorto ni ŝanĝas simple per la ŝango de la finaĵo.

La *o* estas substantiva finaĵo. El adjektivo, signifanta kvaliton, ĝi faras substantivon, kiu signifas kvaliton, aŭ abstraktaĵon : rapida-rapido ; sentema-sent-

unue per tio, ke la sufiksoj ĉiam povas ligiĝi al la radikoj nuda sen konsonant-karambolo ; tiel ili ja estas faritaj. *Mastrido* estas bone elparolebla, dum *mastrfilo* apenaŭ. Due, per tio, ke la sufiksojn oni renkontas ofte, oni do rekonas ilin tuj en la vortkunmetoj, dum ĉe la kunmeto de radikoj oni povas kelkfoje konfuziĝi, ne trovante la dividlokon de la literkomplekso. Ekzemple *korbato* povas ŝajni unuavide pasiva participo, do oni skribas kor-bato, aŭ koro-bato. *Disimila* ŝajnas unuavide enigma, oni do diras di-simila, aŭ dio-simila. Ĉi tiu diferenco do tute ne estas *esenca*, ĝi devenas simple el tio, ke Esperanto estas nenies gepatra lingvo, oni do klopodas skribi *pli klare*, por esti komprenebla al ĉiuj.

Ĉi tio estas la kaŭzo ankaŭ de la elparolaj diferencoj inter la duradikaj kaj la radiksufiksaj kunmetoj : *dramarto* kaj *dra-misto*. Mi estas certa, ke ĉi tiu *klariga* elparolo despli forviŝiĝas, ju pli spertaj esperantistoj parolas inter si, kaj tute malaperus, se ĉiu parolus la lingvon tiel perfekte, kiel sian gepatran lingvon.

Cetere, kelkfoje ĉi tiu *klariga* prononco ekzistas an-

emo ; bela-la belo. El verba radiko substantivon, kiu signifas agon : legi-lego ; ekzisti-ekzisto.

La *a* estas finaĵo adjektiva. El radikoj substantivaj aŭ verbaj ĝi faras adjektivon, kiu signifas kvaliton, aŭ rilaton : patro-patra ; homo-homa (homkvalita aŭ homapartena) ; **timi-tima**.

La verba *i*-finaĵo faras el radikoj substantivaj aŭ adjektivaj verbon, kiu signifas agon, aŭ staton. Martelo-marteli (agi per martelo), sana-sani (esti sana), rapida-rapidi (esti rapida, agi rapide).

3. Ŝanĝante la gramatikan karakteron de plur-elementaj vortoj, oni devas zorgi, ke la sufiksa efiko de la elfalanta finaĵo ne perdiĝu, oni do devas ĝin anstataŭi per sufikso, samsenca al la elfalanta finaĵo.

Se el substantivradika adjektivo (homa), ni volas pluformi substantivon, kiu signifas kvaliton, tion ni nepovas fari per la simpla ŝanĝo de finaĵo, ĉar tiel ni ja ricevas konkretan substantivon (homo). Oni devas

kaŭ ĉe derivitaj vortoj. Ekzemple : oni diras : *sent-ema* verkisto, por diferenciĝi de *sen-tema* verkisto.

Tute superflue estus do el ĉi tiu eŭfonia kaj komprenfaciliga procedo fari *regulon de vortkunmeto*, kaj pro ĝi ekstermi el la lingvo la tute enradikiĝintan *postulo* nur, ĉar ĝi ne sekvas ĉi tiun regulon.

c. ĉe duradikaj kunmetoj staras ĉiam la ĉefa vorto en la fino. Male, ĉe radik-sufiksaj kunmetoj staras ĉiam la sufikso en la fino, eĉ se ĝi ne estas la ĉefa vorto.

Ĉi tiu regulo rilatas nur la t. n. *diafanajn sufiksojn* (vidu poste). Krome ĝi eĉ ne estas ĝusta.

Ekzistas en la lingvo *duradikaj* kunmetoj, en kiuj *ne la ĉefa vorto* staras en la fino (vidu : *Klarigo de inversa vortefiko*).

Ekzistas ankaŭ *sufiks-radikaj* kunmetoj, ĉe kiuj la *sufikso* staras antaŭe. Ekzemple : uj-fundo ; in-sekso ; ej-purigo ; an-kolekto ; estro-efekto ; il-riparo ; ing-tenilo ; em-ŝanĝo ; id-nasko ktp.

iel signi, ke la efiko de la kvalitsenca a-finaĵo restas konservita. Pro belsoneco ni ne povas amasigi finaĵojn, ni ne diras do *homao*. Sed, ĉar *ao* signifas *kvalito*, anstataŭ ĝi ni povas uzi la sufikson *eco*, kiu havas la saman sencon. La vorto do estos *homeco*.

Se nun el la vorto *homeco* ni volas pluformi adjektivon, ni ŝanĝas la o-finaĵon je a-finaĵo, kaj tiel rezultas *homeca*. Sed ĉar *eca* signifas *kvalita*, kaj ankaŭ la simpla a-finaĵo povas havi ĉi tiun sencon, la radikoj *ec* estas superflua, kaj tiel ni ricevas la vorton *homa*. Tiel do ni havas la serion :

Homo-homa - (homao) -homeco- (homao) -homa-homo.

Se el substantivradika verbo (*marteli*) ni volas pluformi substantivon, kiu signifas agon, la finaĵ-ŝanĝo ne estas sufiĉa, ĉar per ĝi ni ricevas konkretan substantivon (*martelo*). Ni devas konservi en la vorto la verban elementon. Anstataŭ *i-o*, ni uzas la sufikson de la ago (*ado*). La vorto do estas *martelado*. Se el ĉi tio ni volas fari verbon, ni ŝanĝas la finaĵon kaj rezultas *marteladi*. Sed *adi* havas la saman sencon, kiel *i*, ni povas ĝin ellasi, kaj tiel ni revenas al *marteli*. La serio estas do :

Martelo-marteli -(martelio) -martelado -(martelio) marteli-martelo.

La du supraj serioj montras, ke la Esperanta vortderivo konsistas simple el la almeto de la elementoj necesaj al la dezirata senco. Kaj specialaj elementoj (sufiksoj) estas necesaj nur, se la sencon ni ne povas doni per finaĵo. Siavice, per la forigo de la almetitaj elementoj ni revenas al la originala radiko. La renversebleco do estas perfekta.

La Esperanta vortfarado do konsistas el la simpla kunmeto de vortelementoj ; la senco de la opaj elementoj en ĉi tiu kunmeto restas sensanĝa. Kaj, ĉar ĉiu tia elemento estas memstara vorto, estas evidente ke

anstataŭ la reguloj de la Esperanta *vortderivo* ni devas serĉi la regulojn de la Esperanta *vortkunmeto*. Ĉi lastaj devas validi ankaŭ rilate al sufiksoj kaj finaĵoj.

En la *sekvaj* linioj mi intencas konstati la regulojn de la *vortkunmeto*. Mi ne volas starigi ian arbitran sistemon, nur la ekzistantan lingvo-uzon mi konigas per la lumigo de la spontana vortlogiko.

ĜENERALAJ REGULOJ

1. En vortkunmeto la ĉefa vorto staras en la fino.* Ĝi difinas la gramatikan karakteron kaj la sencon de la respektiva kunmetita vorto. Ni nomu ĝin *ĉefelemento*. La antaŭaj elementoj rilatas al ĝi, klarigas, nuancigas ĝin, tiujn ĉi ni nomu *flankelementoj*. Ekzemple: en la vorto *dormoĉambro* la karakteron kaj sencon de la vorto difinas la ĉefelemento *ĉambro*, la flank-elemento *dormo* servas nur por klarigo.

2. La gramatika karaktero de la ĉefelemento difinas ne nur la gramatikan karakteron de la kunmetita vorto, sed ankaŭ tiun de la flank-elemento.

a. Se la ĉefelemento estas *substantivo*, ankaŭ la flankelemento estas, aŭ fariĝas vortlogike *substantivo*.

b. Se la ĉefelemento estas *adjektivo*, la flank-elemento estas, aŭ fariĝas vortlogike *substantivo*.

c. Se la ĉefelemento estas *verbo*, la flank-elemento estas aŭ *adverbo*, aŭ *predikata atributo*.

DETALAJ REGULOJ

SUBSTANTIVA ĈEFELEMENTO

Se la ĉefelemento estas *substantivo*, ankaŭ la flankelemento estas *substantivo* (ĝenerala regulo 2. a.).

* Pri escepto vidu: Klarigo de inversa vortefiko.

Se *radike* ĝi ne estas substantivo, en la kunmeto ĝi ricevas substantivan *vortkarakteron*. Ekzemple : hom-koro : homo-koro ; varmenergio : varmoenergio ; skribmaŝino : skribo-maŝino.

La analizo de tiaj vortkunmetoj povas okazi trimaniere.

1. La flankelemento povas esprimi rilaton aŭ posedon. Oni analizas per la prepozicio *de*. (Hom-koro : koro de homo, lumradio : radio de lumo ; varmenergio : energio de varmo ; skribmaŝino : maŝino de skribo).

2. La flankelemento povas esprimi la *materialon* de la ĉefelemento. Oni analizas per la prepozicio *el*. (Orhorloĝo : horloĝo el oro).

3. La flankelemento povas esti substantiva epiteto. Oni analizas per la *simpla apudmeto* de la du substantivoj. (Membroabonanto : membro abonanto ; bovo-viro : bovo viro ; majstrooratoro : majstro oratoro).

Ĉi tiujn tri analizojn, kiujn sube ofte ni aludos, ni nomu analizo R. (rilato), analizo M. (materialo) kaj analizo E. (epiteto).

La analizojn oni povas anstataŭi ankaŭ per la *adjektivigo de la flankelemento* (homa koro, ora ĉeno), ĉar la a-finaĵo esprimas ankaŭ rilaton, apartenon (homa koro : homapartena koro ; skribmaŝino : maŝino rilatanta al skribo), krome ĝia signifo estas ankaŭ *kiu estas* (orhorloĝo : horloĝo, kiu estas (el) oro ; ŝuistmajstro : majstro kiu estas ŝuisto).

Sed ĉi tiu analizo ne ĉiam estas aplikebla, ĉar la a-finaĵo per siaj pluraj sencoj povas naski miskomprenon. Ekzemple : *bova viro* povas esti *viro, kiu estas bovo*, kaj *viro de bovoj* (paŝtisto). Kaj *nepre ne estas aplikebla ĉi tiu analizo, se la radiko de la flankelemento estas adjektiva*. Nome ĉi okaze per la adjektivigo ni ricevas veran adjektivon, dum en la kunmeto la flankelemento estas nepre en substantiva formo (ĝene-

rala regulo 2. a.). Ekzemple *varmenergio* ne estas analizebla kiel *varma energio*, nek *belamo*, aŭ *voluptamo*, aŭ *belkulto* estas analizeblaj kiel *bela amo*, *volupta amo*, *bela kulto*, ĉar ili estas *energio de varmo*, *amo de belo*, *amo de volupto*, *kulto de belo*.

Tiuj vortoj do, kiuj postulus la jenan analizon, estas malĝuste sintezitaj. *Bluokulo*, *Kardio*, *belknabino*, *bonpatrino* ktp. ofte troveblaj precipe en poemoj, estas tute kontraŭaj al la spirito de la Esperanta vortkunmeto.

Ekzistas tamen kelkaj vortoj, kiuj ŝajne estas esceptoj, havante antaŭ substantiva ĉefelemento adjektivan flankelementon. Ekzemple *sovaĝbesto*, *sovaĝbirdo*, *sovaĝkato*, krome *dikfingro*, *ĝentilhomo*, *etburĝo junedzo* ktp. Sed pli funde analizante tiujn ĉi vortojn, ni trovas, ke ili ne estas simplaj adjektivo-substantivaj kunmetoj. *Sovaĝbesto* ekzemple ne estas simple *sovaĝa besto*, ĉar oni ja povas paroli pri sovaĝa dombesto (sovaĝa hundo) kaj malsovaĝa sovaĝbesto (kapreolo). *Sovaĝanaso* estas sovaĝbirdo, sed ne sovaĝa birdo. La *sovaĝkunmetoj* do estas propre neanalizeblaj, sekve ili estas *kvazaŭ radikvortoj*. Same pri *dikfingro*. Ĝi ne estas analizebla, kiel *dika fingro*, ĉar ja ĉiuj fingroj de grasa homo estas dikaj, sed li havas nur unu dikfingron sur unu mano. *Gentilhomo* estas evidente ne identa je *gentila homo*, oni ja povas renkonti eĉ malĝentilan ĝentilhomon. *Etburĝo* ne estas identa je *eta burĝo*, ĉar tiu ĉi lasta signifas *malgrandan individuon*, dum *etburĝo* povas esti stature eĉ giganto, la adjektivo *eta* rilatas ne al li mem, sed al lia burĝeco, tiel do oni povus diri ke *etburĝo* estas *eiburĝeculo*. En *junedzo* la *juna* rilatas ne al la *edzo* mem, sed al lia *edzeco* (junedzeculo).

La ŝajne adjektivo-substantivaj vortkunmetoj do estas kvazaŭ novaj radikvortoj, aparte lernendaj, havantaj signifon ne tute respondan al la elementoj, el

kiuj ili konsistas, same, kiel ekzemple *diskreditigi* estas kvazaŭ radikvorto, ne analizebla laŭ siaj elementoj *dis*, *kredito* kaj *igi*.

Analogaj al ĉi tiuj kunmetoj estas la kunmetoj de la prefiksoj *mal*, *eks*, *bo*, *mis*. Ankaŭ ili ne estas analizeblaj laŭ la principoj de la Esperanta vortkunmeto, ili kreas ne novajn *vortojn*, sed novajn *radikojn*.

Ankaŭ inter la sufiksoj ni havas tian radikfarilon, ĝi estas la sufikso *um*. Krome estas tri sufiksoj : *et*, *eg*, *aĉ*, kiuj, kvankam starante je la fino de la vorto, neniam estas ĉefelementoj, nek aliigas la sencon de la antaŭa elemento, nur iom modifas ĝin. Oni nomas ilin *senkarakteraj*, aŭ *diafanaj* sufiksoj.

Sufiksoj substantivaj.

La substantivaj sufiksoj plejparte sekvas la analizon R. Klubano : ano de klubo ; polvo : ero de polvo ; reĝido : ido de reĝo ; glavingo : ingo de glavo, Bahaismo : ismo (doktrino) de Baha ; ŝipestro : estro de ŝipo ; pentristo : isto (profesiulo) de pentro ; cigarujo : ujo de cigaro(j) ; tranĉilo : ilo de tranĉo ; lernejo : ejo de lerno.

Kiel ni vidas, la sufikso, kiel ĉefelemento, ĉiam substantivigas la antaŭan flankelementon. Same : lavujo : ujo de lavo ; banujo : ujo de bano ; ankrejo : ejo de ankro (j), ankradejo : ejo de ankrado ; flugilo : ilo de flugo ; facetadilo : ilo de facetado.

La vortojn kun *ino* ni analizas laŭ analizo E. Agentino : agente ino, ino agente. La analizo de *virino* estas *viro ino* (ĉi tie la radiko *vir* signifas seksmaturecon, aĝon, kontraste al infano, knabo, junulo). *Vira ino* signifus virecan virinon, kies Esperanta nomo povus esti *virulino*.

Pli vaste ni devas pritrakti la sufiksojn *aĵo*, *ulo*, kaj *eco*.

Aĵo.

Gia signifo estas : io spertebla, konkreta, sensebla. Plej grave ĝi funkcias antaŭ *adjektivaj* flank-elementoj.

Ĉi okaze la kunmeton oni analizas laŭ analizo E. *Belajo* : belo aĵo, aĵo belo. Ĝi signifas : belo, kiu estas aĵo, aŭ (ĉar aĵo estas io sensebla) belo kiu estas sensebla : sensebla belo : *sensebla manifestiĝo de la belo*. Estas evidente, ke la analizo ne povas okazi per la adjektivigo de la flankelemento : *belajo* ne estas identa je *bela aĵo*. Ĉi tion tuj pruvos kelkaj ekzemploj :

Al mi pli plaĉis la belajoj de la regiono, ol la belaj aĵoj en la salono. Liajn bonaĵojn ni rekompencis per bonaj aĵoj. Dolĉa viando estas dolĉa aĵo, sed ĝi ne estas dolĉaĵo. La malglatajn aĵojn oni ne povis ruli tra la malglataĵoj de la vojo. La aŭtomato estas sprita aĵo, sed ĝi ne estas spritaĵo.

La diferenco inter la du formoj estas evidenta. La adjektiva formo signifas ke ia aĵo havas ian *okazan* kvaliton, dum la ajokunmeto signifas la *senseblan manifestiĝon de la respektiva kvalito*.

Post *substantiva* flankelemento tiu ĉi konkretiga funkcio de la aĵo-sufikso estas superflua, ĉar la substantivradikaj vortoj jam mem signas konkretaĵon. Tie ĉi do oni uzas aliajn analizojn.

1. Analizon R. Ekzemple : araneaĵo : aĵo (reto) de araneo ; infanaĵo : aĵo (afero) de infano. Ĉi tiu uzo cetere estas malofta, kaj plejofte ĝi donas vortojn, kies senco ne tute konformas al siaj elementoj, do aĵo en ĉi tiuj okazoj estas kvazaŭ radikfarilo, parenca al *um*.

2. Post flankelementoj, signifantaj manĝeblan beston, aŭ materialon, aĵo, laŭ lingva konvencio, signifas manĝaĵon, faritan el la respektiva besto, aŭ materialo. La analizo okazas per analizo M. Bovaĵo :

aĵo (manĝaĵo) el bovo ; ovaĵo : aĵo el ovoĵ ; farunaĵo : aĵo el faruno.

Aĵo post *verabaj radikoj* estas analizebla laŭ analizo E. Skribaĵo : aĵo skribo, skribo aĵo, skribo kiu estas aĵo, aŭ (ĉar aĵo estas io konkreta) : aĵo kiu estas konkreta, do *konkreta manifestiĝo de la ago skribo*. Aĵo post *verabaj radikoj* do signifas la konkretan manifestiĝon de la respektiva ago, se la ago havas tian manifestiĝon. Ĉe kelkaj verboj, kiel sube ni vidos, tia manifestiĝo mankas, ilian ajokunmeton ni analizas laŭ analizo R.

Kio estas la konkreta manifestiĝo de la ago, tio dependas de la verbo mem. Ĉi rilate la verbojn oni povas klasi en plurajn grupojn.

1. Ĉe la verboj, kiuj esprimas *produktadon, kreon, faron*, la konkreta manifestiĝo estas la konkreta rezulto de la ago. *Kreaĵo* : aĵo kreo : kreo aĵo : kreo, kiu estas aĵo : kiu estas konkreta, do : kiu estas la konkreta manifestiĝo, *rezulto de la kreo*. Tiaj verboj estas : bindi, ĉarpenti, ĉasi, dekolti, draŝi, fandi, fosi, gravuri, konstrui, pentri, skribi ktp. Estas evidente, ke dekoltaĵo ne estas io dekoltitita, ĉar tio estas ja la vesto, sed ĝi estas la rezulto de la ago dekolto. Same bindaĵo ne estas io bindita, ĉar tio estas la libro, ĝi estas la rezulto de la bindado.

2. Ĉe verboj, kiuj esprimas *staton, procezon*, la konkreta manifestiĝo estas mem la objekto, kiu statas, kiu procezas. Vivaĵo estas vivo aĵo, do vivo, kiu estas aĵo : vivo, kiu estas konkreta : konkreta manifestiĝo de vivo. Ĉi tie do la ajokunmeto signifas la subjekton de la ago : *kio vivas*. Tiaj verboj estas : aparteni, boli, bruli, degeli, esti, ekzisti, eksplodi, fali, kreski, konveni, morti, okazi, putri, rampi, ŝveli, valori, vegeti. Ilia aĵo-kunmeto do signifas tiu konkretaĵon, kies kvazaŭa esenco estas la respektiva ago, tiel, ke la

konkretaĵon mem oni povas rigardi kvazaŭ konkreta manifestiĝo de la respektiva ago.

3. Ĉe verboj kiuj signifas *aplikon de objekto* por ia celo, la konkreta manifestiĝo estas mem la uzata objekto. Kovraĵo : aĵo kovro, konkreta manifestiĝo de la ago kovro. Sed la verbo *kovri* esprimas ne nur la agon de la kovranta homo, sed ankaŭ la agon de la kovranta kovrilo, do ne nur la aplikon de la objekto, sed ankaŭ la funkcion de la aplikita objekto. (Mi kovras la plankon per tapiŝo ; la tapiŝo kovras la plankon.) Lastsence, la aĵo-kunmeto signifas la subjekton de la frazo, kiu la respektivan agon plenumas laŭ sia destiniteco, al kiu do la respektiva ago donas la karakteron kaj esencon, tiel, ke ĝin oni povas rigardi kvazaŭ konkreta manifestiĝo de la respektiva ago. Ĉe tiuj ĉi t. n. *dudirektaj verboj* oni do ambaŭvoje venas al la sama rezulto. *Baraĵo* estas konkreta manifestiĝo de *barado*, do *aĵo kiu baras*, kaj *per kiu oni baras*. Tiaj dudirektaj verboj estas : amuzi, armi, bari, citi, distri, fini, glui, garni, ilustru, komenci, karakterizi, kompensi, kotizi, legitimi, nutri, okupi, ornamu, provi, prui, ŝtopi, ŝmiri, vesti, vindi ktp.

4. Ĉe *transiraj verboj*, signifantaj *rilaton*, aŭ *rilatŝanĝon*, la konkreta manifestiĝo de la ago estas la objekto, pri kiu la rilato, aŭ rilatŝanĝo okazas. Havaĵo estas konkreta havo, la konkreta manifestiĝo de havo. Tiaj verboj estas : akiri, aneksi, bezoni, gajni, havi, heredi, perdi, posedi, trovi ktp.

5. Ĉe la ĉi-supraj verboj la ago ĉiam havas konkretan manifestiĝon, sed ekzistas verboj, kiuj signifas la *aplikon de ago al objekto*, ĉe ili la ago ne havas konkretan manifestiĝon. Ekzemple oni ne povas diri, ke *manĝaĵo* estas la konkreta manifestiĝo de *manĝo*. Ĉe tiuj ĉi verboj do ne estas aplikebla analizo E., oni devas uzi analizon R. *Manĝaĵo* estas *manĝobjekto*, aĵo (*objekto*) de *manĝo*. Tiaj verboj estas :

abomeni, frandi, gluti, komerci, legi, labori, manĝi, miri, studi, trinki, vidi ktp.

Resume : la aĵokunmeto signifas.

1. Kun *produktverboj* la *rezulton* de la ago.

2. Kun *netransiraj stat-* kaj *procesverboj* la *subjekton* de la ago.

3. Kun *dudirektaj verboj* la *ilon*, respektive la *subjekton* de la ago.

4. Kun *rilatverboj* la *objekton* de la ago.

5. Kun *agaplikaj verboj* (priverboj) la *objekton* de la ago.

En la kvar unuaj kunmetoj la aĵo-kunmeto estas la konkreta manifestiĝo de la ago (analizo E.), en la kvina grupo tia manifestiĝo ne ekzistas, la aĵo-kunmeto do estas aĵo *rilatanta al la ago* (analizo R.)

Eco.

Gia signifo estas *kvalito*. Laŭ mia opinio ĝi estas substantiva sufikso, same kiel *kvalito* estas substantivo.

Giajn kunmetojn oni ĉiam analizas laŭ analizo E.

1. Kun substantiva flankelemento ĝi signifas, ke la koncepto esprimita de la substantivo estas ies *kvalito*. *Gibeco* estas *ĝibo eco*, *ĝibo kiu estas eco*, *ĝibo kiel eco*.

Homeco estas *homo eco*, *homo kiel kvalito*. Ĉar la homo, kiel nura *kvalito* estas *abstrakto*, *homeco* signifas *abstrakto homo*.

Fianĉeco estas *fianĉo eco*, *fianĉo kiel kvalito*. Ĉar *fianĉo kiel nura kvalito* ne signas la individuon mem, sed nur ĝian okazan kvaliton, kaj, ĉar ĉi tiu fianĉa kvalito estas la *fianĉa stato*, *fianĉeco* estas *fianĉa stato*. Same : reĝeco : reĝa stato ; patreco : patra stato ; prezidanteco : prezidanta stato.

Do post substantivoj signifantaj *parencon*, *profesiulon*, *okupitulon* la senco de *eco* vortlogike estas *stato*.



Nur analizo E. estas aplikebla. Homeco ne estas identa je homa eco.

Ekzemploj : La homeco konsistas el diversaj homaj ecoj. Patrineco disvolvas patrinajn ecojn. Dum edzeco, necesa edza eco estas la pacienco.

2. Kun adjektiva flankelemento eco same signifas *kvalito*. *Beleco* estas *belo eco*, do *belo*, *kiel eco*. Nur analizo E. estas aplikebla kompreneble. *Beleco* ne estas *bela eco*, nek *eco de belo*. Ekzemplo : Ŝi havas multajn belajn ecojn, sed ne havas belecon.

3. Kun verba flankelemento eco malofte kunmetiĝas. Sed ekzistas ekzemple la vorto *fikseco*, kiu, laŭ analizo E. estas *fikso eco*, *fikso kiel eco*, do (*farita*) *fikso*, *kiel kvalito de objekto*.

Ulo.

Gia signifo estas senkaraktera individuo, same kiel tiu de aĵo estas senkaraktera objekto. Tial memstare ĝi estas insulta vorto.

En siaj kunmetaĵoj ĝi signifas individuon, kies ĉefan, regantan kvaliton esprimas la antaŭa flank-elemento, tiel, ke la respektiva individuo estas rigardebla, kvazaŭ individua manifestiĝo, personiĝo de la respektiva kvalito. La analizo okazas per analizo E.

Belulo estas *belo ulo*, *belo kiel ulo*, *belo*, *kiel individuo*, do *personiĝo de belo*. *Timulo* estas *timo ulo*, do *personiĝo de timo*.

Ĉar la konkretaj substantivoj ne esprimas kvaliton, ilin oni povus kroĉi kun *ulo* nur post kiam ni faris el ili kvalitsencan substantivon. Tiel ekzemple el *ĝibo* ni devus fari la vorton *ĝibeco*, kaj el ĉi tio la vorton *ĝibeculo* : *ĝibeco ulo*, *individua manifestiĝo de ĝibeco*. Sed por esti pli konciza, oni povas ellasi la sufikson *eco*, ĉar la senco de la vorto estas ankaŭ sen ĝi tute klara (*ĝibulo*). En Esperanto estas tre grava la eblaĵo de ĉi tiu elasta vortformado laŭ la fama *de*

Saussure-a principo : *neceso kaj sufiĉo*, t. e. ĉion signi en la vorto, kio estas necesa por klareco, sed nur tiom kiom estas sufiĉa per tio. Sur tiu ĉi principo baziĝas la jenaj mallongaj formoj : *almozulo* (almozpetulo), *milionulo* (milionhavulo).

Unuavide ŝajnas stranga, ke *timulo* estas la individua manifestiĝo de timo, *ĝibulo* estas la individua manifestiĝo de ĝibeco. Sed ni pripensu, ke dirante *timulo*, *ĝibulo* oni tute flanke-lasas la ceterajn ecojn de la respektiva individuo, en la vortoj *timulo*, *ĝibulo* oni diras kaj akcentas sole ilian timon, ilian ĝibecon, do *en ĉi tiuj vortoj mem* ili konsistas kvalite nur el timo, aŭ ĝibeco, *en ĉi tiuj vortoj mem* ili estas sole kaj nure la individuaj manifestiĝoj de *timo*, aŭ de *ĝibeco*.

La o-finaĵo.

Gia signifo estas : substantivo. Samtempe li estas substantiva ĉefelemento. Sekve la antaŭan flankelementon ĝi substantivigas (ĝenerala regulo 2. a.) Per tio ĝi mem propre fariĝas superflua, ĉar ja ĝi estas la sola finaĵo, kies vortsenco kaj vortreefiko estas la sama. Tial oni povas ĝin ankaŭ ellasi, se ni signas ĝian ĉeeston per apostrofo (en skribo), aŭ per la loko de la akcento (en parolo).

La o-finaĵo signifas sole substantivon. En la senco de la o-finaĵaj vortoj do validiĝas la gramatika karaktero de la antaŭa radiko. Kun radiko *substantiva* ĝi esprimas *objekton* aŭ *koncepton* (homo, scienco), kun *adjektiva* *kvaliton*, aŭ *abstraktaĵon* (bono, belo), kun *verba* *agon* (skribo, manĝo).

Kategorio-sufiksoj.

La o-finaĵo, kaj la sufiksoj *aĵo*, *ulo*, *eco*, *ado* servas por signi la tri ĉefajn kategoriojn : *konkretaĵojn*, *abstraktaĵon* kaj *agon* kaj krome *individuon*, kiel subkategorion de la konkretaĵoj, kaj *kvaliton*, kiel subkategorion de la abstraktaĵoj.

La *o-finaĵo*, kiel ni jam diris, ne ŝanĝas tiun kategorion, al kiu la radiko apartenas per sia radika karaktero. Sed *teorie* ĝi entenas *ĉiujn* kategoriojn, do helpe de kunteksto, ĉiujn kategoriojn ĝi povas signi.

Kun *substantiva* radiko ĝi signas ĉiam konkret-aĵon.

Kun *adjektiva* radiko ĝia signifo estas : abstraktaĵo. (La belo ; la bono.) Sed, helpe de la kunteksto, ĝi povas signi :

konkretaĵon : mi vidis multajn belojn (belaĵojn) ;

individuon : mia belo (belulo), mia karo (karulo) ;

kvaliton : ŝia belo (beleco) estis eksterordinara ;

agon : dum rapido (rapidado).

Sed sen la helpo de la kunteksto la vortoj tiel estus plursencaj. Tial la *o-finaĵo* restas por la marko, de abstrakto, kaj la ceterajn kategoriojn ni signas per la respektivaj kategorio-sufiksoj. Do — belo (la belo) ; belaĵo (belo kiu estas aĵo), belulo (belo kiu estas individuo), beleco (belo kiu estas kvalito), rapido (rapido kiu estas ago).

Kun *verba* radiko la *o-finaĵo* signas *agon*. Sed helpe de la kunteksto ĝi povas signi ankaŭ la *konkretan* manifestiĝon, aŭ la objekton de la ago. (Belaj konstruoj ; perdita skribo ; bona manĝo ; lana kovro.) Krome ĝi povas signifi ankaŭ abstraktaĵon : *amo*, *penso* ekzemple estas abstraktaĵoj *amo*, *penso*. Por eviti miskomprenon, se la kunteksto ne helpas, oni anstataŭigas la *o-finaĵon* per la sufikso de *konkreto*. Male, se oni volas speciale akcenti la *agon*, oni almetas la sufikson de la ago (ado). (Konstruaĵo : konstruo, kiu nepre ne estas ago, sed konkreta manifestiĝo de la ago ; konstruado : konstruo, kiu nepre ne estas konstruaĵo, sed ago.) Same : *amado*, *pensado*,

Ĉio ĉi okazas laŭ la vojo de la parollogiko, kvazaŭ nevole, ĉar ja temas nur pri la kunmeto de la

elementoj, necesaj por la preciza senco. La gramatikan karakteron de la radikoj oni devas ja koni, sed ĝi plejparte doniĝas per si mem, kaj se ni eraras, ni maksimume *trodifinas* la vorton, ĝi ne estos eleganta, sed restos komprenebla.

II. ADJEKTIVA ĈEFELEMENTO.

Se la ĉefelemento estas adjektivo, la flankelemento devas esti substantivo (ĝenerala regulo 2. b.). Se radike ĝi ne estas substantivo, ĝi substantiviĝas. Oni analizas per la prepozicio *je*. *Herbriĉa* : riĉa je herbo ; *belriĉa* : riĉa je belo ; *prespreta* : preta je preso ; *di-simila* : simila je dio.

Adjektivaj sufiksoj.

La tri *adjektivaj sufiksoj* (ebla, ema, inda) kondukas same, kiel la aliaj adjektivoj. *Portebla* : ebla (taŭga) je porto ; *drinkema* : ema je drinko ; *aminda* : inda je amo.

Tiuj ĉi tri sufiksoj kaŝe, vortlogike, havas en si la sencon de *ago*. *Ebla* estas propre *adebla*, *ema* estas propre *adema*, *inda* estas propre *adinda*. Tial la principo de la »neceso kaj sufiĉo« permesas, ke oni ellasu antaŭ ili la verban elementon, eĉ kiam la flankelemento radike ne estas verbo. *Martelebla*, *sangema*, *broŝinda* do estas propre : *marteladebla*, *sangadema*, *broŝadinda*.

La a-finaĵo.

La *a-finaĵo* estas adjektiva ĉefelemento. Post adjektivaj radikoj ĝi estas pleonasma, sed cetere ĝi estas *memstara* vorto, kun *memstara* signifo, kiu estas : 1... kvalita, ... karakterizita ; 2... rilata, ... apartena.

Substantivaj radikoj antaŭ ĝi konservas sian substantivecon : *Homa* : homkvalita, aŭ homapartena ; *reĝa* : reĝkvalita, aŭ reĝapartena, aŭ reĝrilata ; *ŝtona* :

ŝtonkvalita, aŭ ŝtonkarakterizita. (Homa mano ; reĝa konduto, reĝa ĝardeno ; ŝtona koro, ŝtona ponto.)

Verbaj radikoj antaŭ ĝi substantiviĝas (ĝenerala regulo 2. b.) Sekve, ĉiu *verbo-adjektivo estas verbo-substantivo-adjektivo*. Skriba estas ĉiam skribo-a.

Ama koro : amkvalita koro, amkarakterizita koro ; *ama letero* : am-rilata letero ; *tima homo* : timkvalita homo ; *luma globo* : lumkvalita globo ; *ĉagrena koro* : ĉagren-karakterizita koro ; *fiksa horo* : fiks-karakterizita horo.

Kiel ni vidas, en la du lastaj ekzemploj la verbo havas pasivan sencon. Tio estas ebla gramatike, ĉar *karakterizita de ĉagreno* povas signifi : karakterizita de tio, ke *li mem ĉagrenas*, kaj ankaŭ : karakterizita de tio, ke *oni lin ĉagrenas*. La precizan sencon certigas la kunteksto. Sen ĝi, oni devas diri : *ĉagrenanta*, aŭ *ĉagrenita*.

III. VERBA ĈEFELEMENTO.

Se la ĉefelemento estas verbo, la flankelemento povas esti 1. adverbo, 2. predikata atributo (ĝenerala regulo 2. c.).

1. La flankelmento estas adverbo : laŭtleĝi (laŭte legi), bonfarti (bone farti), kunludi (kune ludi), ekiri (eke iri), subaĉeti (sube aĉeti), ŝtonbati (ŝtone bati), pafmortigi (pafe mortigi).

2. La flankelemento estas predikata atributo : ruĝpentri (pentri ruĝa), plenŝtopi (ŝtopi plena), disiri (iri disaj), kunveni (veni kunaj), grandigi (igi granda), ŝtonigi (igi ŝtona), ŝtatigi (igi ŝtata), beligi (igi bela), grupigi (igi grupa).

Sufiksoj verbaj.

Ni havas tri verbajn sufiksojn : *igi, iĝi kaj adi*. Pri ili oni devas paroli iom pli detale.

Igi kaj iĝi.

Igi signifas : *fari ia*, *iĝi* signifas *ekesti ia*. Pri iliaj kunmetoj kun substantivaj kaj adjektivaj flankelementoj ni jam donis ekzemplojn supre (ŝtonigi, ŝtatiĝi, grupiĝi, beliĝi, grandigi). Pli detale nur pri iliaj verbaj flankelementoj ni devas okupiĝi.

La verba flankelemento estas antaŭ ili ĉiam adjektiva predikata atributo. (Starigi : *igi* stara ; stariĝi : *iĝi* stara.) Sed ni vidis, ke la a-finaĵo ĉiam substantivigas la antaŭan flankelementon, *stara* do propre estas *staro-a* : starkvalita, karakterizita de staro, do preskaŭ *staranta*. La a-finaĵa verbo-substantivo do havas signifon tre parencan al participa adjektivo. Sekve : *starigi* (*igi* stara) signifas *starantiĝi* (*iĝi* staranta) ; *stariĝi* (*iĝi* stara) signifas *starantiĝi* (*iĝi* staranta).

Sed la o-finaĵa verbradiko kaj la adjektivo el ĝi pluderivita entenas kaŝe krom la *aktiva* senco ankaŭ *pasivan*. Ekzemple : *la skribo de la knabo estas rapida* ; *rapidskriba knabo*, — ĉi tie *skribo* kaj *skriba* (*skribo-a*) enhavas *aktivan* sencon : la knabo *skribas* rapide. Male : *la skribo de la letero estas bela* ; *belskriba letero*, — ĉi tie *skribo* kaj *skriba* enhavas *pasivan* sencon : la letero estas bele *skribita*. En la unua kazo ni povas diri : *rapidskribanta knabo*, en la dua : *belskribita letero*. La a-finaĵa verbradiko de povas identi ne nur la *aktivan* participon (*skribanta*), sed ankaŭ la *pasivan* (*skribita*). *Skriba* informo (*skribkvalita*, *skribkarakterizita* informo) evidente identas je *skribita* informo. *Skriba* (*skribo-a*) do signifas 1. karakterizita de *aktiva* skribo (*skribanta*) ; 2. karakterizita de *pasiva* skribo (*skribita*). Same : *Korekta*, *fiksa*, *abstrakta*.

Sekve *igi* post verba radiko povas signifi

1. *igi* karakterizita per *aktiva* ago, do efiki tiel,

ke iu faru la respektivan agon. (Starigi : igi star(ant)a; mortigi : igi mort(int)a, venigi : igi ven (ant)a.)

2. igi karakterizita per *pasiva* ago, do efiki tiel, ke la la respektiva ago *estu farata* pri io. (Skribigi leteron : igi leteron skrib(it)a.) Sekve la frazo : »*mi skribigas leteron*« propre havas duoblan sencon, ĉar la frazo mem ne montras, ĉu mi *mem* igas skribita la leteron, aŭ mi igas ĝin skribita *per iu alia*. Sed ĉar por la unua senco ni havas la simplan frazon : »*mi skribas la leteron*«, la supran formon ni povas rezervi ekskluzive por la dua senco.

Ĉe netransiraj verboj (sidigi, venigi, starigi, faligi, dronigi) kompreneble nur la *aktiva* senco eblas.

Ĉe *transiraj* verboj eblas tiel la aktiva, kiel la pasiva senco. Sed la lingvo-uzo ĝenerale aplikas nur la *pasivan* sencon. Ekzemple ni ne diras : *li konstruigis lin*, sed : *li igis lin konstrui*. Tio ĉi fariĝis absoluta principo ĉe la produktverboj, dudirektaj verboj kaj rilatverboj (vidu supre, sub la ĉapitro *Aĵo*). Skribigi (leteron), konstruigi (domon); barigi (korton). Nur ĉe kelkaj *priverboj* estas *igi* uzata en ambaŭ sencoj. Mangigi (ion per iu kaj iun per io), trinkigi (iun kaj ion), studigi (iun kaj ion).

Igi post verbaj radikoj povas signifi :

1. ekesti karakterizita per *aktiva* ago, do *komenci* aktivan agon. Stariĝi (iĝi stara, ekstari), estiĝi (iĝi esta, ekesti), sidiĝi (iĝi sida, eksidi).

2. ekesti karakterizita per *pasiva* ago, do *esti...* *ata*. Fermiĝi (esti fermata), vidiĝi (esti vidata), kovriĝi (esti kovrata). Sed ĉar »ekesti karakterizata de pasiva ago« *ne montras la aganton*, ĉi tiuj iĝi-formoj signas, ke la respektiva pasiva ago okazis pri la objekto kvazaŭ *per si mem*. Se oni fermas la pordon, mi diras : »la pordo estas fermata« ; se la pordo iĝas fermata el nesciata kaŭzo, mi diras : »la pordo fermiĝas«.

Ĉe *netransiraj* verboj nur la *aktiva* senco estas ebla.

Ĉe *transiraj* verboj eblas tiel la aktiva, kiel la pasiva senco. Sed la aktivan sencon ĉe tiuj ĉi verboj la lingvouzo *neniam* aplikas. *Fermiĝi* do neniam signifas ekfermi. *Iĝi* do ĉe transiraj verboj havas la funkcion de netransiriga sufikso. (Komenci-komenciĝi, turni-turniĝi, kovri-kovriĝi ktp.)

Adi.

Gia signifo estas : *agi*. Kiel verba ĉefelemento, ĝi postulas adverban flankelementon. (Skribadi : skribe adi ; marteladi : martele adi.)

Sed ĉar la sencon de *agi* havas ĉiuj vortoj, kiuj havas verbajn finaĵojn, *adi* en verba formo propre ĉiam estas *pleonasma*. Ĉi tiun pleonasmecon uzas la lingvo por akcenti per *adi* la agan elementon pli forte, do, por signi la *longan daŭron*, aŭ la *ripeton* de la ago.

Grandsignifa estas ĝia substantiva formo *ado*, kiel la kategorio-sufikso de la *ago*. (Vidu ankaŭ sub la ĉapitro : *Kategoriosufiksoj*.)

Ado kiel la *substantiva* kategoriosufikso de la *ago* havas du manierojn de analizo.

Se la antaŭa radiko estas *substantiva*, *ado* estas (-adi)o. Ekzemple : *marteladi* estas (marteladi)o, (martele adi)o : *ago* *agi* per *martelo*. (Vidu poste : *O-finaĵo kiel memstara vorto antaŭ verbaj radikoj*.)

Se la antaŭa radiko estas *verba*, *ado* havas nur klarigan, epitetan funkcion, do estas analizebla laŭ analizo E.

Amado estas : amo *ado* : amo *ago* ; do ne *abstrakto* *amo*, sed nepre *ago* *amo*.

Skribado estas skribo *ago*. Do ne *konkreto* *skribo*, sed nepre *ago* *skribo*.

Irado estas *iro* *ago*. Sed *iro* *mem* jam estas

ago, do *irado* estas vorto pleonasma. La pleonasmecon la lingvo ĉi tie uzas por signi la *longan daŭron* de la ago.

Pafado estas *paf*o *ago*. Sed *paf*o jam mem estas *ago*, do *pafado* estas vorto pleonasma. La pleonasmecon la lingvo ĉi tie uzas por signi la *ripeton* de la ago.

Ado do servas : 1. por signi *nepre* agon, 2. por signi *longan daŭron*, 3. por signi *ripeton*.

La i-finaĵo.

La *i-finaĵo*, kaj la ceteraj verbaj finaĵoj, estas verbaj ĉefelementoj, ilia signifo estas proksimume : *funkcii*, aŭ esti. Kun verbaj radikoj ili estas pleonasmaj. Kun la ceteraj radikoj ili havas la funkcion de memstara vorto. Ilia flankelemento, ĉar ili estas verbaj ĉefelementoj, povas esti

1. Adverbo. Marteli : i martele (per martelo), reĝi : i reĝe (kiel reĝo), gasti : i gaste (kiel gasto), ondi : i onde (kiel ondo).

2. Predikata atributo. Rapidi : esti rapida : nigri : esti nigra. Sed ĉi lastaj estas analizeblaj ankaŭ adverbe : i (funkcii) rapide ; i (funkcii, impresi) nigre. Vere, la senpere verbigitaj adjektivoj ĉiam enhavas la nuancon de *ago*. »La nokto estas nigra,« — ĉi tio estas simpla konstato. Sed : »La nokto nigras« — ĉi tio diras iom pli : ke la nokto kvazaŭ agas, funkcias (impresas) nigre.

IV. ADVERBA ĈEFELEMENTO.

El la adverbaj vortoj ĉefelemento povas esti sole la adverba finaĵo *e*. Ĝi postulas ĉiam *substantivon* antaŭ si, kaj ĝia analizo okazas per : *laŭ maniero de*, aŭ per : *kiel*. Reĝe : kiel reĝo ; gaste : kiel gasto ; bele : laŭ maniero de belo.

Krome, post substantivaj radikoj, ĝia analizo povas esti ankaŭ *per*, aŭ *helpe de*, ĉi okaze ĝi estas preskaŭ

identita al la latina ablativo. Martele : per martelo ; konstrue : per konstruo ; sonĝe : per sonĝo.

FINAJO KIEL MEMSTARA VORTO. DUOBLAJ FLANKELEMENTOJ.

Kiel ni vidis, la finaĵoj povas funkcii ankaŭ kiel memstaraj vortoj, havantaj memstaran signifon. Tiaokaze, kompreneble, propre mem la finaĵo estas la ĉefelemento de la vorto, kaj la radiko, staranta antaŭ ĝi, fariĝas ĝia flankelemento.

Ekzemple : *reĝa* signifas *reĝapartena* : apartena : je (al) reĝo. *Marteli* estas *martelagi* : agi martele.

Se antaŭ *memstara* finaĵo staras *du* radikoj, ni parolas pri *duoblaj flankelementoj*. Ĉi okaze ne ĉiam validas plu la simplaj fundamentaj reguloj de la vortkunmeto, ĉar la finaĵo povas rilati jen al la dua radiko, jen al ambaŭ radikoj, kiel al tuto. En la unua okazo la dua radiko kaj la finaĵo, kiel tuto, rilatas kaj efikas al la unua radiko laŭ la ĝeneralaj reguloj de vortkunmeto. Sed en la dua okazo la du unuaj radikoj rilatas kaj efikas inter si, kaj al la rezulto de ĉi tiu rilato kaj efiko aldonas poste la finaĵo sian sencon kaj gramatikan karakteron.

Dum la analizo de vortoj do la unua tasko estas : konstati, ĉu la finaĵo estas memstara, aŭ ne. Ĉi tiu konstato okazas tiel, ke oni provas analizi la vorton laŭ la respektiva ĝenerala regulo. Se tio ne donas senchavan rezulton, la finaĵo, kiel memstara vorto, rilatas al ambaŭ radikoj, kiel al tuto.

Ekzemple : *grandanima* devus esti analizata, laŭ ĝenerala regulo 2. b. jene : *anima je grando*. Sed, ĉar ĉi tiu analizo ne donas senchavan rezulton : la analizo estos : grand-anim/a, do (granda animo)a : karakterizata de granda animo.

Ĉi tiu diversa grupiĝo de la elementoj, kiun

Eugen Wüster nomis *interelementa rilato*, ekzistas ne nur ĉe la finaĵa derivi, sed ankaŭ ĉe sufiksoj kaj vortoj.

Ekzemple jen du vortoj, kunmetitaj el po tri radikoj : *ŝtonkamentubo* kaj *vaporŝipasocio*. En la unua vorto la du lastaj radikoj, kiel tuto, rilatas al la unua radiko, la vorto *tubo* do kondukas same, kiel la nememstara finaĵo. En la dua vorto la lasta radiko rilatas al la du unuaj, kiel al tuto, do la konduto de la lasta radiko similas al tiu de memstara finaĵo. Ilia analizo do estas : *ŝton/kamentubo* kaj *vaporŝip/asocio*.

Saman diferencon ni trovas inter la du vortoj : *korboneco* kaj *facilanimeco*. En la unua vorto *boneco* kiel tuto rilatas al *kor*, en la dua, *eco* aparte rilatas al la du radikoj *facil-anim* kiel al tuto. Ilia analizo do estas *kor/boneco* kaj *facilanim/eco*.

Nun ni vidu la du vortojn *voĉdono* kaj *bonfarto*. *Voĉdono* estas simple *dono de voĉo* (ĝen. regulo 2. a.). En ĝi do la finaĵo *o* fandiĝas kun la verba radiko *voĉ*. Sed *bonfarto* ne estas *farto de bono*. En ĝi do *o* kiel aparta elemento rilatas al ambaŭ antaŭaj radikoj, kiel al tuto. Ĝia analizo estas do (*bon fart*)*o*, aŭ (*bone farti*)*o*.

Ni havas do la analogajn triojn :

<i>ŝton/kamen-tubo</i>	<i>vapor-ŝip/asocio</i>
<i>kor/bon-eco</i>	<i>facil-anim/eco</i>
<i>voĉ/don-o</i>	<i>bon-fart/o</i>

O-finaĵo kiel memstara vorto.

La *o-finaĵo kiel memstara vorto* plej grave funkcias antaŭ verbaj radikoj, kunigante ilin per la adverbo, aŭ per la predikata atributo, kaj rilatante ne al la verba radiko sola, sed al la kunigita komplekso, kiel al tuto.

Se en kunmetita vorto la finvorto estas verbo-substantivo, oni povas dum la analizo unue la ĝener-

alan regulon 2. a. Se oni sukcesas tiel, la analizo estas finita. Ekzemple : voĉdono : voĉ-/dono : dono de voĉo ; ĉiopovo : ĉio/povo : povo de ĉio ; memamo : mem/amo : amo de (si) mem.

Se tiamaniere oni ne ricevas senchavan rezulton, oni apartigas la o-finaĵon, kaj serĉas la rilaton inter la membroj de la duobla flankelemento. Dum tio ĉi validas la ĝenerala regulo 2. c. Konstatinte la rilaton inter la du flankelementoj, oni substantivigas ilin, kiel tuton. Ekzemple : *bonfarto* bon-fart/o : (bone farti)o : *plenŝtopo* : plen-ŝtop/o : (plena ŝtopi)o ; *ruĝpentro* : ruĝ-pentr/o : (ruĝa pentri) o ; *purigo* : pur-ig/o : (pura igi)o ; *klariĝo* : klar-iĝ/o : (klara iĝi)o ; *pafmurdo* : paf-murd/o : (pafe murdi)o.

Multfoje ambaŭ analizmetodoj donas la saman rezulton ; ekzemple : *ŝtonbato* estas ŝton/bat-o : (bato de ŝtono) kaj ankaŭ : ŝton-bat/o : (ŝtone bati)o.

A-finaĵo kiel memstara vorto.

La *a-finaĵo*, se ĝi ligiĝas al adjektiva elemento, plej ofte estas pleonasma ankaŭ en plurelementa vorto. Ĝian analizon ĉiokaze ni jam montris en la ĉapitro : *Adjektiva ĉefelemento*.

Sed se en *plurelementa* vorto ĝi ligiĝas al *neadjektiva* radiko, ĝi estas ĉiam memstara vorto kaj havas memstaran funkcion. Do ĝi neniam rilatas ĉi okaze al la lasta radiko sola, sed ĉiam al ambaŭ elementoj, kiel al tuto.

Ekzemple : *urbdoma* ne estas doma je urbo, sed : urb-dom/a : (urbodomo)a ; *skribtabla* ne estas skrib/tabl-a : skriba je tablo, sed : skrib-tabl/a : (skribotablo)a.

Ĉiokaze oni do devas analizi la du flankelementojn aparte, kaj poste kune adjektivigi la rezulton de la analizo.

Se la radiko staranta antaŭ la a-finaĵo estas *substantiva*, ni trovas du eblaĵojn.

1. La du flankelementoj formas kune memstaran kunmetitan vorton, al kiu estas aplikebla la ĝenerala analiza regulo 2. a. Ekzemple : *leonkora* : (leonkoro)a : (koro de leono)a ; *urbdoma* : (urbodomo)a : (domo de urbo)a.

2. La du flankelementoj ne povas esti analizeblaj laŭ ĝenerala regulo 2. a. kaj ili ne povas formi kune kunmetitan vorton memstaran. Ĉi okaze ni provizas la du elementojn per finaĵo responda al ilia radikkaraktaro. La du elementoj per tio disfalas en du apartajn vortojn, nome, en *adjektivon* kaj *substantivon*, aŭ en *prepozicion* kaj *substantivon*.

Ekzemple : *facilanima* : facil-anim/a : (facila animo)a ; *grandhoma* : grand-hom/a : (granda homo)a ; *senkora* : sen-kor/a : (sen koro)a ; *ĉirkaŭdoma* : ĉirkaŭdom/a : (ĉirkaŭ domo)a.

Ĉe tiuj ĉi vortoj do la a-finaĵo kunfandas tiajn elementojn, kiuj memstare, kiel substantiva vortkunmeto, ne povas stari kune. La unua elemento en tiuj ĉi vortoj estas ĉiam *adjektivo*, aŭ *prepozicio*.

Se la radiko staranta antaŭ la a-finaĵo estas *verba*, la a-finaĵo rilatas ambaŭ flankelementojn, kiel tuton. Sed ĉar la a-finaĵo, kiel adjektiva elemento, ĉiam substantivigas la antaŭe starantan flankelementon (ĝenerala regulo 2. b.), ankaŭ ĉiokaze ĝi substantivigas la duoblan flankelementon kiel tuton. Do *bonfarta* estas (bon-fart/o)a, *purigo* estas (pur-ig/o)a ; *ĉiopova* estas (ĉiopovo)a ; *memama* estas (memamo)a ; *pafmurda* estas (pafmurdo)a. Oni do ricevas verbosubstantivajn kunmetojn, kiujn oni povas plu analizi laŭ la supre montrita maniero. Post ĉi tiu analizo, oni adjektivigas la rezulton. Ni havos do : (bone farti)o-a ;

(pura igi)o-a ; (povo de ĉio)a ; (amo de mem)a ;
(pafe murdi)oa.

Specialan rolon havas la prepozicio *sen* se en a-finaĵa vorto ĝi ligiĝas kiel flankelemento al flank-elemento verba.

Nome *sen* neniam estas verba prefikso, ĝi ĉiam, senescepte, postulas post si substantivon en nominativo. Tial do, vortlogike, ĝi havas en vortkunmetoj substantivigan kapablon. Ekzemple : *sendependa* : *sen-depend/a* : (sen dependo)a ; *senluma* : *sen-lum/a* : (sen lumo)a ; *senparola* : *sen-parol/a* : (sen parolo)a ; *sentima* : *sen-tim/a* : (sen timo)a.

Ĉar tiu ĉi vortefiko de *sen* iras de maldekstre al dekstre, do kontraŭdirekte al la ordinara vortefiko, kiu iras de dekstre al maldekstre, ni nomu ĝin *inversa vortefiko*.

Oni povus diri, ke ĉi tie ne necesas la inversa vortefiko de *sen*, ĉar la adjektiva finaĵo, kiel adjektiva ĉefelemento, postulas sen tio antaŭan substantivon (ĝenerala regulo 2. b.) do *senforta* ankaŭ per ĉi tiu regula vortefiko fariĝas *sen-forto/a*. Sed ni ne forgesu, ke ĉi tiu efiko rilatas tie ĉi ne la radikon *fort*, sed la tutan komplekson *senfort*. La plena analizo do estas (sen forto)o-a. Do, per vortoj : *karakterizita per* (a-finaĵo) *la eco* (o-finaĵo) (*sen forto*). Do : *karakterizita de senforteco*. La o-finaĵo, kiel kategorio-sufikso anatataŭas ĉi tie la sufikson *eco*, ĉar *esti sen forto* signifas evidente *econ*.

SAJNA SAMELEMENTECO.

INVERSA VORTEFIKO.

Ekzistas kunmetitaj vortoj, kies ĉefelemento, memstare, estas samelementa vorto, do ĝia finaĵo estas pleonasma. Sed en la kunmetaĵo, tamen, la finaĵo ricevas memstaran funkcion. Per tio ĝi fariĝas ĉef-

elemento en la vorto, do la ĉefelementeco de la lasta vorto estas nur ŝajna.

Ni vidu ekzemple la vorton : *voĉdoni*. *Doni* estas samelementa vorto, ĉar ĝi estas verba radiko kun verba finaĵo. La analizo de la vorto *voĉdoni* do estus (laŭ la ĝen. regulo 2. c.) : *voĉe doni*, aŭ *voĉa doni*. Ili ne havas sencon, do la regula analizo fiaskas. Kion signifas tio ? El multaj ekzemploj ni vidis, ke la fiasko de la regula analizo signifas, ke la finaĵo estas memstara elemento, kaj rilatas ne nur al la lasta elemento, finaĵe, sed al la tuto de la duobla elemento, vorte. Ni provu la analizon laŭ tiu ĉi maniero. La rezulto estos : (voĉdone)i. *Voĉdone* estas (dono de voĉo)e (ĉar *e* postulas antaŭan substantivon). Sekve la tuta analizo estos : (dono de voĉo)e-i, aŭ, ĉar *e* estas anstataŭigebla per la prepozicio *per* : i per dono de voĉo : *funkcii per dono de voĉo*.

Nun ni rigardu la vorton *senforta*. Forta estas adjektiva radiko, la analizo do estus (laŭ ĝen. regulo 2. b.) : *forta je seno*. Sed ĉi tio estas sensencaĵo, do *a* funkcias memstare, la analizo do estos (sen fort)a. *Sen*, kiel ni vidis, ĉiam postulas post si substantivon (inversa vortefiko). La definitiva analizo do estos (sen forto)a, same kiel *senkora* estas (sen koro)a.

Ni rigardu la vorton : *grandkuraĝa*. La vorto ŝajnas havi adjektivan ĉefelementon. Unua analiza provo : *kuraĝa je grando*. Ĝi ne havas sencon. Dua provo : *Grand-kuraĝ/a*. Ni ricevas du adjektivajn radikojn. Ili ne povas stari kune, disfalas do je *granda* kaj *kuraĝa*. Sed ĉiu adjektivo postulas post si nepre substantivon. Jen ree la inversa vortefiko. La analizo do estos (*granda kuraĝo*)a.

En *senforta* kaj *grandkuraĝa* do la inversa vortefiko de la prepozicio kaj adjektivo substantivigas la karakteron de adjektivo en la interno de la a-finaĵa

vorto, per tio apartigas la a-finaĵon, donante al ĝi memstaran vivon kaj funkcion.

Same : *helblua* estas (hela bluo)a ; *plenplena* estas (plena pleno)a.

Same, inversan vortefikon ni trovas ĉe la vorto *korvonigra*. La unua analiza provo (nigra je korvo) ne donas senchavan rezulton. Dua provo : korvo-nigr/a. *Korvo*, kiel substantivo, substantivigas la postan adjektivon, la rezulto do estos : (korvonigro)a : (nigro de korvo)a.

La *inversa vortefiko* do funkcias ĉe a-finaĵaj vortkunmetoj, neanalizeblaj laŭ la fundamenta regulo 2. b. Ĝi konsistas en la substantivigo de la adjektiva radiko per adjektivo, substantivo, aŭ prepozicio.

FRUKTUZO DE NEREGULECO.

Ĉe la pritrakto de la inversa vortefiko ni vidis, kiel utiligas la lingvo la gramatikan senregulecon por siaj celoj. *Sen* povas stari nur antaŭ substantivoj. El tio *gramatike* sekvus, ke en la vortkunmeto ni devus substantivigi antaŭ *sen* la nesubstantivajn radikojn per speciala substantiviga sufikso. Sed Esperanto aplikas logikon sencan jene : se *sen* povas stari nur antaŭ substantiva radiko, sekve ĝi *per si mem*, *aŭtomate*, substantivigas ĉiun nesubstantivon. Tiel ni gajnis la simplajn formojn : *sentima*, *senforta*.

Laŭ la sama, sed ankoraŭ pli kuraĝa metodo estas faritaj la vortoj : *facilanimio*, *sendependio*, *perlaboro*, *porvivo* ktp. Ili evidente ne estas analizeblaj laŭ la ĝeneralaj reguloj. Kiel ni vidis, la fiasko de la regula analizo signifas ĉiam, ke la finaĵo rilatas ne al la lasta, ŝajna ĉefelemento, sed *ĝi mem* estas la ĉefelemento kaj rilatas al ambaŭ ĉefelementoj, kiel al tuto.

Ni vidu nun la suprajn vortojn.

Facilanimio ne estas *animio de facilio*. Sekve ĝi estas (facil-anim)o. *Facil* kaj *anim* disfalas en du

vortojn *facila* kaj *animo*. Facila, kiel adjektivo donas pluan o-finaĵon al la radiko *anim*, krom tiu, kiun ni apartigis ĉe la dua analizo. La analizo do estos : (facila animo)o. Sed *facila animo*, evidente estas *eco*. Do la kategorio-sufikso, kiun la dua o-finaĵo anstataŭas, estas *eco*. Sekve *facilanimo* estas (facila animo)eco : *facilanimeco*.

Sendependo estas sen-depend/o, sekve, ĉar *sen* efikas substantivige, (sen dependo)o. *Esti sen dependo* signifas *econ*, do *sendependo* estas (sen dependo)eco : *sendependeco*.

Perlaboro estas per-labor/o. Do (per laboro)o, do o (per laboro) : *aĵo (akirita) per laboro*.

Porvivo estas por-viv/o, do (por vivo)o, aŭ (por vivi)o : o por vivi, *aĵo por vivi*.

Ĉirkaŭbrako estas ĉirkaŭbrak/o, do (ĉirkaŭ brako)o, *aĵo ĉirkaŭ brako*.

Perlabori estas per-labor/i, do i perlaboro, *akiri perlaboro*.

KLARIGO DE LA INVERSA VORTEFIKO.

Kiel ni vidis, en kelkaj kazoj la vortefiko ne okazas laŭ la ordinara, regula direkto, de dekstre al maldekstre, sed inverse, de maldekstre al dekstre.

La kaŭzon de ĉi tiu escepta maniero de vortefiko ni povas klarigi per tio, ke en la respektivaj vortoj ankaŭ la kunmeto estas escepta. Pli funde analizante ilin, ni rimarkos, ke en ili *ne la ĉefa vorto staras en la fino*. Se ni ŝanĝos la lokon de la du elementoj inter si, tuj validiĝos ankaŭ la ordinara regula vortefiko.

Ekzemple en *grandanima* la akcento ne estas sur la vorto *anima*, sed sur la vorto *granda*. Ni diras per ĝi, ke iu estas karakterizata per io granda (animo) ; same kiel per *herbriĉa* mi diras, ke la kampo estas riĉa (je herbo). Se oni interŝanĝas la du radikojn, oni ricevos : *animgranda* : granda je animo.

Same : grandkuraĝa estas *kuraĝgranda* : granda je kuraĝo. *Senkora* estas kor-sena (sena je koro). *Senforta* estas fort-sena (sena je forto).

Facilanimo : estas animfacilo (facilo de animo). *Sendependo* estas dependseno (seneco, manko de dependo). *Perlaboro* estas labor-peraĵo (peraĵo de laboro). *Porvivo* estas viv-poraĵo (poraĵo de vivo). *Ĉirkaŭbrako* estas brak-ĉirkaŭo (ĉirkaŭaĵo de brako).

En la supraj vortoj de la lingvouzo inversis la sinsekvon de la radikoj, per tio kompreneble inversiĝis ankaŭ la direkto de la vortefiko.

METODOJ DE ANALIZO

La analizon de la vortoj plifaciligas, se ni tenas nin al certa metodo.

Tiu ĉi metodo estas la jena :

I. UNUAGRADA ANALIZO.

1. Analizo laŭ la ĝeneralaj reguloj, sen konsidero pri la gramatika *radikkaraktero* de la ĉefelemento. Do: apliko de la ĝenerala regulo konforma al la gramatika vortkaraktero de la ĉefelemento. Se ĉi tio donas senc-havan rezulton kaj la ĉefelemento estas *samelementa* vorto, la analizo estas finita. Ekzemple : Dormo-ĉambro : ĉambro de dormo ; orhorloĝo : horloĝo el oro ; ŝuistmajstro : ŝuisto majstro (ĝeneralaj reguloj 2. a. R., M., E.). Herbriĉa : riĉa je herbo ; homplena : plena je homo(j) ; prespreta : preta je preso ; drink-ema : ema je drinko ; aminda : inda je amo (ĝenerala regulo 2. b.). Ekiri : eke iri ; ŝtonbati : ŝtone bati ; bonveni : bone veni ; kunveni : veni kunaj ; plenŝtopi : ŝtopi plena ; purigi : igi pura (ĝenerala regulo 2. c.).

2. Se la analizo laŭ la ĝeneralaj reguloj donas senc-havan rezulton, sed la ĉefelemento estas *malsamelementa* vorto, ni kontrolas la analizon per tio, ke ni

apartigas la finaĵon, donas al la ĉefelemento finaĵon konforman al ĝia gramatika radikkaraktero, kaj poste analizas ĉi tiun vorton. Fininte tiun analizon, ni ree kroĉas al la rezulto la finaĵon kun ĝia senco. Ekzemple: *voĉdono* : *voĉdon/o* : (*voĉe doni*)o.

Ĉi tio estas la *kontrola analizo*.

Se dum la kontrola analizo ni ne ricevas senchavan rezulton, la unuagrada analizo nepre validas.

Ĉi tio estas la *unuagrada analizo absoluta*.

Ekzemple : *sangruĝo* estas nepre *ruĝo de sango*, ĉar la kontrola analizo de *sangruĝa* (*ruĝa je sango*) ne havas sencon. Same : *leonkuraĝo*, *ĉielbluo*. *Mondokreo* estas nepre *kreo de mondo*, ĉar *monde krei* ne havas sencon. Same : *voĉdono*, *ĉiopovo*, *scivolo*.

Se dum la kontrola analizo ni havas senchavan rezulton, ekzistas du eblaĵoj :

a. La kontrola analizo *konfirmas* la rezulton de la unuagrada analizo. Ĉi tion ni nomu : *analizo konverĝa*.

Ekzemple : *purigo* estas laŭ la unuagrada analizo *igo de puro*, laŭ la kontrola : (*pura igi*)o. La sencoj samas. *Martelbato* estas *bato de martelo* kaj (*martele bati*)o. Jen preskaŭ la samaj sencoj. *Drinkemo* estas *emo de drinko* kaj (*ema je drinko*)o : *emo je drinko*. Ree la samaj sencoj.

b. La rezulto de la kontrola analizo estas *malsama*. Ĉi tion ni nomu : *diverĝa analizo*. Ekzemple : *prespreto* estas *preto de preso* (unuagrada analizo) kaj (*preta je preso*)o : *preto je preso*. Ĉe analizo diverĝa validas ĉiam la rezulto konforma al la kunteksto.

La kontrola analizo estas propre *analizo duagrada*.

II. DUAGRADA ANALIZO.

Se la unuagrada analizo ne donas senchavan rezulton, tio signifas, ke la *finaĵo* havas memstaran vivon kaj funkcion, oni do devas ĝin rigardi *ĉefelemento*.

Tiaokaze oni apartigas la finaĵon, analizas la duoblan flankelementon, kaj al la rezulto de la analizo kroĉas poste la apartigitan finaĵon.

Mi rimarkigas, ke la senchaveco de la analizo dependas ne nur de la rezulto mem, sed ankaŭ de la postuloj de la kunteksto. Ekzemple: »mi voĉdonis al li mian konsenton« — ĉi tie *voĉdoni* signifas *voĉe doni*; sed en la frazo: »mi voĉdonis por lia elekto« — la analizo *voĉe doni* ne kontentigas, oni devas do apliki analizon duagradan.

Ĉar ĉiokaze *voĉdoni* laŭ la unuagrada analizo ne donas senchavan rezulton (*voĉe doni*, *voĉa doni*), oni do apartigas la i-finaĵon, konstatante la malsamelementecon de *doni*. La unua ŝtupo de la duagrada analizo do estos: voĉ-don/i.

La plua analizo dependas de tio, kiu el la finaĵoj estas la ĉefelemento.

1. I-finaĵo kiel ĉefelemento.

La apartigitan finaĵon oni rilatigas al ambaŭ flankelementoj. Sed, ĉar la verba finaĵo postulas antaŭan adverbbon (ĝenerala regulo 2. c), oni adverbigas la duoblan flankelementon kiel tuton. Nun, adverbbo postulas antaŭan substantivon, la adverbigon oni do povas fari nur tra substantivigo.

Ekzemple: *Voĉdon/i*: (voĉdon)e/i: (voĉdono)e/i.

Nun ni havas substantivan vortkunmeton, analiz-eblan laŭ ĝenerala regulo 2. a. La rezulto do estos: (dono de voĉo)e/i. Per vortoj: *funkcii* (i-finaĵo) *per* (e-finaĵo) *dono de voĉo*.

Same: *leterskribi*: leterskrib/i: (leterskrib)e/i: (leterskribo)e/i: (*skribo de letero*)e/i: *funkcii per skribo de letero*.

2. A-finaĵo kiel ĉefelemento.

Mi ripetu, ke la a-finaĵo ĉiam estas ĉefelemento, se la finvorto de a-finaĵa vortkunmeto estas mal-

samelementa. Ĉi okaze do estas superflue provi la unuagradan analizon.

Ĉe la analizo unue oni rigardu kian gramatikan radikkarakteron havas la lasta elemento antaŭ la finaĵo.

A. Se ĝi estas *substantiva*, ekzistas du eblaĵoj

a. la analizo de la duobla flankelemento donas laŭ la ĝenerala regulo senchavan rezulton. Ĉiokaze ni aplikas la ĝeneralan regulon kaj la analizo estas finita. Ekzemple : *leonkora* : (leonkoro)a : (koro de leono)a : *karakterizita per koro de leono*.

b. la ĝenerala regulo ne estas aplikebla, la duobla flankelemento, apartigite de la a-finaĵo, disfalas en du memstarajn vortojn, kies unua estas adjektivo, aŭ prepozicio : *grandanima* : (granda animo)a ; *senkora* (sen koro)a.

B. Se la lasta elemento antaŭ la a-finaĵo estas *adjektiva*, la duobla flankelemento ĉiam disfalas je du memstaraj elementoj, kies unua estas adjektivo aŭ prepozicio (sen). Ĉi okaze validiĝas la *inversa vortefiko* : la adjektivo, aŭ *sen* substantivigas la duan elementon.

Ekzemple : *senforta* (sen forto)a ; *grandkuraĝa* : (granda kuraĝo)a : *karakterizita de granda kuraĝo*.

C. Se la lasta elemento antaŭ la a-finaĵo estas *verba*, validiĝas la substantiviga efiko de la a-finaĵo. Oni do unue substantivigas la duoblan flankelementon. Poste ĝin oni analizas plu. Ĉe tio estas du eblaĵoj.

a. la duobla flankelemento estas analizebla laŭ ĝenerala regulo 2. c. Ĉiokaze ni aplikas la analizon. Ekzemple : *bonfarta* : bonfart-o/a : (bone farti)o/a : *karakterizata per (a-finaĵo) tio (o-finaĵo), ke li bone fartas*.

b. la duobla flankelemento ne estas analizebla laŭ la verbreefika regulo. Ĉiokaze ni devas analizi ankaŭ ĝin laŭ la respektiva duagrada analizo (vidu

supre : i-finaĵo kiel ĉefelemento). Ekzemple : *voĉdoni*, kiel ni supre vidis, estas : (*dono de voĉo*)e/i. Al ĉi tiu analizo ni kroĉas la a-finaĵon, sed tion ni povas fari nur tra substantivigo (ĝenerala regulo 2. b.). *Voĉdona* do estas (*dono de voĉo*)e-i-o a. Per vortoj : *karaktarizita per* (a-finaĵo) *tio* (o-finaĵo), *ke li funkcias* (i-finaĵo) *per* (e-finaĵo) *dono de voĉo*.

Per tiaj analizoj oni ricevas ĉiam du substantiv-ojn, ligitajn kun la prepozicio *de* (*dono de voĉo*, *volo de scio*, *povo de ĉio*). Ĉar tie ĉi *de* montras la *agon*, kaj la vorto antaŭ *de* montras la objekton de la *ago*, laŭ la *senco* oni povas analizi tiujn ĉi vortojn ankaŭ per participa adjektivo kaj ĝia objekto. Ekzemple : *voĉdona* : donanta voĉon ; *scivola* : volanta scion ; *leter-skriba* : skribanta leteron ; *fruktodona* : donanta fruk-ton ; *ĉiopova* : povanta ĉion ; *memmortiga* : mortig-anta (sin) mem.

3. O-finaĵo kiel ĉefelemento.

Se la unuagrada analizo fiaskis, oni esploras, ĉu la antaŭfinaĵa elemento estas *verba radiko*? Se jes, oni apartigas la finaĵon, kaj faras el la vorto verbfin-ajan kunmeton. Poste oni analizas laŭ ĝenerala regulo 2. c. Post la analizo oni ree substantivigas la rezulton de la analizo.


Ekzemple : *bonfarto* : (bone farti)o ; *purigo* : (pura igi)o ; *martelado* : martele agi)o.

Se la antaŭfinaĵa radiko ne estas verba, aŭ se malgraŭ la verba radiko la unuagrada analizo fiaskis, la duobla flankelemento ĉiam disfalas je du memstaraj vortoj, kiuj (adjektivo aŭ prepozicio) havas inversan vort-efikon, kaj aldonas pluan o-finaĵon al la vorto. Ĉi tiu o-finaĵo estas kategorio-sufikso. La *senco* de la analizo, aŭ la kunteksto klarigas, kiun ĝi anstataŭas el la kategorio-sufiksoj.

Tabelo de Analizo


Unuagrada analizo

(laŭ ĝeneralaĵoj reguloj)



Duagrada analizo

(memstara finajo)



Ekzemple : facilanimo (facilanimeco), sendependendo (sendependeco), senpovo (senpoveco), perlaboro : (aĵo per laboro), porvivo (aĵo por vivi), ĉirkaŭbrako (aĵo ĉirkaŭ brako) ktp.

FINVORTOJ

Tiu ĉi pritraktado ne volis doni detalojn. La tute detala pritrakto de la Esperanta vortfarado kun tre multnombraj ekzemploj, ampleksus dikan libron.

Mia studo ne pretendas esti tute elĉerpa. Certe estas ankoraŭ kelkaj klarigendaĵoj, kiujn mi intence aŭ nevole preterlasis.

Mi volis sole montri, ke en Esperanto la vortkunmeto kaj la finaĵa kaj sufiksa derivoj estas *esence* la samaj. Apenaŭ ekzistas apartaĵo en la derivoj, al kiu oni ne povus trovi analogion ankaŭ en la simpla vortkunmeto.

Kaj mi volis montri, kiajn komplikitajn vojojn oni iras senkonscie dum la kunmeto de vortoj en Esperanto. Kaj jen, ankaŭ en ĉi tio manifestiĝas la mirinda reguleco, sed samtempe ankaŭ la mirinda fleksebleco de la lingvo. Sed por paroli perfekte la lingvon, tute ne necesas, ke oni lernu parkere ĉiujn ĉi regulojn kaj analizmetodojn. Dio gardu ! Ĉi tiuj reguloj resumas nur tiujn leĝojn, laŭ kiuj la mozaikbildoj de la vortelementoj kunmetiĝas en vortbildojn dum skribo aŭ parolo, sen tio, ke ilia kunmetinto konscius pri tio.

Do se vi, kara leganto, dum la lego konfuziĝas kaj rezigne trafolumas la suprajn paĝojn, ne timu, ke vi ne povos scii bone Esperante. Sed, se vi prenos la ne malgrandan penon de ilia trastudo, mire vi rekonos, kiel malfacilajn vojojn vi iradis ĝis nun, ne rimarkante ĝiajn krutaĵojn kaj serpentumadojn.

*La evoluo de nia poezia lingvo**

Esperanto estas logika lingvo. Tio signifas, ke en ĝi mankas ĉiu nenecesa komplikaĵo gramatika, ke la elementoj de la lingvo ligiĝas inter si ne laŭ tradiciaj, ofte kontraŭraciaj reguloj, aŭ kapricoj, sed laŭ la postuloj de la pura logikeco. Tamen oni devas bone distingi ! La logikeco de Esperanto ne estas rigora gramatika logikeco, kiu faras el la lingvo sekan aritmetikon kaj nin devigas pensi kvazaŭ en matematikaj ekvacioj. Ĝi estas logikeco pure senca, esprimanta ĉion laŭ la plej simpla, plej mallonga, plej senpera maniero. Ni vidu ekzemplon.

Forta, certa estas adjektivaj radikoj. *Senforta, sencerta* do estas malĝustaj laŭ la gramatika logiko, ĉar la prepozicio *sen* povas ja rilati sole al substantivo. Do, se ni volas esprimi »estanta sen forto, sen certo«, ni devus antaŭe substantivigi la adjektivojn per speciala, substantiviga sufikso. Tia sufikso en Esperanto ne ekzistas, oni do devus ĝin krei, prunteprenante ekzemple la latinan sufikson *itudo* kaj diri : *senfortituda, sencertituda*. Tio donus belajn, longajn vortojn kaj iom malfaciligus la lingvon, sed almenaŭ estus per-

* Prelego por la Somera Universitato dum la Oxforda Kongreso.

fekta obeo al la gramatika logiko. Nu, sed kion faras la logiko senca ? Ĝi diras : se la prepozicio *sen* povas stari logike nur antaŭ substantivo, tio ja estas tre bonvena, ĉar tiamaniere estas evidente, ke ĝi, per si mem, aŭtomate substantivigas ĉiun nesubstantivon. Ĝi estas do tute egalvalora al speciala substantiviga sufikso. Sekve *senforta*, *sencerta*, aŭtomate, per la vort-efiko de *sen*, alprenas la internan strukturon *sen-forto-a*, *sencerto-a*, kaj ili estas tute bonaj kaj uzindaj vortoj. Do, tiamaniere, kie la gramatika logiko levas averte la lingvon, la senca logiko paŝas kuraĝe antaŭen kaj eĉ la mallogikecon ĝi utiligas por siaj celoj.

Multajn similajn ekzemplojn mi povus ankoraŭ citi, sed tio estas ekster la kadroj de mia hodiaŭa temo. Mi mencias sole la senperan verbigon de substantivoj kaj adjektivoj, ĉi tiun genie naturan solvon, kies elimino estis eble la ĉefa kaŭzo de tio, ke *Ido* mortis jam en la momento de sia naskiĝo. La detala pritrakto de la senca logiko en Esperanto bezonas vastan studon, kaj ĝi ankaŭ meritas ĝin, ĉar ĉi tiu senca logiko estas la fundamento de la mirinda fleksebleco de la lingvo, plejparte al ĝi dankas la artefarita Esperanto sian tute surprizan vivantecon, evidentan taŭgecon por poezio. La vortstrukturo kaj frazkonstruo de Esperanto estas vera arto, ilin oni povus kompari al la impresionismaj pentraĵoj, kie oni ne trovas ŝvite faritan detallaboron, sed larĝajn peniktirojn kaj kuraĝajn kolormakulojn, kiuj tamen fandiĝas en vivefektan, vibrantan harmonion. Ĉi tiu harmonio estas la tiel nomata »spirito« de la lingvo, ĝin oni sentas ĉe la bonaj stilistoj, kies lingvo »vivas«.

Estas evidente, ke ĉi tiu arta efekto, ĉi tiu vibra vivo ne povis naskiĝi el gramatikaj skemoj. Kaj unu el la plej geniaj trovaĵoj de la Majstro estis, ke Esperanton, tuj post ĝia naskiĝo, li fianĉigis al la poezio. Tion li faris jam ankaŭ pri sia unua, preskaŭ infanaĝa

projekto, pri la »Lingwe Universala«, kies preskaŭ solaj postrestaĵoj estas la poemo »Malamikete de las nacjes« kaj traduko el Heine. Li sciis, ke nur la poezio povas spiri vivon en la argilfiguron de la verko, nur ĝi povas fari el grizaj vortoj, enuaj reguloj, sekaj skemoj vere vivan estaĵon, en kiu oni mire rimarkas la pulsbaton de l' vivo. Kaj vere, oni povas diri, ke ne per Esperanto li faris poezion, sed per la poezio li faris Esperanton. Oni povas diri, ke la tuta Esperanto estas poezia lingvo.

»Komence estis la sento,« tiel oni devus komenci la historion de Esperanto. Vi ja scias, ke la Sento naskis la lingvon. Kaj ne la seka scienculo, sed la profundsenta artisto skulptis el la ŝtonmaso de skemoj la statuon de la lingvo, ĉizante kaj glatigante ĝin, ĝis fine, ĝi vive ekmovis sin, kiel iam al Pygmalion. Ĉi tiu artista mano kaj sentema koro faris, ke en Esperanto estas ne nur fleksebleco kaj harmonio, sed ankaŭ varma senpereco, dolĉa aromo, afabla humoro, ĉarma senpretendeco. La ceteraj projektoj sonas apud ĝi, kvazaŭ matematika formulo apud soneto.

Kaj la sento ne nur kreis la lingvon, sed ankaŭ ŝirmis ĝin. La sento, esprimata en poezio, donis al Esperanto tian kuntenan forton, ke oni ĝin povus nomi Esperanta patrioteco. Lingvo kaj sento, jen estas Esperanto. La lingvo vivas en sia literaturo, la sento parolas per poezio. Sen literaturo, sen poezio Esperanto estus muta kaj morta.

La praktikaj utiloj de Esperanto, dank' al la internacia organizo, hodiaŭ jam estas multflankaj. Sed ni devas memori, ke la plej entuziasmajn adeptojn, la pionirojn kaj heroldojn de la lingvo, ne ĉi tiuj praktikaj utiloj ĉenas al Esperanto. Por ili Esperanto ne estas sole rimedo, kaj la Esperanta poezio kaj literaturo ne estas sole ornamo kaj amuzo. Por ili ĝi estas kvazaŭ memcelo, pasio, por kiu oni oferas, tute ne

atendante ian gajnon. Kaj al ilia entuziasmo oni povas danki, ke flanke de la uzantoj de la lingvo, paŝon post paŝo evoluis la juna lingvo, faris siajn infanpaŝojn, ekzercis siajn muskolojn, kaj kuraĝe sin preparas por plenforte kaj grandpove riski la konkuron de la lingvoj.

Ni malgrandnacianoj konas ĉi tiun klopodon, ni lernis, kiel grava estas la literaturo por la vivteno kaj evoluligo de lingvo. Kaj ni devas ne forgesi, ke ankaŭ ĉiuj esperantistoj estas, laŭ sia Esperanta duono, malgrandnacianoj, anoj de plej malgranda lando, Esperantujo, kie ja neniam subiras la suno, sed provizore ĝi ankoraŭ ne lumas por tro multaj milionoj da homoj.

Sed mi ankoraŭ ne tuŝis la demandon, ĉu en Esperanto estas do ebla la evoluo de literaturo, kiu povus havi similan valoron, povus doni similan plezuron, kiel la naciaj literaturoj.

Belsoneco kaj fleksebleco, kiel ni vidis, estas propraj al la lingvo, tiuj du premisoj do ekzistas. Ekzistas krome en la lingvo granda poeziemo, tion atestas la multaj rimistoj, kiuj komencas ĉarpenti versojn, antaŭ ol ili tute ellernis la gramatikon.

Sed ĉio ĉi ne estas sufiĉa. *Anatole France* pro alia motivo rifuzis la rajton de Esperanto por poezio; laŭ li en la naciaj lingvoj la vortoj vekas asociaciojn, rememorojn, kiuj koloras ilin, donas al ili kaŝitan energion, dum en artefarita lingvo la vortoj estas senasociaciaj, sennuancaj, abstraktaj, do ĉia traduko en Esperanto povas esti nur la pala kopio, por ne diri fuŝo de la originalo.

Nu, teorie ĉi tiu rezonado ŝajnas esti vere konvinka, precipe por tiuj, kiuj staras ekster la lingvo. Sed, ekzemploj tion montras, Esperanto estas tamen multe pli kapabla, ol tion oni kredus teorie. Vere, ke en Esperanto, kiel ankaŭ en la naturaj lingvoj, la trad-

ukanto ofte devas kontentiĝi je doloraj kompromisoj. Sed en lertaj manoj la lingvo povas disvolvi fortajn kaj delikatajn efektojn, kaj — jen la plej grava afero — tute forgesigi sian artefaritecon.

Ĉar la Esperantaj vortoj tute ne estas tiel abstraktaj, pendantaj en la aero, kiel oni tion opinius teorie. Unue, la Esperantaj vortoj estas prenitaj el vivanta materialo, por diri komparon, ili ne estas floroj faritaj el papero, sed floroj plantitaj en bedon. Ili daŭrigas tie sian antaŭan vivon kaj ju pli multa fariĝas ilia tero, des pli ili disbranĉos kun riĉaj asociacioj kaj rememoroj.

Poste, ĉar ili estas prenitaj el internacia materialo, jam dekomence ili havas ĉiuj asociaciojn internaciajn. La biblio, la antikva mondo, la ĝenerala moderna kulturo provizas multajn vortojn per nuancoj ĉie senteblaj. En lerta mano ĉi tiuj nuancoj povas havi surprizajn efektojn.

Kaj kio donis la asociaciojn al la nacilingvaj vortoj? La historio, la moroj, sed precipe la literaturo. La sama efiko de la samaj faktoroj estas ja atendebla ankaŭ en Esperanto. La historio de nia movado, la komunaj aspiroj kaj espero, niaj kongresoj, nia publika vivo iom post iom riĉigis kaj riĉigos multajn vortojn per speciale Esperanta kromenhavo. Kaj la efiko de la verkistoj devas ja same manifestiĝi, kiel en la naciaj lingvoj. La tradukoj kvazaŭ perforte trudas al la lingvo konstantan penon, esprimi la ĝis tiam neesprimeblan. Kvazaŭ transfluigata sango en anemiulon, fluas per ili en ĝin novaj esprimformoj, novaj nuancoj, novaj asociacioj. Originaj poetoj kantas, kaj iliaj versoj stampas vortojn per neeviteble aperantaj rememoroj. Komunaj klopodoj ĉaj ekfloranta literaturo, jen la du rimedoj, per kiuj la lingvo akiras egalrajtecon al la naciaj lingvoj.

La evoluo de la poezia lingvo do povas okazi laŭ du vojoj. Per la efiko de la naciaj lingvoj, kaj per si mem, per la libera disvolviĝo de la eblaĵoj en ĝi kaŝataj.

La efiko de la naciaj lingvoj ree manifestiĝas laŭ du vojoj. Unue per la adapto de frapantaj, spicaj esprimformoj, due per la pligrandigo de la Esperanta vorttrezoro (neologismoj).

La adapto de esprimformoj estas komencita jam de Zamenhof, kies »Proverbaro« estas vera trezorejo de tiaj bongustaj diroj, trafaj parolturnoj. Kaj la *Enciklopedia Vortaro* de Wüster kaj la *Plena Vortaro* de SAT montras, kiom da trezoro estas amasigita en la ampleksa verkaro de la Majstro. Bone konante ĉi tiun materialon, kaj ĝuste uzante ĝin, oni povas havi vere koloran kaj vivoplenan, preskaŭ popolan stilon. Kaj la bona stilisto, konscienca tradukanto certe ne kontentiĝas je laŭsenca, skema traduko, sed klopodas reprodukti ankaŭ la stilapartaĵojn, la aromon de la originalo. Kaj por tio li devas uzi antaŭ ĉio la zamenhofajn parolturnojn, se tiaj ekzistas konvenaj. Laŭ mia opinio, ĉi tiu insisto pri la jam ekzistantaj formoj estas tre grava, ĉar nur tiel ili estos ofte renkontataj en nia literaturo, kaj transiras en la publikan scion kaj uzon, farante pli natura, pli vivaspekta la lingvon. Kaj tial ĉiu tradukanto-kandidato, antaŭ ol entrepreni laboron, sed ankaŭ ĉiu originala verkonto devas funde koni almenaŭ ĉi tiun trezoron. Nun ĝi jam estas grandparte registrita ankaŭ en vortaroj, do estas facile alirebla por ĉiuj. Kaj tre verŝajne baldaŭ sekvos ankaŭ la registro de la parolturnoj de Grabowski kaj Kabe. Sed propre oni devus traserĉi la tutan Esperantan literaturon por tiaj parolturnoj, taksi ilin laŭ valoro, akordigi la samsencajn, nur tiel estos eble, ke ĉiuj lingvoj kunlaboru en la kreo de la vere esprimriĉa, grandioze esprimkapabla poezia lingvo Esperanta.

Kaj la recenzistoj devas gardi ĉi tiun esprimkapablon de la lingvo. La tradukojn kaj originalaĵojn oni devus fine recenzi ne nur laŭ la gramatika korekteco — gramatike nekorektajn oni simple ne devus recenzi, sole averti la legantojn kontraŭ ilia aĉeto kaj lego — sed ankaŭ laŭ la kolorvaloro. Oni mallaŭdu la sekan, sensukan stilon, oni menciu la spicajn esprimojn, oni laboru konscie kaj konsekvence pri la evoluo de la lingvo.

La alia vojo estas la pligrandigo de la Esperanta vorttrezoro, la tiel nomataj neologismoj. Tre delikata temo !

Rilate ilin la esperantistojn oni povas dividi en du grupojn, en propagandistojn kaj literaturistojn.

La propagandisto volas facilan Esperanton, kiun li povus verŝi rapide, per tute eta funelo, en la kapon de ĉiu homo. Li estus plej feliĉa, se la lingvo konsistus el ducent vortoj, se oni povus skribi sur poŝtkarton la tutan gramatikon, kaj la tutan vortaron, kun la Himno. Li estus tre kontenta, se post sessemajna kurso ĉiu parolus flue kaj komprenus sen vortaro la kolektitajn verkojn de Shakespeare, Dickens, Wells kaj Shaw.

La literaturisto volas riĉan lingvon, volas havi apartan vorton per ĉiu vorto de sia nacia lingvo, apartan vorton por ĉiu nuanco, laŭeble radikvorton, ĉar la vortojn tro derivitajn kaj kunmetitajn li sentas artefaritaj, malfortaj, senkoloraj. La poeto volas multajn, tre multajn vortojn, por raketi per ili, por trovi per ili freŝajn, neuzitajn rimojn. La poemtradukisto abomenas la kunmetaĵojn, ĉar ili estas tro longaj, malhelpas lin en lia vetkuro por mallongo. Ili efektive havas sopiron je la tuta indogermana vort-trezoro kaj amare envidas la kvardek mil vortojn de la feliĉa Shakespeare.

Tiuj du antipodoj, vere, akre batalas inter si, de kiam ekzistas la lingvo. La unuaj riproĉas, ke la neo-

logismoj malfaciligas, konfuzas, kaj fine pereigos la lingvon, argumentas per la orientanoj, kiuj ne konas la vortojn pruntitajn el la Europaj lingvoj. La duaj riproĉas, ke la konservativa partio volas ŝtonigi la lingvon, bari ĝian evoluon, trudi al ĝi malriĉon kaj senornaman simplecon.

Kiel oni povus decidi en ĉi tiu kverelo, por doni pravon al ambaŭ partioj? Ĉar finfine, el siaj propraj vidpunktoj, ili ja ambaŭ estas pravaĵ.

Se la esperantistoj estas pri io en embaraso, ili plej ĝuste agas, turnante sin al la ekzemplo de la Majstro. Ni rigardu do, kiel li, certe la plej grand-skala propagandisto kaj literaturisto en la sama persono, solvis ĉi tiun dilemon?

Lia solvo ja estas konata. Li donis la trunkon de la lingvo en la Universala Vortaro de la Fundamento. Per tio li fiksas la vortprovizon vulgaran, kiel eble plej striktan, sed nepre necesan por ĉiu esperantisto. Kaj, poste, tiel trankviliĝinte pri la unueco kaj neŝanĝebleco de la lingvokerno, kiel literaturisto li tute ne avaris pri la kreo kaj liberala akcepto de novaj radikoj, tiel kela Zamenhofa radikaro de Wŭster enhavas proksimume du milojn da ili, ĝis nun ne oficialigitajn.

Kion ni lernas el ĉi tiu ekzemplo? Devas ekzisti limita vortprovizo, la *trunko* de la lingvo. Ĉiu, kiu volas uzi la lingvon nur por ĉiutagaj bezonoj, devas koni ĉi tiun lingvo-trunkon, sed ne bezonas nepre koni pli multe. Ĉiu, kiu volas esti certa pri tio, ke oni lin komprenos, devas uzi nur ĉi tiun trunkan vortprovizon, alie li riskas nekomprenon. Sekve, ĉiuj lernolibroj devas enhavi ĉi tiun vortprovizon, sed nenion pli.

Kaj ĉi tiu principo tute ne estas speciale kaj ekskluzive Esperanta, tute la saman ni trovas ankaŭ en la lerno de naciaj lingvoj. Ja en ĉiu natura lingvo oni povas distingi ĉi tiun vulgaran vortprovizon, konsis-

tantan el la ĉiutage uzataj vortoj. Ĝin enhavas la bonaj lernolibroj, post ĝia funda ellerno, oni jam povas kompreni kaj sin komprenigi, eĉ flue interparoli kaj korespondi pri ordinaraj temoj. Kaj se iu per sia gepatra lingvo parolas al fremdulo, li ja instinkte parolas »pli simple«, t. e. li uzas nur ĉi tiun vortprovizon. Sed certe neniu pretendas, sciante sole ĝin, kompreni senmanke la literaturajn ĉefverkojn de la respektiva lingvo, ĉiu, tute kompreneble, konsultas por tio bonan vortaron, kaj tiel, dum lego, iom post iom li kompletigas sian lingvokonon.

Kio nun estas ĉi tiu trunka vortprovizo de Esperanto? Nu, ĝi ne estas tute konforma al la Fundamenta Vortaro. Ĝi estas parte pli, parte malpli. En la Fundamento ja ekzistas vortoj, kiujn oni preskaŭ neniam uzas en la ĉiutaga vivo, aliparte multaj, de tiam oficialigitaj vortoj penetris la vulgaran lingvon. Kaj certe oni devus ankoraŭ zorge konsideri, ĉu oni ne bezonus ankoraŭ kelkajn vortojn pli simplajn por la esprimoj de la ĉiutaga vivo, kiuj nepre kreiĝus inter homoj parolantaj ekskluzive Esperanton. Mi estas ekzemple certa, ke ili ekĝojus pri la esprimoj : *ascendi* kaj *descendi*, anstataŭ envagoniĝi kaj elvagoniĝi, ensipiĝi kaj eksipiĝi, surkaleŝiĝi kaj dekaleŝiĝi ktp.

Cetere la Akademio jam komencis fari distingon inter la literatura kaj vulgara vortprovizoj. En la lasta eldono de la Oficiala Vortaro, la lastan ĝi presigis per kurzivaj literoj. Laŭ mia **opinio** tre oportune kaj necese estus meti ĉi tiun distingon ankoraŭ pli evidente, kaj por tio eble eldoni la zorge konsideritan *vulgaran*, aŭ *lernolibran vortprovizon* en tute aparta broŝuro. Per tio la vortaro de la lernolibroj fariĝus tute unueca, kaj ĉiu povus certe scii, kian vortkonon oni povas supozi pri iu, kiu ĉerpis sian konon sole el lernolibro, kaj kiun mi nomus »elementa esperantisto«.

Kaj per tio la Akademio povus ankaŭ liberiĝi

de la timo, ke la lingvo fariĝas tro malfacila kaj fine
dronos en la embaraso de riĉeco. Ĝis nun, vere, nenia
diferenco ekzistas inter la oficialaj vortoj, kaj eble sole
la esperantologoj scias, kiu vorto estas fundamenta,
kaj kiu apartenas al la oficialaj aldonoj. Tute kom-
prenebla estas do, ke la Akademio ne volas senlime
pliampleksigi la *trunkon* de la lingvo. Sed apartiginte
ĉi tiun trunkon, ĝi tuj havos pli liberan manon, kaj
ne plu devos sin reteni eĉ de la oficialigo de la
Zamenhofaj vortoj, ne parolante pri la Kabe-aj kaj
Grabowskijaj kaj tute ofte uzataj vortoj.

Ĉar ĉi tiu sinreteno havas ankaŭ malbonajn
flankojn. Unue, ĝi vekas ian revoluciemon en la verk-
istoj. Oni rezonadas jene : se eĉ la vortoj iniciatitaj de
Zamenhof kaj Grabowski kaj sufiĉe ofte renkonteblaj
en la literaturo ne estas aprobitaj de la Akademio,
ĉu povas al mi gravi ĝia malaprobo ? Certe tre erara
rezonado, sed mi aŭdis ĝin per propraj oreloj. Due,
ofte ekzistas tre bona, kaj ankaŭ necesa vorto por io,
sed oni faras novan, ĉar oni ne konas la malnovan
kaj ĝustan. Per tio estiĝas tiaj du formoj de la sama
vorto, kiel ekzemple *konkeri* kaj *konkiri*.

Sed mi tute deflankiĝis de mia temo. Mi resumas.

La esperanta literaturo nerezisteble kunportas la
riĉiĝon de la vortprovizo. Ĝi kreas novajn radikvortojn
anstataŭ kunmetaĵoj, novajn vortojn por mankantaj
esprimoj de nuancoj. Se oni apartigas la *vulgaran*, aŭ
lernolibran vortprovizon, tute ne estos plu danĝera la
liberala oficialigo de ĉi tiuj novaj vortoj, precipe, se
oni markas per speciala signo, ke ili estas *poeziaj*
vortoj.

Tiajn poeziajn vortojn ja havas ĉiu nacia lingvo.
Oni uzas ilin nur en poemoj, aŭ en la »alta« prozo.
Oni fariĝus ridinda, uzante ilin en la ĉiutaga parolo.
Do, ankaŭ en Esperanto neniuj parolas jene : »Amara
sentimento obsedis mian sinon«, aŭ »mi aklame kun-

jubilos vian nuptan festregalon«, aŭ, »li ĉronis en la abismoj de la ĉagreno«, aŭ, »ŝi apertis la kluzojn de inunda ploro«. Sed ĉiuj ĉi vortoj estas nepre necesaj en poezio, ĉar neniu alia vorto povas anstataŭi ilin kun plena signifo kaj esprimforto.

Ni rigardu nun, kiaj motivoj gvidas la literaturistojn por krei aŭ uzi vorton novan?

Unue, ili volas eviti la tro komplikajn, artefaritajn, kaj pezajn kunmetaĵojn. Tiaj vortoj, precipe se ili estas ofte uzataj, faras la lingvaĵon peza kaj forturnas la atenton de la verko mem. Antaŭ longe mi legis tre bonan tradukon de interesa verko, plenan de artifikaj kunmetaĵoj, kiuj tre lerte esprimis delikatajn nuancojn, kaj plejparte estis vere spritaj. Plezure mi analizis ilin tra la tuta verko, kaj je la fino mi rimarkis, ke mi — tute ne scias, pri kio en ĝi temas. Mi asertas, ke dum la lego pli ĝenas tia vortkunmeto, ol nova vorto, kiun oni ĉivenas el la kunteksto.

Kaj tion bone sentis ankaŭ Zamenhof. Jen ekzemple kelkaj zamenhofaj, ne fundamentaj vortoj, kiujn ne naskis nepre neceso, per kiuj la Majstro volis nur eviti kunmetaĵojn kaj derivaĵojn. *Abismo* anstataŭ profundegaĵo, *ferio* anst. libertempo, *giganto* anst. grandegulo, *kalva* anst. senhara, *festono* anst. florplektaĵo, *karambolo* anst. kunpuŝiĝo, *angoro* anst. korpemiteco, *aŭroro* anst. tagiĝo, *sino* anst. trunkantaŭo.

Poste, jam ĉe Zamenhof, sed ankoraŭ plie ĉe Grabowski, oni vidas certan tendencon por la iompostio ma pliigo de la malvortoj. Ĉe Zamenhof *stulta* anst. malsprita, *aflikti* anst. malĝojigi, *milda* anst. malsovaĝa, ĉe Grabowski *humida* anst. malseka, *aperti* anst. malfermi, *disipi* anst. malŝpari, *noci* anst. malutili, *fora* anst. malproksima, *neglekti* anst. malzorgi montras ekzemple ĉi tiun tendencon.

Oni do devas ne miri, ke tiuj tendencoj daŭras plu en la lingvo, kaj aperas *stumbli* anst. falpuŝiĝi,

langvoro anst. animmalstreĉiĝo, *nupto* anstataŭ geiĝo, *svelta* anstataŭ gracitalia, *rara* anstataŭ malofta, *aŭdaca* anst. riskemega, eĉ, lastatempe, *trista* anst. malĝoja.

Sed kompreneble, ĉi tiun evoluon oni devas iel bridi. Unua regulo : ĉiu oficiala radiko estas neŝanĝebla. Dua regulo : novajn vortojn enkonduku nur, kiu funde konas la lingvon, konas lingvojn krom la sia, havas viglan lingvosenton, senton pri la gusto de Esperanto kaj ĉion ĉi li pravas per valora verko originala, aŭ tradukita, kiu lin montras majstro de la lingvo. Tia verkisto certe konscias sian respondecon kaj je neologismo sin decidigas nur post fundaj konsideroj, konsulto de ĉiuj bonaj vortaroj, do en okazo de nepra arta neceso. Aliparte, oni devas allasi, ke ĉi tiu arta neceso estas pli larĝa, ol la neceso pure lingva.

Kompreneble neniuj povas garantii, ke la kreon de nova vorto riskos sole la supre karakterizitaj lingvaj kaj artaj kompetentuloj, kaj certe ĉiam estos esperantistoj, kiuj sen funda kono de la lingvo kaj de ĝia vortmaterialo, simple prenas nacian, aŭ latinan radikon, anstataŭ multe cerbumi kaj esplori pri ekzistanta taŭga esprimo. Sed tio tute ne estas danĝera. Ĉiu tia nekompetenta fuŝo ja estas naskita morto, ĉar la sorto de neologismo dependas ja de la aŭtoritato de la verkisto, kiu ĝin proponas, kaj de la valoro de la verko, en kiu ĝin oni proponas.

Uzante novan vorton, oni kompreneble estas elmetita al la danĝero, ke la leganto ne komprenos lin. Tial, la verkisto, en sia propra intereso, devas kolekti en tabelo ĉiujn uzitajn neoficialajn vortojn kaj klarigi ilin per la oficiala vortmaterialo. La eldonistoj de libroj devus insisti pri tiaj vortklarigoj, se la verkinto neglektus tiun ĉi devon. Ĉi tiuj vortklarigoj faciligas ankaŭ la orientiĝon de la Akademio rilate al la nove

aperantaj radikoj kaj rilate al la uzateco de la pli malnovaj neologismoj.

La ĝis nun pritraktitaj du ebloj de evoluo do konsistas el prunto el fremdaj fontoj : el la grandaj naturaj lingvoj, el la patrinlingvoj de Esperanto. Sed ne malpli grava estas la evoluo spontanea de la poezia lingvo, konsistanta el la libera kaj kuraĝa utiligo de ĉiuj eblaĵoj kiuj sin kaŝas en la strukturo de la lingvo, en ĝia granda fleksebleco.

Ni jam menciis, kiel devenis ĉi tiu fleksebleco el la poezia sento de la Majstro. Sed ĉe li la lingvo ankoraŭ ne disfalis ĉiujn siajn eblaĵojn, eble la naciaj lingvokutimoj retenis la Majstron de ilia tute libera fruktuzo. La granda artisto de la fleksebleco, la kuraĝa tornisto de la poezia lingvo estis Grabowski, precipe en sia »Sinjoro Tadeo«, kiu ĝerme enhavas eble ĉion, kion oni povas elsorĉi el la lingvo.

Ĉi tiu poezia traduko estas ĝis nun la plej granda fortostreĉo en Esperanto. Ĝi devigis la talenton de la tradukinto por la plej granda koncizo de stilo, por formoj frapante mallongaj, kuraĝaj, kelkfoje tro kuraĝaj, sed ĝuste per ilia kuraĝo elegantaj kaj surprize interesaj. Bedaŭrinde la traduko ne estas ĝenerale konata, kvankam ĝi devus esti pritraktata en ĉiu supera kurso, studata de ĉiu poemtradukisto. Nur per la lingvaj konkeraĵoj amasigitaj en ĉi tiu verko nia poezia lingvo povas akiri tian kapablon, ke ĝi povu sukcese ataki tiajn literaturajn ĉefverkojn, kiaj ekzemple la Komedio de Dante, la Faŭst de Goethe, aŭ la tragedioj de Shakespeare.

En ĉi tiu verko triumfas vere tiu kuraĝa kaj eleganta formo de stilo, kiun mi supre komparis al la impresionisma pentromaniero. Ni vidu kelkajn principojn, laŭ kiuj laboris tiu ĉi majstro de koncizo.

1. Plej libera kaj kuraĝa verbigo de substantivoj. Ekzemple : *skandali iun* (indignigi per skan-

ĉalo), *patri al iu* (senti kiel patro) *mastrini* la domon, *sabri* la malamikojn, *jam tempas* (estas tempo) tion diri.

2. Senpera verbigo de adjektivoj : *sobri*, *prudenti*, *juni*, *preti*, *pali*, *modesti*, *forti* (apenaŭ mi fortas por diri), *alii* (esti alia) ol.

3. Senpera verbigo de participoj, kiuj ja ankaŭ estas adjektivoj *malpermesitas*, *nomatis*, *laŭdatu*.

4. La uzo de *as* anstataŭ estas : *en kastel' 'as vestiblo*, *mastro' as fore*, *stelo' as turnita*, *por li la mond' 'as malfermita*.

5. La uzo de *ĉi* anstataŭ *ĉi tiu* : *ĉi homo* ; *ĉi pafas*, *tiu ŝargas*.

6. La plej impresionisma uzo de *for* : *for mil paŝojn*, *plej for de la sojlo*, *pli for ili ŝiris florojn*.

7. Kuraĝa preterlaso de sufiksoj : *aperto*, *vostresto*, *polvotreno* (trenaĵo), *rulo* (rulaĵo), *volvo* (volvaĵo), *ĉebrusto*, *senplano*, *vastaro*.

8. Kuragaj vortkunmetoj : *kartaŭguri*, *vortresumi*, *ĝisiri domon*, *penaŭdebla* parolo, *korsenti* iun, *frukt-uzi* sian ĉefurban edukon, *loksidi* ie, *lastfasoni* veston.

9. Apostrofado de aŭ-finaĵaj adverboj : *anstat'*, *presk'*.

10. Ellaso de *da* antaŭ *tiom* kaj *kiom* : *kiom homoj* ; *tiom stultaĵoj*.

11. La plej larĝa kaj vastsenca uzo de la adverboj, tiel, ke la e-finaĵo post substantiva radikoj formas kvazaŭ novan kazon, specon de ablativo, anstataŭante la plej diversajn prepoziciojn. Ekzemple : *stariĝi postpiede*, *frontpiede* (sur) ; *okule manĝi*, *okule vagi kampojn*, *time obsedi*, *minaci amasbuĉe*, *varmiĝi sune*, (per) ; *tio gravas vilaĝe*, *ŝi forestas ĝardene*, *baniĝi sable* (en) ; *kreske modesti*, *aĝe matura*, *aĝe progresinta*, (je) ; *tombe ĵuri venĝon*, *halti fine de ĉiu strofo* (ĉe) ; *emigi iun pace* (por) ; *tempeste forlasis la ŝipo*

havenon ; *ĉase li kaŝas la pafilon*, *june li multe veturadis* (dum). Aliaj uzoj de adverbo : *memkomprene* (memkompreneble), *barelringe vasta ĉapelo* (kvazaŭ barelringo), *stati al iu parence* (kiel parenco) ; *preskaŭ fali kadavre* (kiel kadavro) ; *fali kape suben*, *batiĝi derande alrande* ; *prenu min file* (kiel filon) ; *la botelo falis fund-alsupre* ; *volnevole* ; *detranslime*. Tre interesa estas la esprimo *evite homlaŭdon* (evitante), ĉar ĝi estas plilarĝigo de la principo, laŭ kiu oni faris la formojn : *rilate tion*, *koncerne min*, *spite ĉion*. Oni kvazaŭ estas tentata deklari la regulon, ke ĉiun verban adverbbon oni povas rigardi prepozicio, postulanta post si akuzativon.

Ĉiuj ĉi kuraĝaj, sed vere elegantaj kaj neniam malklaraj formoj donis tiom de koncizo al la lingvo de Grabowski, ke li povis traduki la epopeon senmanke, ke li ne devis kontentiĝi je skiza traduko, je simpligita, senspicipigita varianto, kio, pro la relativa longemo de Esperanto, minacas ĉiun poemtradukanton. Kaj estas interese, kiel vive kaj nature impresas ĉi tiuj formoj ; ties kaŭzo estas, ke ili estas tute naturaj ĝermoj de la lingvo, ĉar ili devenas el ĝia strukturo kaj karaktero, el la principo de »neceso kaj sufiĉo«.

En la traduko de »Sinjoro Tadeo« krome ni trovas ankoraŭ ion, kio estas tre granda helpo por mallongo, sed, laŭ mia opinio, estas kontraŭ la spirito de la lingvo, ĉi tio estas la kunfando de la substantivo kun ĝia adjektivo. Tiajn formojn oni trovas tie abunde. Jen, ekzemple : novinformo, bel-poto, glat-haroj, tut-arbaro, nov-najbarino, fremdlibroj, kuraĝ-okulo, jun-porkoj, fermit-okulo, fort-emocio ktp. ktp. Ĉi tiuj formoj invadis de tiam la tutan Esperantan poezion, kie svarmas la formoj *bel-knabino*, *bon-amiko*, eĉ en iu traduko oni konstante trovas la vorton *Kardio*, anstataŭ *kara Dio*.

Kial oni sentas ĉi tiujn formojn strangaj, nena-

turaj? Ĉar, laŭ mia opinio, la ĉefa regulo de la Esperanta vortkunmeto estas, ke en kunmetita vorto fina substantivo ĉiam postulas antaŭ si substantivon, kaj se la antaŭa radiko ne estus substantiva, ĝi aŭtomate substantiviĝas per la vort-reefiko de la poste staranta substantiva radiko. *Fortpotenco* estas ne forta potenco, sed potenco de forto, *belscienco* estas ne bela scienco, sed scienco de belo, *varmradio* estas ne varma radio, sed radio de varmo.

Tre longe daŭrus, se mi nun volus ekspliki ĉi tiun principon en ĝia tuta amplekso, tio ja bezonus apartan, longan prelegon.* Mi apelacias nun sole je via lingva sento, kiu certe protestas kontraŭ la vortoj: amatpatrino, eminent-oratoro, diligent-knabo.

Kiel estas eble tamen, ke tia artisto de la lingvo, kia estis Grabowski, delogiĝis al la uzo de tiaj vortkunmetoj? Nu, laŭ mia opinio, li intencis fari per tiuj ĉi formoj kaŝatan revolucion en la poezia lingvo Esperanta, ĉar ja tiuj ĉi kunmetoj estas nenio alia, ol — *la maskita elizio de adjektiva finaĵo*.

Ĉi tiun supozon apogas, ke kelkloke li tute demetis la maskon, kaj li skribis tute sincere: *kelk vilaĝojn, mult homojn*, eliziante la a-finaĵon, kaj montrante la adjektivecon de la vorto per tio, ke li *ne metis apostrofon* anstataŭ la eliziita finaĵo.

Se oni konsekvence ellaboras ĉi tiun revolucion novajan, oni venus al la sekvantaj reguloj.

En poezio oni povas elizii:

1. La o-finaĵon de la substantivoj, markante la elizion per apostrofo. La elizio ne aliigas la lokon de la akcento.

2. La a-finaĵon de la adjektivoj, eble nur en tiu okazo, se ili estas ankaŭ radike adjektivaj. La elizion oni *ne* markas per apostrofo. La unusilabaj adjektivoj

* Vidu en ĉi tiu volumo *Esperanta vortfarado*.

per la elizio tute perdas sian akcenton, oni do diras : bel homo, grand arbo. La plursilabaj adjektivoj havus la akcenton sur la antaŭlasta silabo, kvazaŭ la finaĵo tute ne ekzistus, oni do dirus : diligent knabo, sincer koro. Per tio ni havus la saman akcentmanieron, kvazaŭ ni kunfandus la adjektivon kun la substantivo: diligentknabo, sincerkoro.

3. La aŭ-finaĵon de la adverboj : presk', anstat', apen'. La akcento ne aliĝas.

Per ĉi tiu novaĵo do triumfe enirus en la poezian lingvon la forlaso de la a-finaĵo, ĝis nun renkontata sole en la poemoj de komencantaj, aŭ malbonaj poetoj. Ĉu oni rekomendu tion ?

Nu, ĝi certe estus grava gajno. Sed ĝi estas tro granda novaĵo, por ke ĝi povu esti trudata de sola persono. Mi, en miaj tradukoj versaj, ĝis nun ne povis min decidigi por tiu ĉi licenco. Sed, se la invado de la supraĵ adjektiv-substantivaj kunmetoj plu progresos, kaj tiel en la lingvo pli kaj pli amasiĝos tiaj formoj, kiuj, laŭ mia opinio estas tute kontraŭaj al la fundamenta spirito de la vortkonstruo, oni fine tamen devos formeti la maskon, kaj transiri al la sincera elizio de la a-finaĵo.

Se jam tiel longe mi parolis pri ĉi tiu »muziko de estonteco«, mi volas menci i ankaŭ alian novaĵon, malpli revolucion, kiu eble iam enradikiĝos en la poezia lingvo.

Ĉiu Esperanta poeto kun granda ĝojo, preskaŭ kun dankemo pensas pri la vorteto *for*, kiu, kiel verba prefikso, jen gluiĝas al la verbo, jen staras aparte, ofte tute malproksime, kaj per sia moviĝemo vere aminde faciligas la meton de ĝusta ritmo.

Nu, en la poemtraduko de tre bona esperantisto mi legis :

»El kampoj ili iris al siaj hejmoj *re.*«

Mi konsterniĝis ! Jen, kiel simple kaj kuraĝe ! Kvazaŭ la ovo de Kolumbo. Vere, laŭ mia scio, nenia fundamenta regulo ekzistas, kiu donacus ĉi tiun moviĝemon sole al la vorteto *for*, kaj rigore rifuzus ĝin al la aliaj verbaj prefiksoj : ek, dis kaj re. Ĉu oni do ne povus diri :

»Irante ek, mi turnis mian kapon.«

»La mon' ruliĝis sur la planko dis.«

»Atendo vana, li ne venis re.«

Kaj eĉ la prefikse uzatajn prepoziciojn oni povus tiel apartigi de la verbo. Sed ĉi okaze oni devus bone atenti, ke la prepozicion ne sekvu substantivo, ĉar tiamaniere oni riskas miskomprenon, aŭ almenaŭ momentan konfuzon de la aŭskultanto. Ekzemple :

»Venu en, de longe mi atendas vin.«

ĉi tie estas nenio danĝero de konfuzo. Sed

»Rigardu en, la ĉambro malpleniĝis jam.«

ĉi tie la aŭskultanto, almenaŭ dum momento, povas esti konfuza pri tio, ĉu la prepozicio *en* apartenas prefikse al la vorto *venu*, aŭ prepozicie al la vorto *ĉambro*.

Kian utilon alportus ĉi tiu apartigo de prefiksoj verbaj, laŭ la germana kaj angla maniero ? Unue, ĝi faciligus la ritmigon de la versoj, due, ĝi donus al ni eblojn de novaj rimoj, kaj — eblojn de rimoj viraj, je kiuj Esperanto estas vere tre malriĉa.

Mi volas ree deklari, ke mi tute ne intencis fari propagandon por tiuj ĉi novaĵoj, precipe por la unua : por la elizio de la adjektiva finaĵo. Ĝis nun neniam mi aplikis ilin en miaj poemoj, eĉ, mi ĉiam zorge evitis la kunfandon de adjektivo kun substantivo. Mi sole registras, ke ekzistas tiaj tendencoj en la poezia lingvo. Kaj oni jam aŭdis voĉojn en Esperantujo, ke

la Esperanta poezia lingvo, tiel, kiel ĝi nun ekzistas, ne estas kapabla konkeri ĉiujn grandajn ĉefverkojn poeziajn de la naciaj literaturoj, kaj precipe kun la unusilaba angla lingvo ĝi ne povas konkuri je mallongo. Nu, kvankam la kapablo de la lingvo multe dependas de ĝia uzanto, oni devas konfesi, ke en ĉi tiu parolo estas io vera. Tial ni ja klopodas por la plua evoluigo de la lingvo poezia. Kaj ne estas maleble, ke ĉi tiu evoluo prenos direkton al la elizio de la adjektivaj finaĵoj. Laŭ mia opinio, antaŭsigno de tio estas la pli kaj pli ofta kunfando de la adjektivo kun sia substantivo; ĉar se oni jam kutimiĝis al tio ĉi, la elizio de la adjektiva finaĵo ne plu estos io nova, ĝi estos sole sincera konfeso de maskita kulpo.

Kompreneble, ĉiuj ĉi novaĵoj, eĉ se ili ekradiĝos en la lingvo, devos esti rezervitaj por la lingvo poezia. La prozan kaj ĉiutagan lingvon ja ne penetris eĉ la elizio de la o-finaĵo, oni ĝin uzas eble sole en la esprimoj *dank' al tio, dank' al Dio*.

Sed, ĉu ne estus danĝere tiel apartigi la lingvojn poezian kaj vulgaran? Laŭ mia opinio, tute ne.

Ĉar inter la du lingvoj ja tute ne estas esenca diferenco. La pli riĉa vortprovizo estas sole diferenco kvanta, ekzistanta en ĉiu nacia lingvo. Kaj ankaŭ la elizioj estas tute natura apartaĵo, abunde floranta ekzemple en la itala poezia lingvo.

En la proza lingvo la enradikiĝon de la elizioj malhelpas tio, ke la senfinaĵaj vortoj estas evidente malpli facile kompreneblaj, precipe ĉe ne tute klara elparolo. Kaj Esperanto, kiu estas nenies gepatra lingvo, ĉiam devas kalkuli je granda nombro de komencantoj, aŭ eternaj komencantoj. La finaĵoj akre distranĉas la vortojn, kaj kvazaŭ klarige atentigas post ĉiu vorto: rigardu, jen estas substantivo, jen estas adjektivo, jen estas adverbo. Guste pro tio estas

Esperanto la plej kara lingvo, pro tio ĝi estas ekzemple tiel bonege komprenebla en la radio. Multajn naciajn lingvojn ne povas tie kompreni eĉ tiu, kiu bone parolas ilin, dum la bone prononcitan Esperantan tekston povas laŭlitere ripeti eĉ tiu, kiu ne konas la lingvon.

Jen kio estas unu el la plej grandaj avantaĝoj de Esperanto, ĝia granda klareco. Kaj tiun ĉi bezonon malatentis la aŭtoro de la lingvo *Occidental*. Li kondamnas inter aliaj en Esperanto ĝuste tiun ĉi grandan avantaĝon, la konstantajn finaĵojn, dirante ilin nenaturaj, pezaj, misformantaj la vortojn. Kaj li faris lingvon, kiu tre bele kaj nature aspektas skribe, sed kiu parole sonas, kvazaŭ Esperanta teksto, en kiu oni zorge eliziis ĉiujn finaĵojn.

Nu, oni ne povas garantii, ke en Esperanto iam ne ekzistos tia verslinio, en kiu mankos ĉiu substantiva kaj adjektiva finaĵo, en kiu do la aŭtoro de *Occidental* ĝoje povos saluti preskaŭ tian naturecon kaj senpezecon, pri kia li fieras en sia lingvo. Sed tiu ĉi poemo estus ja poemo, parolanta sole al pli progresintaj esperantistoj, kies oreloj ekzercitaj kutimiĝis al la elizioj, dum la elementaj esperantistoj povus plu ĝoji pri la finaĵoj, kiuj ĉe ĉiu vorto kvazaŭ per dorso-bato atentigas ilin pri la gramatika karaktero de la vorto.

Tiel la elizioj donus la eblon de la granda konciziĝo, aŭ, laŭ la aŭtoro de *Occidental*, naturiĝo de la lingvo poezia, ne forprenante tamen la klarecon de la ĉiutaga, vulgara lingvo, kiu estas unu el la plej grandaj avantaĝoj de Esperanto. Ili estus rezervitaj por tiuj, kies lingva kono jam maturiĝis por havi per Esperanto similajn artajn plezurojn, kiel per sia gepatra lingvo, do por la elito de l' esperantistaro, por kiu propre verkas la poetoj kaj verkistoj. Ĉar verki konstante por homoj, kies lingva scio staras sur ler-

nolibra nivelo, tio signifas : rezigni pri ĉiu pli alta arta klopodo.

Eble mi sukcesis al vi montri, kiel riĉajn perspektivojn havas antaŭ si la poezia kaj literatura lingvo Esperanta, per la mirinda strukturo de la lingvo kaj per la fakto, ke ĝia evoluo okazas tute laŭ la maniero de la naturaj lingvoj. Sed por la evoluo de la Esperanta literatura lingvo oni bezonas ankoraŭ ion tre gravan, kion mi apenaŭ tuŝis ĝis nun, la *unuecon de la stilo simpla*. Tre grave estas emfazi ĉi tion, ĉar multaj, eĉ eminentaj esperantistoj ne konscias ankoraŭ sufiĉe ĝian gravecon.

Kion signifas ĉi tiu unueco de stilo ? Ĝi signifas simpan, ĝeneralan stilon, *kanvason*, sur kiu oni povas brodi. Ĝi signifas, ke la t. n. spirito de Esperanto, trovebla en la verkoj de la plej bonaj Esperantostilistoj, regu ĝenerale, kaj oni ne havu en Esperanto apartajn stilojn anglan, francan, germanan, rusan, ktp. Ĉiu, kiu aspiras verkistajn laŭrojn, devas nepre disponi pri ĉi tiu stilo ; ĉiu, kiu volas vere ĝui Esperantan literaturon, devas rimarki ĉiun deflankiĝon de ĉi tiu stilo. Ĉar, se okazas tia deflankiĝo, *tio devas signifon*. Ne tion, ke la aŭtoro estas anglo, aŭ japano, nek tion, ke li estas komencanto, aŭ eterna komencanto, sed ian nuancon, kiun ano de ĉiu ajn nacio esprimus Esperante per la sama stilapartaĵo. Nur tiamaniere estas atingeble, ke ian *intencan*, nekutiman esprimformon la leganto ne rigardu nacilingva idiotismo de la *tradukinto* sed li eksentu ĝin, kiel stilapartaĵon de la aŭtoro. Tiu ĉi postulo kompreneble tute ne signifas, ke iu nacia lingvo ne povu influi Esperanton per bonaj esprimformoj, helpante tiel la evoluon de la lingvo, sole tion, ke nur tiaj esprimformoj aperu en la lingvo, kiuj povas kaj meritas esti ĝeneralaj, kiuj ne estas en la lingvo fremdaj elementoj, ĝenante kaj

malsanigante ĝin, kvazaŭ fremda korpo la vivantan organismon, sed estas kvazaŭ nutraĵoj, kiujn la lingvo dismetas kaj sintezas, uzante ilin tiel por sia kresko kaj evoluo.

Por la evoluigo de tiu ĝenerala, kanvasa stilo ni havus niajn gazetojn. Ili devas kontroli, kontroli kaj kontroli la tekstojn de ĉiuj artikoloj antaŭ publikigo. Kompreneble, tio bezonas delikatan manon, certan guston, kiu povas bone distingi inter floro kaj sarkindaĵo, kiu ne formas ĉiujn tekstojn laŭ sia bildo, eble griza kaj seninteresa, aŭ, kio estas ankoraŭ pli fatala, ne altrudas siajn proprajn kapricojn kaj superlogikaĵojn, sed elsarkas nur tiajn mallertaĵojn kaj naciismojn, kiuj certe ne pliriĉigos la lingvon, ne signifas esprimon por mankanta nuanco, estas pli, aŭ malpli kontraŭaj al la spirito de la lingvo. Se lerta mano faras tiajn korektojn, la ensendinto mem estos surprizita, kiel viva kaj natura fariĝis lia stilo, li lernas el la korektoj, kaj en liaj postaj artikoloj la kontrolanto ĝoje konstatos la rapidan malpliigon de la korektindaĵoj.

Mi estas certa, ke la vera ekfloro de la Esperanta literaturo certe kondukos al la starigo de tia internacia *areopago*, kiu anstataŭos la lingvan instinkton en la naturaj lingvoj.

Sed ĝis tiam, la gazetoj havas la taskon, teni la standardon de la pura stilo. Bedaŭrinde, la nunaj Esperantaj gazetoj ne havas tro multe da loko por literaturo, kaj eĉ se ili publikigas novelojn kaj poem-ojn, tio ne estas ilia ĉefa programo kaj tasko. Tiu ĉi manko de literatura organo tre dolore sentiĝas, de kiam Literatura Mondo, antaŭ kvin jaroj ĉesis sian aperon. Nin, kiuj estis redaktintaj la gazeton, konsolis en nia ĉagreno sole tiu espero, ke certe aliloke iuj aliaj levos la falintan standardon. Dum kvin jaroj tio ne okazis. Kaj nun, eble mi ĝojigos vin anon-

cante, ke Literatura Mondo ree aperos en decembro kaj laŭ la malnovaj vojoj daŭrigos sian laboron pri la akcelo de la literatura kaj lingva evoluo.

Sed mi ĝis nun sole mallonge aludis pri punkto, kiu estas eble tamen la plej grava por la literatura lingva evoluo. Ĝi estas la *publiko*.

Oni diras, ke ĉiu popolo havas tian registaron, kian ĝi meritas. Eble pli prave oni povus diri, ke ĉiu popolo havas tian literaturon, kian ĝi meritas. Ĉu la esperantistaro faris do sian eblon por elmeriti pli brilan literaturon?

Nu, tiun ĉi diskretan demandon mi ne kuraĝas respondi per nepra *jes*. *Kabe* kaj *Jean Forge** ekzemple tute ĉesigis sian literaturan agadon Esperantan, kelkaj gravaj firmoj, malfacile varbitaj, retiriĝas de la Esperanta eldonado. Ĉio ci estas grava perdo kaj montras ian neglekton de tiu devo kiun mi supre nomis malgrandnaciana devo, kaj kiu konsistas el la ofera subteno de la literaturo.

Estas ja konate, ke la esperantistaro senĉese alfluas kaj refluas kvazaŭ tajdo, novaj alvenas, malnovaj foriras, aŭ almenaŭ iras trans la vidlimon de la movado; tio ĉi ja estas neevitebla, dum Esperanto ankoraŭ ne konkeris por si la ĝeneralan akcepton kaj uzon. Sed estas vere dolore, se iu, kiu en Esperanto rekonis ĉiel taŭgan, mirinde flekseblan, perfekte kapablan instrumenton de esprimo, kaj havis kapablon kaj inspiron: perfekte interpreti per ĝi sentojn fremdajn, aŭ proprajn, forlasas la movadon silente, sed kun la muta riproĉo: por kiu verki en Esperanto?

Mi scias, ke mizera ekonomia situacio premas la tutan mondon. Kaj mi scias, ke ni vivas en epoko,

* Mi ĝoje korektas, ke de tiam ree li ekverkis en Esperanto.

kiam la poezio ŝajnas elmodiĝinta, kaj la poeto ne senkaŭze vokas ĉagrenite al siaj kantoj :

Ho orfaj kantoj, ĉu do voĉon vian
Aŭskultos iu kun karesa ŝat' ?
La mondo nun la arton »iluzian«
Ja mokgrimace ĵetas al la strat' !
Oferas ĝi al nova Adorat' :
Al la Rapido ! Ĵetas sin fakire
Sub idolĉaron ĝian, kies rad',
Rulante sin tra l' mondo triumf-ire,
Muelas Senton kaj frakasas Belon ŝire.

Tamen, ni devas ne forgesi, ke ni estas esperantistoj, adeptoj de Esperanto, kiu, kiel mi diris, estas lingvo kaj sento. Kaj ĉi tiu lingvo kaj ĉi tiu sento spiradas ja per la literaturo kaj poezio. Lasi perei ilin estus : lasi sufokiĝi la lingvon.

Kaj ĉi tie tre multe povas helpi la Esperanta societa vivo. Ĝi povas, pere de la pli progresintaj kaj poeziemaj membroj de la societo, per superaj kursoj, per literaturaj vesperoj, intimaj poeziaj kaj literaturaj kunvenoj, edukila membrojn por literaturo kaj poezio. En la koro de ĉiu homo vivas kaŝe la soifo je la poezia belo, kvankam ofte dike kovrite per la sablo de la ĉiutagaj interesoj kaj eble ankaŭ de la lerneja rememoroj. Sed oni ekgratu ĉi tiun sablon, kaj oni mire rekonos, kiel grandioza kaj plezuriga instrumento estas la lingvo kaj kiajn artistojn jam havas tiu ĉi instrumento.

Ke ĉi tio ne estas malplena fantaziaĵo, tion montras, ke ĉie, kie vivas poetoj, aŭ literaturistoj pli famaj, tuj ariĝas ĉirkaŭ ili pli, aŭ malpli granda aro da literaturemaj esperantistoj, kaj — subite plimultiĝas la nombro de la vendotaj libroj en tiu loko.

Jes, multaj homoj diras, ke ili ne ŝatas, aŭ ne *komprenas* poezion. Sed fakte, ili nur *ne scias legi* poezion, oni devas tion instrui al ili. Apenaŭ ekzistas homo, sur kiun ne efikus bona deklamo de bona poemo. Kaj se li ofte havas la okazon *aŭdi*, iom post iom li emiĝas ankaŭ *legi*.

Krome, laŭ mia opinio, la poemoj estas eminente taŭgaj, por ellerni perfekte la lingvon. Poemo lernita neforviŝeble fiksas en la memoro vortojn kaj esprim-ojn. Bonaj poemoj devus esti abunde uzataj en superaj kursoj. Per tio oni akirus du rezultojn per unu fojo: perfektan lingvokonon kaj interesigon pri nia poezio.

Do, per la celkonscia literatura propagando oni certe povas tiom eduki kaj entuziasmigi la homojn por la literaturo, ke eĉ se ili ne estas sufiĉe riĉaj por aceti kaj aboni solaj, ili aranĝos komunan aĉeton kaj abon-on. Tiel ĉiu grupo havus baldaŭ pli malpli grandan bibliotekon, plivigliĝus la tuta societa vivo per la literaturaj vesperoj, kaj ankaŭ la eldonistoj de gaz-etoj kaj libroj trovus sian kalkulon kaj entreprenus pli kaj pli multajn eldonojn, eldonus pli kaj pli riĉajn kaj multenhavajn gazetojn.

Kompreneble, por fari tiajn vesperojn, oni devas fari bonan programon. Ĉu ne estas mizere, ke en la programo de ĉiu Esperanta festeto oni trovas nur la *Himnon*, kaj *La Vojon*, maksimume la *Preĝon sub la Verda Standardo*, kiuj ja estas perloj de nia poezio, sed kies efekton multe malpliigas ilia trouzateco. Vere, kvazaŭ ne ekzistus riĉa literaturo, riĉa poezio Esperanta, taŭga por ĉiu okazo. Kaj, ĉu ne estas ekzemple strange, ke oni ĝis nun tute ne sentis la bezonon de bona poezia antologio de originalaĵoj, kvankam ĝi estus preskaŭ nemalhavebla por la aranĝo de literaturaj festoj?

Mi estas certa, ke Esperanto, laŭ la supre skizita

maniero, povos savi sian literaturon kaj poezion trans la nunan ekonomian kaj poezian krizon ; sed por tio ĝi bezonas helpemajn manojn kaj entuziasmajn korojn. Donacu do ilin al la lingvo, kiu, kreskinte el la semo de Sento, volas produkti florojn de Sento, kaj kies eblaĵoj, tra la harmonio de sento kaj esprimo, ideo kaj formo, deziras disbranĉiĝi por multkolora, fortika kaj nepereigebla vivo.

Sendemandaj respondoj

La difina artikolo. Nek en la Fundamento de Esperanto, nek en la Lingvaj Respondoj de Zamenhof oni trovas striktan regulon pri la uzo de la difina artikolo *la*. Kaj tial la difina artikolo estas konstanta problemo por tiuj, en kies lingvo ĝi ne ekzistas. Precipe la rusoj preskaŭ ĉiam mistrafas en ĝia uzo. Tute ne uzi ĝin, kiel Zamenhof iam rekomendis al la dubantoj, laŭ mia opinio ne estas kontentiga solvo. Estas vere, ke *superflua* artikolo pli ĝenas ol la *manko* de artikolo tie, kie ĝi devus stari, sed ankaŭ ĉi tiu lasta estas grava stileraro, kiu multfoje malfaciligas eĉ la komprenon. Oni devas iel starigi striktajn regulojn, kies scio klarigas kaj instruas la uzon de la artikolo por ĉiuj. Ĉi tiujn regulojn mi klopodas nun fiksi.

Oni devas uzi la artikolon :

1. *se temas pri io jam konata, difinita, jam priparolita.* Ekzemple : Edzino, aĉetinta ĉapelon sen la scio de la edzo, surprizas lin agrable per la deklaro: »Mi aĉetis ĉapelon«. Sed se ili antaŭe jam intencis aĉeti kune *iun certan* ĉapelon, eble eĉ marĉandis pri ĝi, kaj poste la edzino ĝin aĉetas en la foresto de la edzo, la deklaro tekstos : »Mi aĉetis *la* ĉapelon«. El ĉi tiu deklaro, la edzo, se li bone scias la uzon de la artikolo, certe scios, ke temas ne pri ia ajn, sed nepre pri *tiu certa* ĉapelo. Alia ekzemplo : Mi ricevis leteron

de UEA (ian ajn, neatenditan). Mi ricevis *la* leteron de UEA (tiun certan, kiun ni atendis, pri kiu vi scias, pri kiu ni jam parolis). Aŭ : »Mi vidis sinjorinon irantan kun ses hundoj,« — mi diras al mia amiko. La sekvan tagon mia amiko diras al mi : »Mi vidis *la* sinjorinon irantan kun ses hundoj.« Kial *la* ? Ĉar temas pri konata, jam priparolita sinjorino. Kiel oni vidas, en la supraj ekzemploj oni povas anstataŭigi la artikolon per *tiu*, aŭ *tiu certa*.

2. *se temas pri io, kiel pri reprezentanto de sia klaso, kategorio.* Ekzemple : *La* homo (ĉiu estaĵo apartenanta al la kategorio homo) estas dupieda, senpluma besto. Same en pluralo, se temas pri la tuta klaso, tuta grupo, ĝenerale, aŭ ankaŭ pli malvaste. Ekzemple : *La* hundoj estas fidelaj bestoj. *La* arboj (ĉiuj arboj) printempe floras. Oni elhakis *la* arbojn apud la vojo (ĉiujn arbojn, kiuj estis apud la vojo). Sed : Oni elhakis arbojn (kelkajn, plurajn, multajn, malmultajn) apud la vojo. En ĉi tiuj okazoj do oni povas anstataŭigi la artikolon per *ĉiu*, *ĉiuj*, (*ambaŭ*).

3. *se temas pri io ununura, sola en sia speco.* Ekzemple : *la* ĉielo, *la* firmamento, *la* suno, *la* tero. Servisto kuras en la ĉambron, kriante : »Mortis ĉevalo«. Tio signifas : mortis iu nedifinita el la ĉevaloj. Sed se li krias : »Mortis *la* ĉevalo« tio signifas ke mortis *la sola* ĉevalo, kiun oni havis, aŭ mortis *tiu certa* ĉevalo, kies morton oni atendis. Aŭ : Li estas Esperanta verkisto (unu el multaj). Li estas *la* Esperanta verkisto (tiel eminenta, ke li povas kvazaŭ sola pretendi la titolon Esperanta verkisto).

Resume : oni uzu la artikolon, se al la respektiva vorto estas antaŭmeteblaj, sen la ŝanĝo de la senco, la jenaj vortetoj :

tiu, *tiu certa* *ĉiu*, *ĉiuj* *sola*, *ununura*.

Oni ne uzu la artikolon, se estas antaŭmeteblaj :

ia, iu, kelka, kelkaj, peco da, multa,
multaj, pluraj.

Per ĉi tiu memkontrolo oni bone povas sin helpi
okaze de dubo.

Ekzemploj: folio de arbo: arbfolio (iu, laŭplaĉa);
folio de la arbo: iu, okaze trafata,
laŭplaĉa folio de certa, difinita
arbo;
la folio de arbo: certa, difinita arb-
folio;
la folio de la arbo: certa, difinita
folio de certa difinita arbo; aŭ
folio de tiu arbo ĝenerale.
(Ekz.: la folio de ĉi tiu arbo estas
dentumita.)

Folioj de arbo: kelkaj aŭ multaj
arbfolioj;
folioj **de** la arbo: kelkaj aŭ multaj
folioj **de** certa difinita arbo;
la folioj de arbo: certaj, difinitaj
arbfolioj;
la folioj **de** la arbo: ĉiuj folioj de
certa arbo.

Krome oni povas uzi la artikolon anstataŭ la pos-
oda pronomo *sia*. Ekzemple: Li vundis la manon. Li
rompis al si la kapon. Gentile li levis la ĉapelon.

Generale oni uzas artikolon antaŭ verbosubstant-
ivoj, kiuj estas ligitaj kun la aktiva aŭ pasiva aganto
per la prepozicio *de*. Ekzemple: Hirundoj anoncas *la*
alvenon de la printempo. Min tre ĉagrenas *la* perdiĝo
de la letero. Ni atendas *la* malfermon de la pordo.

Oni uzas la artikolon antaŭ superlativo. (La plej
bona vino, la plej bela knabino.) Sed antaŭ adverboj
neniam. (Estus plej bone; li plej multe amas sin mem.)

Artikolo devas stari antaŭ adjektivoj, se ili estas
uzataj anstataŭ substantivoj. (La Ĉiopova; ĝi estas la

mia; unu al la alia; la fortaj helpu al la malfortaj; mi sopiras je la kara; li ne povas distingi la malbonan aferon de la bona.)

Sen artikolo povas esti *abstraktaj vortoj* kaj nomoj de *materialo*. (Amo estas donaco de Dio. Fero estas metalo. Oro de rustas. Drinko estas danĝera pasio.) Sed se ili havas adjektivon, aŭ al ili rilatas genitivo, la artikolo ne povas manki antaŭ la subjekto. (La fero de Svedujo estas tre bona; la miksitita oro estas pli malkara; la sincera amo estas granda trezoro; la ofta drinko ruinigas.)

Sen artikolo estas la *personaj nomoj* kaj *Dio*. Same la land- kaj urbonomoj. Sed la river- kaj montonomoj *havas* artikolon. (Karlo, Urugvajo, Londono, la Monto Blanka, la Danubo.)

Artikolo devas stari antaŭ la propraj nomoj, se ili havas *adjektivan epiteton*. (La bona Dio; la perfida Efiialtes; la kuraĝa Petro; Johano la Brava; Rikardo la Leonkora; Natan la Saĝa; la du fratoj van Buck; la brila Parizo; la potenca Britujo.) Sed se la epiteto estas *substantiva*, la artikolo mankas. (Reĝo Filipo; reĝino Kleopatra; Imperiestro Rudolfo; Sekreta Konsilanto Huber; Malsaĝulo Peĉjo; Saĝulo Natan; Sinjorino X; Doktoro Esperanto). Nur la *river- kaj montonomoj*, kiuj havas artikolon ankaŭ solaj, havas ĝin ankaŭ kun substantiva epiteto. (La rivero Danubo; la lago Bajkal; la monto Gerhardo.)

Mankas la artikolo, esceptmaniere, antaŭ la adjektivaj epitetoj *sankta, beata* (en eklezia senco). Ekzemple: Sankta Johano; Beata Angelika.

Se la propraj nomoj esprimas kvazaŭ ideon, modelon kaj rilatas al in persono, ili *havas* artikolon. Ekzemple: Katarina, la Semiramis de Rusujo; Johano estas la Herkulo de la vilaĝo.

Iu kaj ia. Ĉi tiuj du vortetoj ofte estas erare intermiksataj, kiam oni uzas ilin anstataŭ nedifina artikolo. Tia artikolo en Esperanto ne ekzistas, sed oni tamen sentas kelkfoje la neceson : akcenti la dedifinitecon. Kiun oni uzu el ili ĉiokaze ?

Iu kaj neniu respondas al la demando *kiu*. Kaj *kiu*, se ĝi rilatas al substantivo, estas ĉiam *kiu el...* Do ankaŭ *iu kaj neniu*, se ili staras antaŭ substantivo, estas ĉiam *iu el... neniu el...* Ili do rilatas al difinita nombro de personoj aŭ objektoj, *el* kiuj oni apartigas iun, aŭ neniun. »Alvoku iun serviston« — signifas : alvoku iun el la certa nombro de servistoj, estantaj je nia dispoŝo. »Mi havas neniun libron ĉe mi« — signifas : el la respektivaj libroj, pri kiuj temas, neniun mi havas ĉe mi.

Ia kaj nenia ne havas tian apartigan funkcion. Ili estas do taŭgaj esprimi la akcentitan nedifinitecon, sen ia ajn apartiga subsenco. »Alvoku ian serviston« — signifas : alvoku unu serviston, kiun ajn, kian ajn. »Mi havas neniun libron ĉe mi« — signifas pli akcente : mi ne havas libron ĉe mi : mi tute ne havas libron ĉe mi.

Zamenhof diras : »Estas *nenia* danĝero en ĉi tiu loko.« Do oni diru : »Estas *nenia* rilato inter ambaŭ ideoj.« »Mi vidis ian homon, sed mi ne scias, kiu li estas.« »Mi legis iam artikolon pri ĉi tiu temo, sed mi ne scias kie.«

Jen ekzemple frazo : Antaŭe oni parolis ĉi tie ankaŭ france kaj germana, sed nun oni jam parolas *neniun* lingvon (t. e. nek la francan, nek la germanan). Sed se tiu loko estus la lando de mutaj senlingvuloj, oni devus diri : oni parolas tie ĉi *nenian* lingvon.

Resume : *iu kaj neniu* estas kvazaŭ duondifinaj artikoloj, ĉar ili, ne difinante la opan individuon aŭ objekton, tamen difinas certan grupon, aŭ kategorion, al kiu la respektiva objekto aŭ individuo apartenas.

Ia kaj *nenia* kontraŭe, difinas nek la opajon, nek ĝian grupon, aŭ kategorion, ili estas do la veraj nedifinaj artikoloj, uzeblaj, kiam tiajn oni bezonas.

Kvazaŭ. La uzo de *kvazaŭ* estas iom konfuza en la lingvo.

Oni uzas post ĝi jen indikativon, jen kondicionalon. Laŭ mia opinio ĉi tio estas tute superflua malfaciligilo de la Esperanta sintakso. Same superflua ŝajnas al mi la formo *kvazaŭe*, krome ĝi estas ankaŭ malbelsona.

Mi metus la jenan ordon ĉirkaŭ *kvazaŭ* :

Kvazaŭ povas esti

1. *adverbo*. Ĉiokaze ĝi rilatas al iu aparta vorto en la frazo, sekve tute ne efikas sintakse, la predikato restas en indikativo. Ekzemploj : li volas *kvazaŭ* dirion ; la ĉielo *kvazaŭ* krevis ; li *kvazaŭ* deliris ; li estis *kvazaŭ* ebria.

2. *konjunkcio*. Ĉiokaze ĝi postulas ĉiam kondicionalon. Ekzemploj : li vokas vin, *kvazaŭ* li volus dirion ; de li eliras tiaodoro, *kvazaŭ* ĵus li estus elirinta el drinkejo ; ili faras mienojn, *kvazaŭ* ili laborus ; ŝajnis al li, *kvazaŭ* ĉiuj steloj defalus.

Se oni estas tentata ne uzi kondicionalon post *kvazaŭ*, preskaŭ ĉiam superflua estas *kvazaŭ mem*, ĉar la *kvazaŭeco* jam estas esprimita en la ĉeffrazo. Ekzemple : Li mensogis, *ke* mi lin batis ; ili volas kredigi, *ke* lingvo estas matematiko ; ŝajnis al li, *ke* ĉiuj steloj defalas.

Kvazaŭ estas uzebla ankaŭ antaŭ substantivoj : li estis *kvazaŭ* ombro ; ĝi estis *kvazaŭ* longa ĝemo. Tute superflue estus ĉi tie uzi la pezan kaj malbelan formon *kvazaŭa*. Ĝin ni bezonas maksimume post prepozicio : kun *kvazaŭa* certeco.

Duoblaj konsonantoj. Jen, unu el la grandaj-malgrandaj problemoj de Esperanto. Ĉu skribi finno, aŭ fino? Kaj lastokaze, kiel distingi inter finnlandano kaj malkomenco? Granda dilemo! Kvankam la problemon solvis mem Zamenhof plej simple, plej trafe, kiel ĉiam.

Li, tre saĝe, faris al si la *principon*, eviti duoblajn konsonantojn en la Esperantaj vortoj. Tio estis tre utila principo, dank' al kiu la Esperanta ortografio estas vere infana ludo. Sed ĉi tiu principo nenie estas deklarita kiel Fundamenta regulo. Ĝi ne estas do dogmo, kaj estas tute strange, trudi perforte *utilisman* principon, eĉ kiam ĝi estas *malutila*. Ĉar ja ekzistas kelkaj internaciaj vortoj, nepre necesaj en Esperanto, kies transpreno eblas nur per la apliko de duoblaj konsonantoj — alimaniere oni havas vortojn kun duobla senco. Duobla senco, aŭ duobla konsonanto, en ĉi tiu dilemo, laŭ la ekzemplo de Zamenhof mi nepre voĉdonas por la lasta.

Temas ja nur pri kelkaj vortoj: regatto, mokko, bullo, villo, finno, brutto (Zamenhofaj), vendetto, kokko (coccus). Oni ne povas anstataŭ ili proponi pli bonajn, kial heziti do pri ilia ekuzo?

Sed la elparolo! Nu, — oni ne devas elparoli ambaŭ konsonantojn aparte, tio ja estus malfacila kaj malbela. La elparolo okazas tiel, ke oni elparolas nur unu konsonanton, sed oni sentigas du.

Kiel oni povas tion fari?

Ĉe la t. n. *kontinuaĵ* konsonantoj (f, v, s, z, l, m, n), kiujn oni povas sonigi, kiel longe oni volas, la afero estas facila, oni simple sonigas ilin iom pli longe.

Ĉe la t. n. *momentaj* konsonantoj (p, b, k, g, t, d, c ktp.) la afero estas iom pli komplikita. Ĉi tiuj konsonantoj estiĝas tiel, ke oni en diversaj lokoj fermas la vojon de la aerfluo kaj ĉi tiun malhelpon

poste eksplodigas aerstreĉe ; la eksplodo donas la respektivan sonon.

Nu, ĉe la *haltigo* de la aerfluo ĉiam estiĝas mallaŭta sono, kiu estas identa je la laŭta sono *eksplo**da*. Ordinare tiu ĉi *ferma* sono ne estas aŭdebla, ĉar ĝi kunfluas kun la laŭta *malferma* (eksploda) sono. Sed se post la fermo de la aervojo ni iom paŭzas, la sono fariĝas aparte aŭdebla.

Ekzemple ni eldiru la silabon *ap*, sed ne tute : ni formu la lipojn por la elparolo de *po*, kaj per tio fermu subite la aerfluon, kiu libere eliris tra la buŝo dum la elparolo de *a*, poste ni haltu, ni tenu la lipojn malfermitaj. Ĉe la fermiĝo de la lipoj ni povas klare aŭdi mallaŭtan *po*. Nun ni eksplodigu la lipmalhelpon per aerstreĉo : jen, ree, nun pli laŭte, eksonos la konsonanto *po*. Tiel estas ankaŭ pri la ceteraj momentaj konsonantoj.

Ni havas do *ferman* sonon kaj *malferman* sonon. Se ilin ni apartigas per intermetita *paŭzeto*, ni havas perfektan impreson pri duoble prononcita konsonanto.

Krome la duoblajn konsonantojn montras ankaŭ la antaŭa akcentita *vokalo*, kiu antaŭ duobla konsonanto estas mallonga, dum antaŭ unuobla konsonanto ĝi estas longa, tirata. Oni diras do : mokko kaj móko; regatto kaj regáto ; vendetto kaj vendéto ktp.

Laŭ la supra maniero oni povas prononci la duoblajn konsonantojn ankaŭ en la mezo de vorto : *ekkanti*, *plorruĝa*, *ellerni*, *rabbirdo* kaj, se la samaj konsonantoj renkontiĝas en du apudaj vortoj, (en la fino kaj komenco de la vortoj), ekzemple : *bat' turmenta*; *mok' kaj malamo*; *vead' dolora*, *rab' barbara* ktp. Sed lastokaze la akcenta vokalo restas longa, tirata.

Konjunktivo. La Esperanta konjunktivo estas identa je la imperativo. Ĝia uzo estas tre simpla, ĉar

oni uzas ĝin nur en tiuj suborditaj frazoj, en kiuj la *senco* postulas.

Tamen, tiu ĉi simpla regulo ne estas tute kontenta. Tion montras, ke multaj verkistoj uzas konjunktivon *superfluan* (laŭ la ekzemplo de sia gepatra lingvo) kaj ke aliaj, en kies lingvo la konjunktivo mankas, ne uzas ĝin en okazo de neceso, kaj erare anstataŭigas ĝin per futuro, aŭ kondicionalo.

Tial eble ne estas superflue fiksi iom pli strikte la uzon de konjunktivo.

Gia uzo estas ligita kun la konjunkcio *por ke*. Post *por ke* nepre kaj ĉiam necesas konjunktivo. Ekzemple: »Mi venis, por ke vi diru al mi...«

Krome ekzistas tiaj verboj, en kiuj *kaŝe* enestas la *senco de por*. Ili estas la verboj, kiuj esprimas *celadon* por io (deziri, voli, pretendi, peti, postuli, ordoni, instigi, devigi), aŭ *lason de libera vojo* por io (konsenti, permesi), aŭ *devigan ordon de cirkonstancoj* (necesi, bezoni). Post ĉi tiuj verboj oni neniam metas *por ke*, sed nur *ke*, ĉar, kiel mi diris, *por* jam kaŝigas en la verbo mem, kaj ekzemple: *mi volas por ke vi venu* — estus pleonasmo. Sed — ĝuste pro la kaŝita *por* — ĉi tiuj verboj, *kaj ankaŭ ilia malo*, ĉiam postulas konjunktivon.

Por pli facile memorfiksi, mi diros verse:

Post la volo kaj deziro,
Peto kaj ordona diro,
Kaj instigo kaj permeso,
Kaj devigo kaj neceso,
Kaj post verboj samsignifaj,
Sekvas formoj konjunktivaj.

Kompreneble oni devas atenti pri la *vera senso* de la vortoj. »Mi diris, ke vi venu« — en ĉi tiu frazo *diri* ne estas simple *diri*, sed ĝi staras anstataŭ peti,

aŭ ordoni, aŭ instigi (proponi), ĝi do postulas konjunktivon.

Por fari regulon : *Konjunktivon oni uzas, se la ago esprimita en la subordita frazo nek okazis, nek okazas, nek nepre okazos, sed la ĉeffrazo esprimas agon aŭ staton, kiu celas la plenumiĝon (aŭ neplenumiĝon) de la subfrazo ago.*

La plej malforta grado de ĉi tiu celado estas la *deziro*. *Espero* jam tute ~~ne~~ estas celado, post ĝi oni metu do indikativon. »Mi esperas, ke vi venos.« Same ne esprimas celadon la verbo *timi*. Ĝi do postulas indikativon. »Mi timas, ke mi falos.«

Post *deci* ni metas indikativon, se ĝi estas simpla juĝo, aŭ konstato. »Ne decas, ke vi tiel laŭte krias.« Sed se ni volas pli emfazi la juĝon, donante al ĝi nuancon de instigo aŭ malpermeso, ni povas diri ankaŭ : »Ne decas, ke vi tiel laŭte kriiu.«

Iom pri la vortsekvo. En Esperanto la vortsekvo estas libera. Sed tio ne signifas, ke oni povas laŭplaĉe disĵeti la frazerojn kaj tamen havi bonan, agrablan stilon. Kelkajn reguletojn bone estas memorteni.

1. Subjekto kaj predikato estu proksime unu al la alia. Ilin apartigu maksimume adverbo. Komprenoble la subjekto-predikatan komplekson, kiel tuton, oni povas laŭplaĉe ŝovi tien-reen en la frazo. Sed la apud-eco estas grava apartenaĵo de la bona proza stilo, precipe, se la subjekto estas persona pronomo. En prozo neniam oni metu la personpronoman subjekton *post* la predikaton. Precipe ne en la imperativo. Ni ne diru do : *iru ni, vidu ni*, ni restu ĉe la ordinara : *ni iru, ni vidu*.

2. Se participa adjektivo havas objekton, kaj ankaŭ ĉi tiu objekto havas epiteton, multaj verkantoj embarasiĝas pri tio, kiel ordigi plej bone la vortojn ?

Ekzistas tri eblaĵoj :

a. objekt-epiteto, objekto, particip-adjektivo, substantivo. Ekzemple : »la grandan penon postulanta laboro.« Ĝi estas la malplej bona, ĉar la artikolo staras antaŭ la adjektivo *grandan*, kvankam ĝi rilatas al la substantivo *laboro*.

b. particip-adjektivo, objekt-epiteto, objekto, substantivo. Ekzemple : »la postulanta grandan penon laboro.« Ĉi tiu varianto, kiun ŝatas precipe la rusoj, estas iom pli bona, sed tamen fremda por multaj pro la apartigo de la adjektivo kaj substantivo.

c. substantivo, particip-adjektivo, objekt-epiteto, objekto. Ekzemple : »la laboro postulanta grandan penon.« Jen la plej perfekta kaj sekvinda eblaĵo ; en ĝi ĉiu frazero staras senpere apud la frazero, al kiu ĝi rilatas.

Se la particip-objekto ne havas epiteton, plej elegante estas kunfandi ĝin kun la verb-radiko de la participo en kunmetitan vorton. Anstataŭ : »paco donanta morto« ni diru : »paco-dona morto«, anstataŭ »ĉion vidanta suno« : »ĉiovida suno«.

3. Plej ofte oni pekas kontraŭ la logika vortsekvo ĉe la vortoj *ankaŭ* kaj *ne*. Ilin oni ĉiam devas meti antaŭ la vortojn, al kiuj ili rilatas.

Per la ŝovado de ĉi tiuj vortoj oni ja povas tute aliigi la sencon de la frazo. Jen ekzemploj :

Ankaŭ li dancis hieraŭ en la korto. (Krom aliaj ankaŭ li.)

Li ankaŭ dancis hieraŭ en la korto. (Krom kanti, li ankaŭ dancis.)

Li dancis ankaŭ hieraŭ en la korto. (Krom hodiaŭ, ankaŭ hieraŭ.)

Li dancis hieraŭ ankaŭ en la korto. (Krom en la ĉambro, ankaŭ en la korto.)

Same :

Ne li min sekvas. (Sed iu alia.)

Li ne min sekvas. (Sed iun alian.)

Li min ne sekvas. (Sed hejmeniris.)

Precipe ofte oni renkontas la malĝustan meton de *ne* apud la refleksiva pronomo *sin*. »*Li* ne *sin* razas : li ne *sin* trompas ; — aŭdante tiujn ĉi frazojn oni demandas : kiun do, se ne *sin* ? Kvankam la parolanto volis diri : »*Li* *sin* ne razas ; li *sin* ne trompas ; aŭ »li ne razas *sin* ; li ne trompas *sin*«.

Virinaj nomoj. Jen problemo, tute ne solvita en Esperanto. Ĉe Zamenhof ni legas : *Johanino*, *Ludovikino* ktp. do, por derivi virinan nomon el la vira, estas uzata la sufikso *ino*. Sed Zamenhof uzas ankaŭ la nomon *Marta*. Jen, laŭ mia opinio, en ĉi tiu a-fin-aĵo *sin* kaŝas la solvo !

Vere, la sufikso *ino* apenaŭ taŭgas tie ĉi. Vortoj, kiel *Antoniino*, *Konstantenino* ktp. estas terure longaj kaj plumpaj, vere ne taŭgaj por esti la nomo de ĉarma knabino. *Mariino* estas tute ne ebla, nereconebla, dum *Mario* ĉe la italoj estas ofte uzata *vira* nomo. Same : *Berto*, *Diano*, *Emilio*, *Ireneo* ktp.

Ankaŭ la sufikso *io*, proponita de Meazzini, ne kontentigas. *Antonio*, *Emilio*, *Oktavio*, *Viktorio*, *Julio* estis uzataj ĝis nun kiel viraj nomoj, malfacile estus de nun uzi ilin kiel virinajn. Krome, ĉi tiu solvo devigus nin uzi la terurajn, nenaturajn vortojn : *Aleksandrio* (urbo !), *Bertio*, *Renatio*, *Franciskio*, *Paŭlio*, *Vestio*, fremdajn al ĉiu lingvo de la mondo. Cetere : prefere Vilhelmino, Franciskino, Jozefino, ol la supraj senformaj formoj.

Sed ni revenu al la vorto *Marta*. Ĝin naskis neceso. *Marto* estus ja nomo de monato, *Martino* ŝajnus vira nomo, *Martenino* estus mortomonstro. La genio de Zamenhof elektis el kvar eblaĵoj la malplej malbonan. Ni danku ĉi tiun elekton, ĉar ĝi montras al ni vojon, solvi preskaŭ tute nian problemon.

La regulo estas simpla. Ĉiu *virina* nomo *finiĝas*

je a. Virinan nomon el vira ni faras tiel, ke ĝian finaĵon ni ŝanĝas je finaĵo a.

Sed ĉi tiu regulo ja estas rompo de la Fundamenta regulo, ke ĉiu substantivo finiĝas je o. Nu, por savi la fundamentecon, ni povas fari la jenan ruzan klarigan regulon :

Ĉiu virina nomo estas rigardata, kiel adjektivo, rilatanta al la (ellasita) vorto ino. Ĉe tiuj virinaj nomoj, kiuj ne havas konforman virnomon, ni supozas tian. (Tio ne estas malpli akceptebla, ol la supozo de la vorto fraŭlo, el la vorto fraŭlino.)

Do ni havas : Jozefa (ino), Marta (ino), Ludovika (ino) ktp.

Ĉi tiu adjektiva uzo de la nomoj ne povas naski miskomprenon, ĉar la viraj nomoj preskaŭ neniam estas uzataj en adjektiva formo.

Laŭ la supra regulo ni ricevas nomojn, tute similajn al la respektivaj nomoj uzataj en multaj naciaj lingvoj. Jen ekzemploj : Ada, Agata, Angelika, Anna, Antonia, Aŭgusta, Baba, Barbara, Berta, Bernarda, Cecilia, Debora, Diana, Dorotea, Eleonora, Eliza, Elizabeta, Elvira, Emma, Emilia, Eŭgenia, Eva, Flora, Franciska, Gabriela, Genoveva, Georga, Gertruda, Greta, Helena, Henrika, Henrieta, Ida, Irena, Izabela, Izidora, Johana, Jozefa, Julia, Kamila, Katerina, Klara, Klotilda, Kristina, Laŭra, Lidia, Livia, Lucia, Luiza, Ludovika, Margareta, Maria, Mariana, Marta, Matilda, Monika, Natalia, Ofelia, Olimpia, Olivia, Paŭla, Paŭlina, Pia, Priska, Rebeka, Reĝina, Renata, Roza, Rozalia, Roksana, Sibila, Santa, Sara, Serafina, Serena, Severa, Silvia, Simona, Sofia, Stefania, Suzana, Tekla, Teodora, Terezia, Tereza, Valeria, Veronika, Vera, Viktoria, Vilhelma, Viola, Virginia, Zaira, Zenobia, Zita ktp.

Estas kelkaj nomoj, kiuj malfacile eltenas tiun ĉi metodon. Ni citu : Adel, Alice, Beatrice, Judit,

Agnes, Ester, Dolores, Rahel, Karmen, Noemi, Niobe, Salome, Rut, Zoe, Abigail. Ili povas resti sensangaj, kaj aparteni al la kategorio de naciaj nomoj. Ĉar kompreneble ne ĉiun nomon oni devas esperantigi. Nomoj, kiel *Jacques*, aŭ *Jack*, ne ĉiam estas tradukeblaj per Jakobo. La originala vortformo ja apartenas al la *loka koloro*, kaj domaĝe estus difekti ĝin per traduko. Ankaŭ *Björnsterne* Björnson ne estu *Urso-stelaro* Björnson.

La virinaj nomoj apartenas al tiu ĝena flanko de la lingvo, kiu ne estas kontentige solvebla per la propaj reguloj kaj sufiksoj de la lingvo. Guste la rigora altrudo de ĉi tiuj reguloj malhelpis tiel longe la solvon. Sed, laŭ mia opinio, la supra regulo havas tiun avantaĝon, ke donante belajn kaj tute naturajn solvojn, tamen ne kontraŭas la proprajn regulojn de la lingvo.

Ata kaj ita. Ĉi tiuj do formoj estas ofte erare intermiksataj en pasivaj verboj. Kiam oni diru *estas* . . . *ita*, kaj kiam *estis* . . . *ata*?

Ni vidu ekzemplojn :

1. La domo estas konstruita depost duonjaro.
2. La domo estis konstruata dum duonjaro.

Ekzemplon 1. ni povas alivorte esprimi per la vorto *preta*. (La konstruo de la domo estas *preta* depost duonjaro.) Ekzemplon 2. ni povas alivorte esprimi per la vorto *daŭri*. (La konstruo de la domo *daŭris* dum duonjaro.)

En ekzemplo 1. (*estas...ita*) la akcento estas sur la *rezulto* de la ago, ĉar . . . *ita* signifas finitan agon, do ankaŭ la *rezulton*. En ekzemplo 2. la akcento estas sur la *daŭro* de la ago, ĉar . . . *ata* signifas *agon estantan*.

Vere, aŭdante : »la domo estis konstruata el brikoj« — mi imagas vidi masonistojn, kiuj metas brikojn unu sur la alian. Male, aŭdante : »la domo

estas konstruita el brikoj« — mi imagas vidi pretan domon el brikoj.

Same : aŭdante : »la supo estis manĝata« — mi imagas homon, kiu en estinta tempo, en la tempo, pri kiu oni parolas, *ĝuste, manĝas* supon. Male : aŭdante »la supo estas manĝita« — mi imagas (en estanta tempo) — malplenan teleron kaj plenan stomakon.

Sekvas el ĉi tio, ke parolante pri ilo, oni prefere uzu formon 2. ĉar ilo kutime kunhavas la ideon de ago. Male, parolante pri materialo, oni prefere uzu formon 1.

La viando estis tranĉata per malakra tranĉilo.

La viando estas tranĉita el porkfemuro.

Resume :

...*ata* : ekzistas (ekzistis, ekzistos) daŭranta ago.

...*ita* : ekzistas (ekzistis, ekzistos) preta faro, rezulto de ago.

Ĉu la ekzisto estas nuntempa, pasinta, aŭ futura, tion diras la tempo de la apuda helpverbo *esti*.

Kunmetitaj verboformoj. Ĉe kelkaj espaj verkistoj oni vidas grandan preferon al ĉi tiuj formoj, ili verŝajne opinias, ke la tre preciza difino de la tempo estas apartenaĵo de la bona stilo. Nu, mi havas kontraŭan opinion. Ĉi tiuj formoj pro sia longeco impresas min ĉiam peze kaj tede, mi vere kompatas la bedaŭrindajn frazojn, kiuj trenas sur siaj piedoj tian ŝarĝon : verbojn longajn je duonlinio.

Sed ne nur malbelaj estas la kunmetitaj verboformoj, ilia *deviga* uzo farus la lingvon ankaŭ tre malfacila por tiuj, kies lingvo ne konas tian precizan tempodistingon. Esperanto havas tri tempojn : la nuntempan, la pasintan kaj la futuran. Bona stilisto povas ĉion esprimi per tiuj ĉi tri tempoj, kaj pli akran distingon li povas fari ankaŭ sen la duonmejlaj verboformoj, per aliaj, ruzaj rimedoj.

Ni vidu tiujn ĉi kunmetitajn verboformojn, kaj ĵilian necesecon laŭvice.

Evidente, ke la verboformojn kun *estas* oni neniam bezonas. Oni ĉiam povas uzi anstataŭ ili la simplan formon. *Mi estas manĝinta* identas je *mi manĝis*; *mi estas manĝanta* identas je *mi manĝas*, *mi estas manĝonta* identas je *mi manĝos*. Se oni volas doni al la frazo iom da akcento, oni povas diri: *mi ĵus manĝis*, *mi jam manĝis*; *mi nun manĝas*, *mi ĝuste manĝas*; *mi tuj manĝos*, *mi baldaŭ manĝos*, *mi volas manĝi*. La kunmetitaj verboformoj kun *estas* al mi ŝajnas preskaŭ stileraro.

Ankaŭ la formojn kun *estis* oni povas plejparte eviti. Ekzemple anstataŭ: »kiam mi *estis skribanta* la leteron, mi amiko venis...« — oni povas diri: »*ĝuste* kiam mi skribis la leteron, mia amiko venis...«. Anstataŭ »kiam mi *estis skribinta* la leteron, mia amiko venis...« oni povas diri: »*post kiam* mi skribis la leteron, mia amiko venis...« Anstataŭ: kiam mi *estis skribonta* la leteron...« oni diru: »*antaŭ ol* mi skribis la leteron...« aŭ »kiam mi *volis skribi* la leteron...«

El la formoj kun *estos* sole *estos kun pasinta participo* ŝajnas necesa. Sed ankaŭ ĝi estas evitebla. Anstataŭ: »kiam mi *estos fininta* la laboron, mi iros promeni«, pli simple oni povas diri: »*post kiam* mi finis la laboron, mi iros promeni«.

Resume: oni esprimu

1. la estantecon, daŭron de la ago per: *nun*, *ĝuste*;
2. la estintecon, finitecon de la ago per: *ĵus*, *jam*, *post kiam*;
3. la estontecon de ago, aŭ la intencon per: *tuj*, *baldaŭ*, *voli*.

Tiamaniere, eĉ se kelkfoje, malofte oni estos

devigata uzi kunmetitajn verboformojn, ili certe ne svarmos en la teksto, farante ĝin enua, longmaniere, peza, plumpa, maleleganta kaj teda.

Edziĝi, enamiĝi. Post edziĝi komence oni uzis la prepozicion *je* : edziĝi *je* iu. Sed la prepozicio *je* pli kaj pli malpliĝas en la lingvo, hodiaŭ oni diras : riĉa, plena *de* ; kontenta *pri* ; simila *al* ; preni *ĉe* mano ; — anstataŭ ĉi tiuj, diversaj prepozicioj oni iam uzis *je*. Tiel ankaŭ *edziĝi* volas ŝanĝi sian prepozicion, sed, laŭ mia opinio, ĝi ne elektas ĝuste, kiam ĝi volas akompanigi sin per la prepozicio *kun*.

Geedziĝi *kun* estas logika. Li kaj ŝi iĝas kune geedzoj. Sed edziĝi kun ? Li kaj ŝi ja ne iĝas kune edzoj. Li edziĝis kun sia amiko en la sama tempo — ĉu ne ĝusta frazo ? Jes ja, ili iĝis kune, samtempe edzoj !

Kion signifas edziĝi ? Sin ligi edze *al* iu. Sekve plej ĝuste ŝajnas al mi uzi post edziĝi la prepozicion *al*. Li edziĝis al ŝi. Ŝi edziniĝis al li. Li eksedziĝis al ŝi. Ŝi eksedziniĝis al li.

Mi ne diras, ke edziĝi *kun*, se ĝi enradikiĝos, estos ia granda malfeliĉo. Sed se oni povas ankoraŭ libere elekti, kial ne elekti la pli logikan formon ?

Sed dum *edziĝi kun* estas ankoraŭ tolerebla, *enamiĝi en* estas tiel mallogika kaj absurda, ke oni devas batali kontraŭ ĝi. Nome, ĝi baziĝas sur plena miskompreno. Oni diras : *eniri la ĉambron*, do oni kredas ĝusta ankaŭ : *enamiĝi en ŝin*. Sed estas ja granda diferenco ! En *eniri la en* rilatas la *ĉambron*, sed en *enamiĝi la en* rilatas la *amon*. La analizo de *enamiĝi* estas *iĝi enama*, do proksimume : *droni en amo*. Kaj se ni diras : *li dronis en amo al ŝi*, ni devas diri ankaŭ : *li enamiĝis al ŝi*.

Mirinda. Ĉi tiun kompatindan vorton de certa flanko trafas akraj atakoj delonge. Mi volas defendi ĝin iomete.

Ni allasu, ke *mirinda* ne estas tute logika farita. Sed, ni konfesu, ĉi tiu mallogikeco tute ne malhelpis ĝin vivi. Jes, ĝi vivas de kiam ekzistas nia lingvo. Ĝin ekstermi estus vere mortigo de plenkreskulo.

Kaj, malgraŭ sia mallogikeco, ĝi havas bone difinitan signifon. Ĝi identas nek je *miriga*, nek je *admirinda*, ĝi staras ie meze inter ĉi tiuj du vortoj. Kaj ĝuste tio estas ĝia granda avantaĝo : kiam oni devus heziti inter *miriga* kaj *admirinda*, oni ĉiam povas uzi la vorton *mirinda*. *Miriga* restas por la okazoj, kiam speciale ni volas akcenti la *miron* pri io, *admirinda* restas por la okazoj, kiam speciale ni volas glori kaj laŭdi.

Tiu ĉi uzmaniero tiel enradikiĝis, ke, se mi trovas anstataŭ *mirinda* la vorton *admirinda*, mi estas ĝenata pro la troeco de la esprimo. Kaj se mi trovas anstataŭ ĝi *mirigan*, mi estas ĝenata pro la nesufiĉeco de la esprimo. Mia lingva sento kaj al kutimiĝo *postulas* la vorton *mirinda* spite al ĉia logiko.

Jes. La vivkapablo kaj neekstermebleco de *mirinda* estas klara ekzemplo pri la Zamenhofa diro, ke lingvo ne estas matematiko.

Kutimi. Jen vorto, kies uzon oni bezonas iom klarigi.

Kutimi signifas : havi kutimon. Mi kutimas fumi : mi havas la kutimon fumi.

Ekhavi, aŭ alpreni kutimon do signifas : *ekkutimi*, aŭ, ĉar kutimi estas netransira verbo : *kutimiĝi*. Havigi al iu ian kutimon signifas : *kutimigi*.

Ekzemploj : Mi *kutimas* legi antaŭ endormiĝo. Mi *kutimis* fumi, ĉar mi *alkutimiĝis*, sed nun mi *dekutimiĝis* je la *kutimita* pasio. *Miskutimigita* infano.

Mi vidis lin dum lia *kutima* (*kutimata*) vespera promeno. Vi devas *kutimiĝi* al ĉi tiu laboro, kiel ajn pene vi *kutimigos vin* al ĝi.

De, depost, ekde, deĉe, deper. Jen, la prepozicio *de* naskis tutan familion. Pluraj espistoj ĉagreniĝas pro tio, allasante maksimume la infanon *depost* kaj deklarante la ceterajn nelegitimaj infanoj. Kvankam, laŭ mia opinio, ĉi tiu riĉeco estas tute bonvena. Kaj ankaŭ tute laŭleĝa, ĉar ĝin ja produktis la lingvo spontane, el siaj propraj elementoj. Vere, kelkfoje oni sentas la neceson : pli precize diferencigi inter la multaj sencoj de la prepozicio *de*, kiu signas jen la *posedanton*, jen la *aganton*, jen malproksimiĝon en tempa kaj ankaŭ en loka rilato. Oni ja proponis ankaŭ novajn prepoziciojn (*baj, di, par*), sed tiuj ĉi ne povis ekradiki. Kaj tio ja estas komprenebla, ĉar la enkonduko de tia nova prepozicio kunportus ĝian *devigan* uzon en ĉiuj respektivaj okazoj, kio, ĉe tiel ofte uzata vorteto, estus grava kaj tro okulfrapa reformo. Male, la supraj formoj havas la grandan avantaĝon, ke ili devas esti uzataj nur en la okazo de nepre sentata bezono, dum ĝenerale oni povas bele kontentiĝi je la simpla formo *de*. Kaj tia uzo ja respondas al la grava (oficiala) principo : *neceso kaj sufiĉo*.

El la supraj »infanoj« *depost* estas ĝenerale rekonita. Sed kontraŭ *ekde* mi jam aŭdis riproĉajn voĉojn. Kvankam ĝi, uzita la unuan fojon verŝajne de Grabowski, ŝajnas al mi tute simpatia. Ĝi ne estas identa je *depost*, sed ĝi estas kvazaŭ la mallongigo de *depost ek*... Do : *ekde la konstruado de la domo* estas identa je : *depost la ekkonstruo de la domo*. *Ekde siaj lernojaroj* signifas : *depost la komenco de siaj lernojaroj*. *Ekde la ekzisto de la mondo* signifas : *de post la komenco de la ekzisto de la mondo*.

Ankaŭ la prepozicio *deĉe* (aŭ *de ĉe*) povas esti

tre utila. Ekzemple : »La infano estis forportata de ĉe sia patrino« — ĉi tie, sen la klariga ĉe, la frazo nepre estus dusenca.

Deper estas kvazaŭ ĵusnaskita. Ĝian enkondukon motivas tio, ke la prepozicio *de* post verbosubstantivoj montras ĝenerale la *objekton* de la ago, kaj tiel mankas prepozicio por montri tiaokaze la *aganton*. Lastatempe kelkaj volas helpi pri ĉi tio tiamaniere, ke ili volas esprimi la objekton per alia prepozicio (al, je). Sed tia uzo al mi ŝajnas kvazaŭ gramatika eraro. *Skribado al letero, nutrado al infanoj, akcepto je delegitoj* — al mi estas apenaŭ kompreneblaj unuavide. Ankoraŭ pli stranga, preskaŭ terura estas meti la objekton en *akuzativon*. Estas vere, ke ankaŭ *Zamenhof* skribis : *la uzado ĝin, sed nur unufoje*, en tute komenca periodo de la lingvo, kaj poste neniam plu. La uzado de la prepozicio *de* antaŭ la objekto de la verbosubstantivo fariĝis nepra regulo, kiun oni ne povas rompi ne ŝajnante nescianto de la lingvo.

Ĉu uzi do la prepozicion *deper* ? Certe, el ĉiuj ĝisnunaj proponoj ĝi ŝajnas la plej taŭga, ĉar eĉ ĝia enradikiĝo ne kunportus ĝian devigan uzon post pasivaj participoj. Oni povus do diri : *la nutrado de la infanoj deper la patrino*. Sed ĉu en tiaj okazoj ne sufiĉus ankaŭ la simpla *per* ? Laŭ mia opinio, ĝi neniam estigus konfuzon. Ekzemple : *la akcepto de la delegitoj per la urbestro*.

Sed plej oportune estas : eviti tiajn frazkonstruojn. Por tio oni havas ja plurajn eblajn.

1. Adjektivigi la aganton : la patrina nutrado de la infanoj ; la urbestra akcepto de la delegitoj ; ĝia uzado.

2. Uzi suborditan frazon anstataŭ la verbosubstantivo. Ekzemple : anstataŭ : »La invado de la romana imperio deper la barbaroj havis grandajn sekvojn,« — oni diru : »Tio, ke la barbaroj invadis

la romanan imperion, havis grandajn sekvojn.« Aŭ: anstataŭ: »Oni adoptis la politikon de incitado de unu regno kontraŭ la alia« — oni diru: »Oni adoptis la politikon: inciti unu regnon kontraŭ la alia.«

3. Transformi la pasivan verbon je aktiva verbo
Ekzemple: anstataŭ: »Li estis haltigita de la timo de la patro« — »Lin haltigis la timo de la patro.«
Anstataŭ: »Premita de la vido de tiuj kompatinduloj, li svenis« — »La vido de tiuj kompatinduloj tiel premis lin, ke li svenis.«

Sed se ĉiuj ĉi metodoj estas neuzeblaj, laŭ mia opinio nenio malhelpas uzi la prepozicion *deper* (se oni nepre ne volas kontenti je la simpla *per*).

Ci. Zamenhof en iu Lingva Respondo konsilas: »diri al ĉiu, ĉiuj kaj ĉio nur *vi*.« Sed li permesas la uzon de *ci*, se oni »tre sentas la bezonon«.

Ĉu oni do povas »tre senti« la bezonon de *ci*? En la unua periodo de la Literatura Mondo estis diskuto pri ĉi tiu temo. *M. Arco* pledis por *ci* kiel por »intima pronomo«, tri diskutantoj (kun mi kvar) rifuzis *cin*. Inter ili precipe grava ŝajnis al mi la opinio de *Selma Anner*, germanino, kies edzo estas finno, kaj kiu uzas Esperanton en la familia vivo, kun sia edzo kaj kun siaj infanoj, do por kiu Esperanto estas kvazaŭ ĉiutaga pano, kaj kiu tamen ne sentas ĉi tiun panon sengusta pro la manko de intima pronomo.

Kio estas la kaŭzo de tio, ke tiel multaj espistoj malŝatas la pronomon *ci*? Kial ĝenas *ci*? Ĉar min efektive ĝenas. Mi memoras pri verslibro, kies legon mi ĉesigis, ĉar pro la multegaj *ci* kvazaŭ agaciĝis miaj dentoj. *Ci* al mi tute ne faras impreson de intimeco, dorloto aŭ karesemo, mi aŭdas en ĝi fremdan, malagrablan siblon, kvazaŭ insulton. Kio do estas la kaŭzo de ĉi tiu sento?

Herbert Hammer, unu el la supre menciintaj

diskutantoj atribuas ĉi tiun senton al la »akra, por ne diri malagrabla« sono de *ci*. Ankaŭ mi havis la samam opinion. Sed *Mazzolini* vicigis al mi longan serion de tre belaj, tre agrablaj italaj vortoj, al kiuj la ĉarmon donas ĝuste la silabo *ci*. Li estas prava : *ci* propre ne estas malbelsona.

Laŭ mia nuna opinio, la malŝato kontraŭ *ci* havas alian, psikologian kaŭzon, nome, ke ĝi estas nekutima, fremda elemento en la lingvo. Oni mencias ĝin en la lernolibroj, sed oni neniam aplikas ĝin plu, oni ne trovas ĝin en la prozo kaj poezio de la plej bonaj espaj aŭtoroj, ĝi estas tute *teoria*, ĝi ne vivas, al ĝi ne ligiĝas asociacioj. Kaj — se mi volas alparoli iun tre intime, tre karese, tre dorlote, ĉu mi elektas por tio vorton, kiun mi devas elskrapi el sub la polvo sur mia lernolibro ?

Se en iu nacia lingvo oni alparolas la amatan estaĵon per *ci*, oni uzas tiun vorton, kiun oni aŭdis unue de sia patrino, kiun oni uzis parolante kun siaj plej bonaj amikoj, per kiu oni alparolas Dion. Amo, intimeco kaj pieco kaŝas sin en la *ci* de la naciaj lingvoj. Sed en la Esperanta *ci* ? Nenio. Ĝi estas seka, nekutima, fremda vorteto, kaj oni devas konstante streĉi la atenton, por ne forgesi pri ĝi, por ne transgliti dum la parolo aŭ skribo al la pli komforta, pli kutima *vi*. En la verkoj de *ci*-istoj ne malofte oni trovas tiajn nevole elplumiĝintajn *vi*, anstataŭ la intencita *ci*.

La pronomon *ci* Zamenhof mortigis tuj post ĝia nasko. Mi estas certa, ke ĝi neniam reviviĝos. Ĝi ripozu do en paco !

La Esperanta Rimo

Esperanto estas la lingvo de muzike sonoraj rimoj. La klaraj vokaloj, la strikte distingitaj konsonantoj ebligas tiajn purajn kaj longe postsonorajn rimakordojn, kiajn oni trovas eble nur en la itala lingvo. Tamen, la lingvo ne estas riĉa je rimoj. Ĝia rimmalriĉeco ja estas bone komprenebla : la lingvo havas relative malgrandan radikaron kaj, ĉar la samaj gramatikaj formoj havas samajn finaĵojn, la nombro de rimoj preskaŭ egalas al la limita nombro de la interrimantaj radikoj. Ĉarpenti malgrandajn poemojn kun la eterna ripetado de ŝimaj »prarimoj« (koro-floro-odoro ; amo-flamo-ornamo ; bela-ĉiela-miela ; sento-vento-turmento ; lin-fin'-sin' ; loko-voko ktp.) ne estas malfacile, sed la tradukanto de pli formriĉaj poemoj ofte rompas al si senkonsile la kapon kaj sentas urĝan bezonon : plivastigi la tro striktajn kadrojn de la espaj rimreguloj.

Zamenhof kaj Grabowski uzis nur rimojn *purajn*. Sed ili tro ofte helpis sin per sufiksrimoj, per kunrimigo de samaj gramatikaj elementoj : anta-anta, iĝi-iĝi, ema-ema ktp. Ekzemple el la 12 rimparoj de »La Espero« kvin estas tiaj sufiksrimoj, inter la unuaj 50 rimparoj de Sinjoro Tadeo troviĝas 13 sufiksrimparoj. Do mem Grabowski, kiu la sufiksrimon tiel sprite baptis adasismo, estis tamen devigita ne malofte

uzi ilin. Kaj vane oni legas en la »Esperanta Versfarado« de *Parisot* kaj *Cart* : »Rimo konsistanta nur el gramatikaj finiĝoj estas foriginda«, la adasismoj ne estas ekstermeblaj, se oni ne helpas iamaniere pri la rimmalriĉeco, plimultigante la nombron de rime uzeblaj radikoj.

Do — oni devas helpi ! Ĉar la adasismoj estas tute senartaj, *malplenaj* vortripetoj, en ili mankas ĝuste la esenco de rimo : sama sonoro de *malsamaj* vortoj. Pro tiu ĉi grava manko ili faras impreson de senpoveco : oni ne trovas rimon, oni do ripetas la saman elementon. *Rapidanta-brulanta* por mi havas la saman rimefekton, kiel *rapida estas-brula estas*.

Por liberiĝi de ĉi tiuj mucidaj adasismoj, jam antaŭ dek jaroj mi ekuzis rimojn *nepurajn*. Mi tiam nomis ilin asonancoj, sed ili estis pli, ĉar ili baziĝis ne sole sur la *vokalsameco*, kiel la asonanco hispana, sed krome ankaŭ sur la *parenceco de la konsonantoj*. Kelkaj atakis, kelkaj sekvis min. Kaj, jen kio pravas la nepran neceson de la plivastigo de rimkadroj, penetris dume en nian poezion ankaŭ aliaj, alimaniერaj rimlicencoj. Kelkaj el ili estas tre bonvenaj, sed kelkajn mi tute ne povas aprobi.

En ĉi tiu studo mi volas prezenti, klarigi kaj kritiki ĉiujn klopodojn ĉi rilatajn, por laŭeble akceli per tio la *unuecon de rimado*, gravan, laŭ mia opinio. Krome, mi provos fiksi ankaŭ la rimterminaron.

La rimojn mi dividas en kvar grupojn.

1. *Pura rimo* : sameco de ĉiuj akcentaj kaj postakcentaj vokaloj kaj konsonantoj.

2. *Rimoido* : sameco de ĉiuj akcentaj kaj postakcentaj vokaloj, pli malpli granda malsameco de konsonantoj.

3. *Agordo* : sameco de ĉiuj rimelementoj escepte la akcentitan vokalon.

4. *Radikrimo*, aŭ *aborta rimo* : pura interrimento

de la radikoj, vokala kaj konsonanta malsameco de la finaĵoj.

La pura rimo kaj rimoido povas esti *ina* (akcento sur antaŭlasta silabo : granda-landa) kaj *vira* (akcento sur lasta silabo : pord'-kord', dum-sum', min-destin').

1. Pura rimo.

En la SIMPLA PURA RIMO ĉiuj rimelementoj (akcenta vokalo kaj postakcenta parto) estas la samaj. Ni povas distingi rimon *senkonsonantan* (tio-krio, veopereo), *unukonsonantan* (kara-amara, reĝo-seĝo), *dukonsonantan* (ardo-bardo, sendi-plendi), *trikonsonantan* (ventro-pentro, distro-filistro.)

APOGITA RIMO estas tiu pura rimo, en kiu samas ankaŭ la la antaŭakcentaj konsonantoj (bruo-truo, figuro-aŭguro, kristalo-piedestalo). En kelkaj poezioj, ekzemple en la angla, tiaj rimoj estas malpermesitaj. En Esperanto tiu ĉi malpermeso ne ekzistas, kaj estas nenia motivo ĝin fari. Tiom malpli, ĉar tiaj rim-apogaj konsonantoj estas tre bonvenaj, por nobligi adasismojn. Per ili estiĝas

APOGITAJ SUFIKSRIMOJ : hontema-pentema. kaptisto-kantisto, perdante-ardante, spertulo-fortulo, singultado-saltado, ŝanĝiĝi-ruĝiĝi, tranĉita-falĉita). Tiaj ĉi *noblaj adasismoj* estas vere belsonoraj, kaj tute egalvaloraj al la veraj rimoj.

SUPERRIMO mi nomas tiun rimon, en kiu rimas ankaŭ la antaŭakcentaj silaboj. Ĝi povas esti unusilaba (rumana-humana, deklami-reklami, lunatika-fanatika, klasika-brasika, kompata-trompata, suferita-merita, gavota-savota) kaj dusilaba (blondulin'-respondu lin, per la moto-perlamoto, posta horo — frosta koro). Sed ĉi tiuj plejparte estas rimludoj, ilia trouzo facile povas fariĝi komika. Plej utila estas la superrimo por fortigi la rimefekton de la tro malriĉe rimantaj personaj

pronomo: (sendas lin — defendas min, faras li — baras mi, aŭskultis ŝin-insultis lin).

Se en la superrimo la kontinuecon de la sonsam-eco interrompas malsama konsonanto; ni povas paroli pri *intermita superrimo* (granda ĝojo — landa vojo).

TRANSRIMO oni povas nomi tiun rimon, kie la lasta vortparo konsistas el la samaj vortoj, kaj la antaŭlasta vortparo rimas: venu jam — komprenu jam, amu ŝin — ornamu ŝin, riĉa estas — feliĉa estas, ordonu ilin — pardonu ilin. Inter superrimo kaj transrimo staras la

PSEUDOSUPERRIMO: rimantaj radikoj kun la samaj sufiksoj (falema-batalema, sendita-vendita, amanta-flamanta, disigi-kisigi). Kompreneble ĉi tiuj transrimitaj, aŭ superrimitaj adasismoj estas plenvoloraj puraj rimoj.

ADASISMOJ, sen apoga konsonanto kaj sen transrimo estas nepre evitindaj. Maksimume en tiaj okazoj oni povas allasi ilin, kiam la sufikso, en unu aŭ ambaŭ rimvortoj, jam tiel kunfandiĝis kun la radikoj, ke ili kune kvazaŭ formas novan radikon: *homaro-arbaro*, *rideti-kolereti*, *virino-katino*, *pafilo-kuracilo*. Sed la participaj finaĵoj, aĵo kaj eco, igi kaj iĝi kaj precipe *adas* estas neniel ekskuzebaj adasismoj.

Ĉi tie oni povas mencii la LAMAN RIMON rimon inter jambaj kaj trokeaj verspiedoj: venkisen kis', amas-amas', tamen-ciklamen'. Laŭ la espa prozodio, ĝi estas tute ne uzebla.

2. Rimoidoj.

En la rimoidoj la akcenta kaj postakcenta vokaloj estas la samaj, sed la konsonantoj pli-malpli

diferencas. De la grado de ĉi tiu diferenco dependas la *rimefekto* de la rimoidoj.

Kio estas rimefekto? Tiu sento de la aŭskultanto, ke la versfinoj sone *konformas* unu al la alia. La konformeco kompreneble estas plej perfekta, se la versfinoj sone *samas*. Sed la senton de konformeco povas veki ankaŭ tio, ke la versfinoj sone *similas*. Sur ĉi tiu simileco baziĝas la uzo de rimoidoj. Ju pli granda la simileco, des pli perfekta la rimoido.

El ĉi tio sekvas, ke la plej perfektaj rimoidoj estas la

PARENCRIMOJ. Tiel mi nomas tiun rimoidon, en kies rimvortoj la konsonantoj, aŭ unu konsonantparo, estas *parencaj* inter si. Ĉi tiu parenceco baziĝas sur fonetikaj leĝoj. Por komprenigi tion mi skizos pretere la estiĝon de la konsonantoj.

La konsonantoj naskiĝas per tio, ke la aerfluo, venanta tra la buŝo, trovas malhelpon, kiu povas esti

1. plena, kiun la aerfluo venkas por momento kaj en ĉi tiu momento, kvazaŭ per eta eksplodo, estiĝas la voĉo (konsonantoj *momentaj*, aŭ *plozivoj*: bo, po ; do, to ; dzo, co ; ĝo, ĉo ; go, ko),

2. malvastiĝo de vojo, kiun la aerfluo pene trairas kaj dum ĉi tiu trapenetra estiĝas la voĉo (konsonantoj *daŭraj* aŭ *frikativoj* (vo, fo ; zo, so ; ĵo, ŝo),

3. diverĝo de la aerfluo duflanke de la lango (lo, ro),

4. devio de la aerfluo tra la nazo (mo, no).

Krom ĉi tio la konsonantojn difinas la loko de la malhelpo (naskloko), kiu povas esti

1. la du lipoj (konsonantoj *lipaj*: bo, po ; vo, fo ; mo)

2. lango kun dentoj (konsonantoj *dentaj* : do, to ; zo, so ; no ; ro ; lo)

3. lango kun gingivo (konsonantoj *gingivaj* : dzo, co)

4. lango kun palato (konsonantoj *palataj*) : ĵo, ŝo ; ĝo, ĉo)

5. gorĝo (konsonantoj *gorĝaj* (go, ko).

Kiel ni vidas, naskloko kaj estiĝmaniero estas la samaj ĉe la sekvantaj konsonantparoj :

bo-po do-to ĝo-ĉo go-ko ro-lo
vo-fo zo-so ĵo-ŝo

Krome, la naskoloko estas malsama, sed la vojo de la aerfluo estas sama ĉe la konsonantparo :

mo-no.

Ĉi tiuj konsonantparoj estas *parencoj unuarangaj*. La parenkrimo ilin uzas, kvazaŭ ili estus konsonantoj *samaj*. Escepte la lastan (mo-no), ili diferencas nur per tio, ke la unua estas akompanata de laringvibro (konsonantoj voĉaj) kaj la alia ne (konsonantoj senvoĉaj). Ĉe ro la vibro okazas ne en la laringo, sed en la naskloko, inter lango kaj dentoj.

Duarangaj parencoj estas tiuj konsonantoj, kiuj samas laŭ naskloko kaj laringvibro, sed malsamas laŭ estiĝmaniero. En la supra tableto ĉi tiuj parencoj staras unu sub la alia. La kunsonoro de tiuj ĉi paroj estas multe pli malbona, ili plejparte tute ne taŭgas, kiel rimantaj paroj. Pri kelkaj el ili ni ankoraŭ parolos poste.

Inter la unuarangaj konsonantparoj oni povas starigi certan vicon de rimvaloro. Plej bonaj estas ĝo-ĉo, ĵo-ŝo, zo-so, vo-fo, bo-po. Malpli bonaj : go-ko, do-to. Poste : ro-lo. Malplej bona : mo-no.

La parenkrimo povas esti :

1. *simpla*, kiam la akcentan vokalon sekvas nur po unu konsonanto, parencaj **inter** si : aĵo-paŝo, vivo-soifo, suĉi-ruĝi, trupo-nubo, nuko-jugo, vazo-paso, bruta-nuda, teruro-okulo, pasema-venena. (Rimarku, kiel malforte kunsonoras la du lastaj parenkrimoj, rilate al la antaŭaj.)

2. *duobla*, kiam la akcentan vokalon sekvas po du konsonantoj, kaj ambaŭ estas parencaj al la respektivaj konsonantoj de la alia rimvorto : fremda-penta, polvo-orfo, migra-tikla.

3. *kombina*, kiam apud la konsonantoj parencaj troviĝas ankaŭ konsonantoj samaj. Ĝi povas esti

a. *antaŭkombina*, kiam la samaj konsonantoj antaŭas la parencajn : planto-lando, korvo-orfo, korpo-sorbo, vigla-nigra.

b. *postkombina*, kiam la parencaj antaŭas la samajn : kadro-patro, mildo-birdo, fremda-plenda, ĉerko-velko, tikla-vigla.

c. *interkombina*, kiam la samaj ĉirkaŭfermas la parencon : montri-tondri, vintro-cindro, ĵonglo-onklo.

Plej bonaj estas la interkombinaj kaj postkombinaj parenkrimoj, sed ankaŭ la antaŭkombinaj havas tre bonan rimefekton, kaj estas tute egalvaloraj al la pura rimo. La duoblaj parenkrimoj, kontraŭe, estas pli malfortaj rimoj kaj tial prefere evitindaj.

Helpate de kombino, oni povas uzi ankaŭ duarangajn parenctarojn (sabro-kadavro, korpo-orfo, penso-intenco) eĉ konsonantarojn ne parencajn : go-do (fingro-cindro, hidro-migro).

Ankaŭ la vokalo ne estas indiferenta. U, kiel tre »penetra« vokalo, fortigas la rimefekton : brulo-muro estas pli bona rimo ol belo-vero, aŭ baro-falo.

Tre bone oni povas plifortigi la rimefekton de malfortaj parenkrimoj per superrimado. Venĝema-

matena, korbato-irado, ĉagrena-plorema estas ne tre fortaj rimoj, sed venĝema-senĝena, korbato-sorbado, ĉagrena-flagrema estas rimoj eminentaj.

Entute la uzado de parenkrimoj ne estas tiel mekanika afero, kiel la uzado de rimoj puraj. Ĝi donas al la poeto abundan okazon, montri sian lerton kaj guston ankaŭ ĉi rilate. Ĝi estas vere la »alta skolo« de rimado.

La uzo de la parenkrimoj ne baziĝas sur la malpura elparolo de la konsonantoj. Ĉiujn konsonantojn parencajn oni povas elparoli pure kaj klare. Ilia uzo baziĝas sur la alcutimiĝo : *elaŭdi kunsonoron el sonoj parencaj*.

Tia alcutimiĝo ne estas ia speciala postulo, metita nur kontraŭ Esperantistoj. La parenkrimojn ja konas kaj uzas ankaŭ multaj naciaj poezioj.

Ekzemple en la germana poezio tia admirinda majstro de formo, kia estas *Rainer Maria Rilke*, abunde uzas tiajn rimojn : rot-Tod, Gestalt-Wald, sind-beginnt. Ĉiu tiuj estas ja viraj rimoj, do, oni diras, eble allaseblaj. Sed ĉe li oni povas trovi ankaŭ la virinan rimon : Inseln-blinzeln, kaj ĉe Schiller : vergelten-melden, Erde-Schwerte, Bote-Tode, Schosse-Rose, vergleichen-neigen, Löwen-Höfen.

La franca lingvo vere ne bezonas iri trans la pura rimo, ĝian rimadon ja enviinde helpas la nazsono, kiuj englutas post si ĉiujn konsonantojn, kaj per tio tute perfektaj rimoj fariĝas ekzemple : quand-suffocant, degoutant-longtemps. Tamen oni kelkfoje uzas parencajn konsonantparojn, kiel konsonantojn apogajn (consonne d'appui). *Dorchain* en sia »L'art de vers« diras tolereblaj : vertu-pendu, assoupie-Arabie, philosophie-suivie, confiner-régner. Kaj ĉe la simbolistoj oni trovas ankaŭ veraĵn parenkrimojn : monte-blonde, funèbres-lèvres.

Ankaŭ en la rimriĉa itala lingvo oni uzas rimoi-

dojn, precipe en la popola poezio. En la kolekto de Levi: »Fiorita di canti tradizionali del popolo italiano« ĉiupaĝe troviĝas tiaj rimoj: terra-bella, Roma-persona, eĉ, sempre-crescente kaj nato-capo.

En la hispana kaj kataluna poezio ĝis nun floras la asonanco: rimvortoj kun nura vokalsameco.

La parenkrimo do principe ne estas fremda al la devenlingvoj de Esperanto, sekve ĝi ne devas esti fremda ankaŭ al Esperanto mem. Tiom pli, ĉar Esperanto nepre bezonas ĝin.

Kaj ĉar la parenkrimo baziĝas sur fonetikaj leĝoj, al ĝi facile povas amikiĝi ankaŭ tiuj, en kies nacia lingvo tiaj rimoj mankas. Tiom pli, ĉar ilin helpas ankaŭ la *trompiĝo de la orelmemoro*. La rimoj ne staras unu apud la alia, ilin ja disigas pli malpli longaj verslinioj. Dum la atento al la enhavo de la verso oni ne fiksas precize la sonoron de la unua rimvorto, havas pri ĝi nur duonklaran memoron, kiun tute bone kontentigas ankaŭ la rimo parenca. Povas okazi al principa malamiko de parenkrimoj, ke li simple ne rimarkas la parenkrimojn en deklamata poemo. Kompreneble la okulojn oni ne povas trompi, precipe se oni ĉasas la nepurajn rimojn kun ruĝa krajono en la mano. Sed verso estas por oreloj. Se la anglaj okuloj kontentas pri *repose-knows*, *powers-hours*, *grew-trough*, ankaŭ la Esperantaj povas kontenti pri *dolĉa-sorĉa* kaj *dimanĉo-ŝanĝo*.

Per la uzo de la parenkrimoj evidente plilarĝiĝas la ebloj de rimado. Kelkaj oftaj sufiksoj, kiuj en la lingvo estas preskaŭ tute sen rimo, ricevas rimkunulojn. Ekzemple *iĝ*, kiu havas la solan rimkunulon *negliĝo*, ricevas naŭ novajn rimfratojn, inter ili la oftajn *feliĉo*, *riĉo*, *sufiĉo*. *Aĵo*, same senfrata rimvorto, ricevas rime la vortojn finiĝantajn per *aŝo*. *Ebla* la vortojn finiĝantajn je... *ebra*. Kunfandiĝas la

rimgrupoj *aĉ* kaj *aĝ*, *amb* kaj *amp*, *ald* kaj *ard*, *agr* kaj *akr*, *ank* kaj *ang*, *arm* kaj *alm*, *arm* kaj *arn*, *atr* kaj *adr*, *abr* kaj *apr*, *alt* kaj *art*, kaj same ĉe la ceteraj vokaloj. *Fremda* ricevas rimojn je... *enda*, *nepra* je... *ebra*, *enigmo* je *igno*, ktp. Rimaro enhavanta ĉiujn bonajn kaj konsilindajn parencrimojn certe estus granda helpo, ĝojige plifaciliganta laboron de la poetoj.

Pluajn rimgrupojn kunkroĉas la

PLUSKONSONANTA RIMO. Tiel mi nomas tiun rimoidon, en kiu unu rimvorto havas inter la rimelementoj je unu konsonanto pli, ol la alia. La pluskonsonanto povas esti

1. la konsonanto *jo*. Ĉiokaze *j*-konsonanta vorto rimas kun senkonsonanta rimvorto. Ekzemple :

Filo de paŝao haltus ja neniam,
Sed falegis teren la ĉeval' sub li jam.

Lamente, plore kaj kun veo,
Ŝin oni portis al tombejo.

Tiu ĉi rimspeco donas bonan rimefekton nur ĉe la rimvokaloj *e* kaj *i*. Nome post ili, se ilin sekvas vokalo, neeviteble oni prononcas mallongan *jo*-similan sonon. Post *a*, *o*, kaj *u* tia sono ne aŭdiĝas. Tial ekzemple *balao-kajo*, *troa-ĝoja*, *plua-tuja* apenaŭ taŭgas kiel rimoj. Maksimume en plurala formo, kaj ne tuj-sekve, estas uzeblaj tiaj rimoj. Ekzemple :

Kiel sur la pompaj vojoj
Sunoj sur la firmament'
Gaje marŝu, frata gent',
Kiel venki la herooj.

2. pluskonsonantoj povas esti *ro* kaj *lo* (kaj *to* en la sola rimo : sankta-... anta). Ĉiokaze la rimvortoj

devas esti almenaŭ dukonsonantaj (krom la pluskonsonanto). Ekzemple : *simple-grimpe, tondro-ondo, ringo-pinglo, estingo-fingro, inda-cindra, angla-sanga, teksto-dekstro*. Jen kelkaj versoj kun nuraj pluskonsonantaj rimoj :

Je la sonoj de l'orkestro,
Brilegante, en orvesto,
Dekollite, venis multaj
Belulinoj marmorŝultraj,
Brilis brustoj alabastraj,
Pompis la trenaĵoj vastaj,
Paŝis la virin-taĉmento,
Haltis en la ĉambrocentro,
Kie tronis, por akcepto,
Mem la reĝo kun kron kaj sceptro
Nun, legonte festan tekston,
Li eklevis sian dekstron.
Kaj ekfulmis sur la fingro
Lia brilanta ringo...

Jen, kiel oni vidas, la rimvaloro de ĉi tiu rimoido apenaŭ estas malsupera al la puraj rimoj. Malpli perfektan rimefekton havas la

PRESKAURIMO. En ĉi tiu rimoido la rimelementoj samas ĝis la postakcenta vokalo inkluzive, sed post ĉi lasta la rimvortoj diverĝas. Ekzemple : *hieratŭfieran*.

Ĝia rimvaloro dependas de la grado de la diverĝo. Tute bona ĝi estas, se la diverĝantaj finkonsonantoj estas parencaj inter si : *tiam-alian, krion-tiom*. Ne fuŝas la rimefekton la manko de akuzativa finaĵo en unu el du *pluralaj* rimvortoj :

Lernis mi la *vortojn*,
Artojn de la Sci',
Nun per *spiritfortoj*
Mem miraklos mi.

Pli surda estas la rimo, se la finkonsonantoj tute malsame sonas : *diaj-mian, groteskaj-preskaŭ*.

Waringhien atentigis min pri tio, ke per la uzo de tiaj preskaŭrimoj oni povas fari rimvortojn el la aŭ-finaĵaj vortoj, kiuj cetere tute perdiĝas por la rimado. Vere, tiuj ĉi vortoj estas tute ekzilitaj el la societo de rimvortoj, kaj certe multajn poetojn jam ĉagrenis tio, ke Zamenhof, ni konfesu, sennecese, tiel apartigis, krom la prepozicioj ankaŭ purajn adverbojn, kiuj estus eminentaj rimvortoj (*morgaŭ, adiaŭ, hodiaŭ, ankaŭ, preskaŭ, hieraŭ, almenaŭ, apenaŭ, ankoraŭ, kvazaŭ*), se ili havus la naturan, adverban e-finaĵon. Nu, pri ĉi tio oni jam ne povas helpi, kaj tial eble akcepteblaj estas : *morgaŭ-zorgaj, ankaŭ-dankan, preskaŭ-plenkreskaj*, do tiaj preskaŭrimoj, en kiuj la radikrimado estas tre forta, almenaŭ dukonsonanta. Super-rimo bone akceptebligas ankaŭ aliajn diverĝojn (*trompataj-kompatan, strofetoj-profeton*). Sed tute fuŝiĝis la rimefekto, se unu el la rimvortoj havas en la fino la siblan so. Ne nur *anstataŭ-kompatas*, sed eĉ *preskaŭ-kreskas*, aŭ *morgaŭ-zorgas* estas tute senrimaj rimoj. Sola escepto estas la

TRANSKURA RIMO. En ĉi tiu speco de preskaŭrimo la *unua* rimvorto havas en la fino pluskonsonanton, kaj la sekvan version komencas vokalo, tiel, ke la pluskonsonanto kvazaŭ transkuras al tiu ĉi vokalo. Ĉi tiun rimoidon oni povas uzi precipe en mallongaj versoj, kaj en tujsekvaj rimoj. Ekzemple :

Li atendas
En la tendo.

Li parolas
En petola
Maniero...

Oni prononcas kvazaŭ : Li atendo — S en la tendo ; Li parola — S en petola — Maniero...

Ni menciŭ ankoraŭ la INVERSAN RIMON, kun la malsama sinsekvo de rimkonsonanto : *ingo-digno patro-karto, pasko-vakso*. Ekzemple, ĉe Baghy :

Kaj kolero lafa de la Etno
Furiozu en la detrusento !

Fortan rimefekton la inversa rimo ne havas, ĝi estas jam transiro al la *asonancoj*.

ASONANCO VOKALA, aŭ simple Asonanco estas *sameco de vokaloj*, nenio pli. Tamen, inter la asonancoj oni povas distingi kvin specojn.

1. *Pseŭdoasonanco* mi nomas la interrimadon de plurkonsonantaj rimvortoj kun sen-, aŭ unukonsonantaj rimvortoj. Ekzemple : *forte-bone, arde-tamen, veni-sendis, klingo-iros*. Pseŭdoasonanco mi nomas ilin, ĉar en ili la vokalsameco estas nur ŝajna. Nome, la vokalo de la sen- kaj unukonsonantaj rimvortoj estas longa, tirata, dum tiu de la plurkonsonantaj estas mallonga. En la supraj rimparoj do ne nur la rimefekto, sed eĉ la asonancefekto tute mankas.

2. En la *krudaj asonancoj* interrimas, sur la nura bazo de vokalsameco, plurkonsonantaj kun plurkonsonantaj, unu-, aŭ senkonsonantaj kun unu-, aŭ senkonsonantaj rimvortoj, kaj la *finajoj malsamas*. Ekzemple : *arbo-paŝtos, veni-ĉesis, tuj-plu, kria-iras, tamen-kare, morto-tondros*.

3. La *elsonoraj asonancoj* diferencas de la krudaj per tio, ke en ili la *finajoj samas*, aŭ maksimume tiom diverĝas, kiom ĉe la preskaŭrimoj. Ekzemple : *granda-vasta, belo-premo, sendi-serĉi, vidas-timas, ne pli-nek mi, por mi-sondi, kruĉo-muro, turoj-muĝon, morgaŭ-sonĝaj*.

Ĉi tiun specon de asonanco mi proponus por la traduko de mezepokaj poemoj asonancitaj. Ĉar en ili la dek-dekdufoje ripetigantaj samaj vokaloj de vers-finoj, helpate de la sameco de finaĵoj, nepre sentigas ian regulecon eĉ al tiuj, kies nacia poezio neniam uzas asonancojn. Sed la krudaj asonancoj, kun la malsameco de la finaĵoj, kaj precipe la pseŭdoasonancoj, kun sia vokalmalsameco, nepre fuŝus por ili la asonanc-efekton.

Cetere, eble preferinde estus tute forlasi ĉi tiun enuan, kaj malmulte art-efektan formon, kaj traduki ĉi tiujn asonancitajn poemojn simple en paraj rimoj.

4. la kvara speco de asonancoj estas la *milda asonanco*, transiro al la parenkrimoj. Ĝin karakterizas:

a. severa vokalsameco (konsonantnombro !), b. severa sameco de finaĵoj, c. certa simileco de konsonantoj.

Nome, ĉi tiujn oni povas dividi en kvar grupojn:

1. obtuzaj : bo, po, do, to, do, go, fo, vo,
2. siblaj : so, zo, co
3. ŝmacaj : ŝo, ĵo, ĉo, ĝo,
4. fluaj : ro, lo, jo.

En la mildaj asonancoj la konsonantoj de ĉiu grupo rimas inter si. Krome, flukonsonantaj vortoj rimas kun senkonsonantaj. Ekzemple : *knabo-tago*, *amiko-sendito*, *paŝo-kaĝo*, *vazo-placo*, *patrujo-muro*, *truo-brulo*, *pereo-tero*.

En kelkaj, maloftaj, neeviteblaj okazoj oni povas, inter la puraj rimoj, toleri ankaŭ tian mildan asonanon. Sed oni devas ilin uzi ekstreme ŝpare, ĉar ilia trouzo faras tute obtuzan muzikon, kaj prenas de la verso ĉian sensan ĉarmon. Eble iom pli kuraĝe oni povas uzi la

5. *kombinan asonancon*, en kiu troviĝas apud la pli malpli simila konsonanto ankaŭ konsonanto sama. Precipe la postkombinaj asonancoj estas akcepteblaj. Ekzemple: *cindro-fingro*, *sonĝo-forĝo*, *patra-arka*, *pentro-Decembro*, *korno-fojno*, *enigmo-ritmo*, *bapto-lakto*.

Resumante la rimoidojn, oni povas starigi laŭ rimvaloro la sekvantan tabelon:

Parencrimo. Pluskonsonanta rimo.

Transkura rimo.

Kombina asonanco.

Milda asonanco.

Inversa rimo.

Preskaŭrimo.

Elsonora asonanco.

Kruda asonanco.

Pseŭdoasonanco.

La rimoj, ĝis kombina asonanco, estas senĝene uzeblaj anstataŭ pura rimo. Ĉi lastan, preskaŭrimon, inversan rimon, mildan asonancon oni uzu tre ŝpare, nur en ekstrema neceso. Elsonoran asonancon sole en la traduko de asonancitaj poemoj. Krudan asonancon kaj pseŭdoasonancon neniam.

3. *Agordo*.

La espa nomo de ĉi tiu rimspeco kaj eble ĝia unua uzo en Esperanto, estas de *Waringhien*. Cetere, ĝi ne estas malofta en la moderna franca poezio. En ĝi regas plena sameco de ĉiuj rim-elementoj, *escepte la akcentitan vokalon*. Ekzemple: *versa-farsa*, *cerbo-garbo*, *rondo-fundo*, *arbo-korbo*, *fiksas-teksas*.

Ĝi tute ne donas malbonan kunsonoron. Sed oni devas nepre atenti, ke la rimo estu forta konsonante, almenaŭ dukonsonanta; ekzemple: *oro-veluro*, *bel-*

pala, kviti-ŝuti tute ne donas rimefekton, el la unu-konsonantaj eble sole la ĝo-vortoj taŭgas : *reĝo-paĝo*. Krome, la vokaloj ne estu tro diferencaj (ekz. i kaj u). Pleje taŭgas la sekvaj paroj : i-e, e-a, a-o, o-u. Sed ĉe fortaj, trikonsonantaj rimoj oni povas fari escepton : *pentri-montri, pastro-lustro, decembro-ombro*.

Precipe kiel flankrimo ĝi estas bone uzebla :

Mi al li riverencis,
Sed li nur sidis mute,
Eĉ kapon ne balancis.
Mi konfuziĝis tute.

4. Radikrimo.

Mi nomas ĝin ankaŭ ABORTA RIMO. Ĉar en ĝi la radikoj bele interrimas, do la rimo koncipiĝas, oni esperas rimnaskon, kaj — la poeto abortas la rimon per tio, ke la finaĵoj iĝas tute malsamaj. Tiajn kompatindajn rimstumpojn ofte oni renkontas precipe ĉe niaj rusaj poetoj. *Superbela-anĝeloj, lando-grandaj, miele-pelas, fali-palajn* estas tiaj radikrimoj, por mi absolute senmuzikaj. Dum la aŭdo de poemo mi simple ne rekonas ilin, kaj dum lego mi devas serĉi por konstati ilian ĉeeston teorie.

Laŭ mia sento, kaj laŭ la sento de multaj diverslingvanoj, la rimoj elsonoras ĉe sia fino. Se ĉi tiu fino tute malsamas, ĝi kvazaŭ tro forta sordino, tute sufokas la akordan kunsonoron eĉ de la plej fortaj, trikonsonantaj rimradikoj.

La radikrimo estas pure teoria, gramatika rimado, donanta nenian sensan ĉarmon, nenian kontentigon de atendo, nenian dolĉan orektiklon. La radikrimo ne estas rimo.

Gi taŭgas maksimume por internaj rimoj, ĉar, kontraŭe al la parenkrimoj, kies rimefekto kreskas

per malproksimo, la radikrimoj devas esti senpere unu apud alia, por ke evidentiĝu la kaŝita radikrimado. Ekzemple :

Agordas kordojn de l' liut' ...

Jen, larme svarmas rim' post rim' ...

Modeste festas ritma danc' ...

Baghy : Stranga danco.

En Esperanto la elparolo de la vokaloj nepre estas, aŭ almenaŭ devas esti tre klara. Ĉi tiu klareco ebligas la uzon de la diversaj rimoidoj, sed aliparte tro evidentigas la vokalmalsamecon de rimvortoj. En la agordo la malsamajn finaĵojn ankoraŭ sekvas konsonantgrupo kaj tuta silabo, kio iom vualas la diverĝon. Sed se la malsama vokalo staras ĉe la fino, la rimo nepre dronas en surda tedo.

Krome, la radikrimo ja ne pliigas la nombrojn de eblaj rimoj, ĝi ebligas sole la kunrimigon de malsamaj gramatikaj formoj. Kaj la rimvortojn meti en saman gramatikan formon — tio ja, per la granda fleksebleco de Esperanto, ne estas malebla kaj preskaŭ ĉiam oni sukcesas pri tio kun iom da lerteco kaj pacienco.

Gramatika karaktero. Mozaikrimo.

En Esperanto plejparte kunrimas vortoj en samaj gramatikaj formoj : *homo-domo, granda-landa, venis-benis*. La ebloj de tiu frapanta rimado, kiu kunroĉas diversajn gramatikajn formojn, en nia lingvo estas tre limigitaj. Sed la rimefiko estas pli granda, se almenaŭ la gramatika karaktero de la rimradikoj diferencas. Ekzemple : *rapida-klarvida, ŝtono-admono, martele-bele* estas pli plaĉaj rimoj, ol *rapida-rigida, ŝtono-mono, bele-hele*. Kompreneble, ankoraŭ pli sur-

priza estas la rimo, se la gramatika formo de la rimvortoj tute diferencas. Kvankam ne multaj, troviĝas en Esperanto ankaŭ tiaj rimoj, parte el tutaj vortoj (brili-ili), parte t. n. *mozaikrimoj*, kies unu rimparto estas kunflikita el du vortetoj (brili-pri li). Grabowski kunmetis tutan poemon el tiaj rimoj: *oni-bastoni, zumi-du mi, punu-unu, por mi-dormi, ĉiu-radiu* (virinaj rimoj), *mem-ekprem', jam-skvam', ĉar-arbetar', tuj-patruj', ĝin-kvin.* (viraj rimoj) Spritajn mozaikrimojn ni trovas en la »Ŝiriĝis kordo« de Baghy: *ĝemi-ĉe mi, jam pli-ambli, senpardone-ho ne, solvi-ol vi, sekvi-nek vi.*

Rimaranĝo.

Kiel en ĉiuj aliaj poezioj, en Esperanto la ĉefaj rimaranĝoj estas:

Duona rimo, kiam el la kvar versoj rimas nur la dua kaj kvara inter si, la unua kaj tria estas senrimaj (skemo: *xaxa*):

Ŝi gvidis min al elfa grot',
Rigardis min kun kora ĝem',
La flam-okulojn fermis mi
Per kiso-prem'.

(*Keats*)

Para rimo; kiam interrimas du sinsekvaj versoj (skemo: *aa bb cc*).

La landon, kie floras la citronoj,
Oranĝoj oraj ardas en branĉkronoj,
De l' ĉielbluo blovas milda vent',
Laŭr' alte staras, mirto en silent',
Ĉu konas vi?...

(*Goethe*)

Alternativa rimo, aŭ *krucrimo*, kiam interrimas la unua kaj tria, kaj la dua kaj kvara versoj (skemo: *abab*):

Vent' frosta, klara nokto, sur neĝo ruĝmakuloj.
Mil bravaj viroj kuŝas sentombe **tie** ĉi,
Sen mov'. La man' sur glavo. Rigidaj la okuloj.
Kaj supre nigraj korvoj kun ĝoje graka kri'.

(*Leconte de Lisle*).

»*Ĉirkaŭprena rimo*, kiam interrimas la unua kaj
kvara, kaj la dua kaj tria versoj (skemo : *abba*) :

Ho najtingal', en arbitaj' sub floroj
Trilanta, dum en mut' la boskoj dronas,
Per freŝa fid' vi aman koron zonas,
Dum Majon danci gvidas gajaj Horoj.

(*Milton*)

Mezrimo, kiam la unua duono de verso rimas
kun la dua :

Ĉar songporte sin levas la Lun' kaj mi revas
Pri la bela Annabel Lee,
Kaj se levas sin stelo, mi revas pri l' helo
Okula de Annabel Lee.
Tiel dum la nokthoro mi kuŝas ĉe l' koro
De Ŝi : mia viv', fianĉino, trezoro ...

(*E. A. Poe*)

Kroĉrimo, kiam du (aŭ tri) versgrupojn, kon-
sistantajn el du (aŭ tri) interrimentaj versoj, kunkroĉas
la sama rimo (skemo : *aac bbc*) :

En la lulo, mola lulo,
Rozburgono, fil', etulo,
Dormu mielĉolĉe,
Kisi buŝon, ĉi gracion,
Kiel kisi patron vian,
Estas tiel ĉolĉe.

(*Ignotus*)

Krome, precipe en la t. n. liberaj versoj, ekzistas tute senordaj, kapricaj rimometoj.

La supraj skemoj estas uzeblaj, kiel memstaraj strofoj. Krome el ilia kombino formiĝas diversaj, pli severaj versformoj, el kiuj, en la hodiaŭa poezio, plej ofte estas uzata la soneto. Ĝi, en sia klasika formo, konsistas el du verskvaroj, plej ofte kun ĉirkaŭprenaj rimoj, kaj el du verstrioj, kun varia rimarangĝo. La du kvaroj, en la severa soneto, rimas ankaŭ inter si, jene : *abba abba*. Sed ofte estas uzata ankaŭ la pli libera formo : *abba cddc*. Ekzemplo :

Soneton de mi Violanta petis,
Neniam tiel premis min dilemo !
Laŭ [~]dir', ĝi estas dekkvar-versa skemo...
Jen — serĉe-serĉe mi tri versojn metis !

Ke mi ne trovos rimojn, mi timetis,
Sed — marŝas dua kvaro de l' poemo !
Alveni ĝis la Trioj : jen problemo,
Post tio mi la zorgojn jam forĵetis.

L'unuan Trion marŝas mi, konjekte,
Ke mi eniris ĝin dekstrapiede.
Ĉar per ĉi vers' mi finos ĝin korekte.

La dua jam ! Mi kredas, ke komplete
Mi faris dektri versojn, laŭprojekte.
Kalkulu nun ! Ĉu dekkvar ? Estas prete !

(*Lope de Vega.*)

La *tercino* konsistas el verstrioj, kies unua kaj tria versoj rimas inter si, kaj la meza rimas kun la unua kaj tria versoj de la sekva triopo, farante tiel seninterrompan ĉenon : *aba bcb cdc ded* ktp. Ekzemple :

Tra mi vi venas urbon de turmento,
Tra mi al la eterno de l' doloro,
Tra mi vi venas al damnita gento.

Justeco gvidis manon de l' Aŭtoro,
La Dia Povo levis volbon mian,
Plej Alta Saĝo kaj Praama Koro.
Kreaĵon ja samaĝas mi nenian,
Sole eternan : mi eterne daŭras.
Enire lasu for esperon ĉian.

(*Dante : Surskribo de la Infer-pordego.*)

La *okverso*, aŭ *okversa stanco* (ottava rima) konsistas el ses versoj kun alternaj rimoj, kaj el unu para rimo : *abababcc*.

Jen, riĉa tablo plenmetite pretas
Sur laga bordo, karaj manĝoj sure,
Kaj du knab'noj en la lag' ridetas,
Dum ban' petolas, ŝercas, trilas pure,
Kiu pli bone naĝas : ili vetas,
Poste ŝprucigas akvon ludplezure,
Nun ili dronas, nevideblaj estas,
Kaj naĝe, longe sub la akvo restas.

(*Torquato Tasso.*)

La ĉarma kaj facilmovia formo *rondelo* havas la jenan skemon : *ABba abAB abba A*. La majusklaĵ literoj signas samajn versliniojn. Ekzemplo :

For de l' vetero la mantel'
De vento, frosto, pluv' glacia,
Gi vestis sin per brod' radia
De klara, bela suna hel',
Bestaro, birdoj de ĉiel'
Laŭtas en lingvoj kanta, kria,
For de l' vetero la mantel'
De vento, frosto, pluv' glacia.

Argentajn gutojn de juvel'
Portadas, en livre' gracia
Riveroj, fontoj. Aĵo ĉia
Revestas sin per nova bel'.

For de l' vetero la mantel'.

(*Charles d' Orléans*)

Aliaj, ankoraŭ pli komplikitaj formoj, kiel ekzemple la *balado*, aŭ *gazelo*, apenaŭ estas ĝis nun reprezentitaj en Esperanto.

Ĉe la rimometo oni devas ankoraŭ atenti pri tio, ke oni ne metu apude rimojn, kiuj estas asonancoj inter si, ĉar tio havas tre ĝenan efekton. Ekzemple tute malbone efikas la jenaj krucrimoj: *kara-rava-para-flava*, *piko-cito-amiko-spito*. Eĉ, laŭeble oni evitu, ke apudaj rimoj havu la saman finaĵon, precipe se ambaŭ rimvort-paroj havas la saman nombron de konsonantoj. *Plekte-pete-rekte-ete* estas bona rimsekvo, sed *oro-muro-koro-ŝnuro* jam estas tre monotona. Ekzemple en la tre inspirita kaj varmsenta poezio de Stanislav Schulhof oni sentas teda, ke preskaŭ ĉiuj rimvortoj finiĝas je o.

Kaŝo de rimoidoj.

La plej bonajn rimoidojn: bonajn kombinajn parenkrimojn, pluskonsonantajn rimojn, kaj ankaŭ kelkajn kombinajn asonancojn, oni povas senĝene uzi kie ajn. Sed la malpli perfektajn rimoidojn kaj la agordojn konsilinde estas kaŝi, t. e. ilin meti tiamaniere, ke ilia nepureco kiel eble malplej evidentiĝu.

Ci rilate mi ripetas, ke, dum la rimefekto de la malsam-finaĵaj rimoidoj malkreskas per la malproksimo, la rimefekto de la samfinaĵaj rimoidoj kreskas per ĝi. Tial plejbone ili efikas en nesinsekvaj rimoj.

Ekzemple en alternaj rimoj, aŭ en la eksteraj rimvortoj de la ĉirkaŭprena rimo. Dum, ekzemple, *forĝo-sonĝo*, en senpera sinsekvo, ne tro kontentigas, en la ĉirkaŭprena rimo : *forĝo-blovas-povas-sonĝo* ĝi ŝajnas al mi akceptebla. En la klasika soneto, same, oni devas atenti precipe pri la bona kunsonoro de la najbaraj rimoj (mezaj rimoj de la du kvaroj, lasta rimo de l' unua, unua rimo de la dua kvaroj). La eksteraj rimoj de la kvaroj povas esti ankaŭ pli kuraĝaj rimoidoj, kaj la mezaj rimoj inter la du kvaroj povas eĉ asonanci. Ekzemple : *kompreni-floras-valoras-tremi premi-povas-blovas-ĝeni*. Per tiaj permesoj oni certe multe pli kapablos venki la malfacilaĵon, kiun, traduki en ĉi tiu rimriĉa formo, signifas en la rimmalriĉa Esperanto.

Krome, ĉe la alternaj rimoj la *paraj versoj* portas la *ĉefan rimon*, ĉe ili »elsonoras« la verso. La *malparaj versoj* ja povus esti ankaŭ senrimaj, ilia rimo, nomata de mi *flankrimo*, estas nur flanka ornamo, kvazaŭ lukso. Tial oni devas atenti precipe pri la bonsonoro de la rimo de paraj versoj, al kiuj estas direktata la ĉefa atento de la aŭdanto : la rimo de la malparaj versoj, ĝuste, ĉar ili estas kvazaŭ en ombro, povas esti ankaŭ pli malpli kuraĝa rimoido. Ekzemple tute bone sonas la jenaj rimarangoj : *tinto-kara-zinko-amara, centro-pala-novembro-vuala, plekto-iris-adepto-miris*.

Finvortoj.

Al poetoj. La supraj permesoj donas neprajn plifaciligojn, kaj ankaŭ riĉajn eblojn de elekto. Oni ne timu uzi eĉ kuraĝan rimoidon, se per ĝi oni gajnas fidelecon, naturecon de esprimo. Sed oni gardu sin de trouzo, ĉar la tro multaj nepuraj rimoj donas surdan muzikon, lignosonan, tedan, knaran, senharmonian poezion. Kaj la idealo devas esti ĉiam la pura

rimo kaj la forta, laŭeble postkombina parenkrimo.

Al kritikistoj. La rimo ne estas ia metafizika postulato, sed simple — ornamo. Inter certaj kadroj de akustikaj ebloj, sole de al kutimiĝo dependas, kion oni povas senti kaj ĝui ornamo. Oni povas kaj devas ellerni la aprezon de la rimoidoj.

Estas interese, ke eĉ la plej akraj kontraŭbatalantoj de la rimoidoj sentas, ke la klasikaj rimreguloj de Esperanto estas netaŭge severaj. Ekzemple unu el ili, recenzante la Faŭst-tradukon de Barthelmess, rekte riproĉas la tradukinton, ke li »kun tiaj nekontesteblaj kapabloj ne sentis, ke la ĝisnuna stato de la Esperanta poetiko malpermesas la tradukon de Faust.«

Nu, la uzo de rimoidoj volas helpi ĝuste por tio, ke ĉi tiu malpermeso fine malaperu.

Krome, mi asertas, ke la rimoidoj estas ne nur necesaj, ne nur lastaj rimedoj de malriĉo, kiujn pravigas sole la hungara proverbo: malriĉa homo kuiras per akvo. Ili donas ankaŭ kroman gajnon. Rimriĉaj lingvoj povas senfine varii siajn rimojn, porti ĉiam freŝajn kombinojn. En Esperanto la eterne ripetigantaj samaj rimoj baldaŭ iĝas tedaj. Nu, la rimoidoj donas agrablan variadon, interesajn disakordojn, post kiuj ree freŝe efektas eĉ la eluzita rimo pura. Oni pensu pri la muziko. Terure enua ĝi estus, se ĝi konsistus sole el puraj harmonioj. Disonancojn oni bezonas, por povi plezuri pri la solvanta pura akordo. Rimoidojn ni bezonas, por povi vere ĝui niajn rimojn purajn.

Esperanta elparolo

Ĉu la absolute unueca Esperanta elparolo estas ebla? Apenaŭ. Ĉiu lingvo nacia havas sian propran »muzikon« specialan, kiun la anoj de la respektiva lingvo pli-malpli transportas en sian Esperantan parolon. Lerta imitanto bone povas amuzi internacian socion per la prezento de ĉi tiuj »muzikoj«.

La komprenon tio ne malhelpas. Kompreneble oni devas respekti la akcentregulon, oni devas klare elparoli la konsonantojn, klare distingi inter s kaj z, b kaj p, d kaj t, ktp. Kaj ĉi rilate, eĉ se ne praktike, almenaŭ principe, konsentas ĉiu espisto.

Sed la »muzikon« de la lingvo donas la vokaloj, kaj en ilia elparolo estas grandaj diferencoj. Ke ĉi tiuj diferencoj tamen ne naskas nekomprenon, tion oni povas danki al la cirkonstanco, ke Esperanto havas nur la kvin trunk-vokalojn (a e i o u) kaj kiel ajn oni ilin fermu, aŭ malfermu, aŭ garnu per flanksonoj, ili apenaŭ estas misformeblaj ĝis nereconebleco.

Tamen, oni devus fiksi la unuecan Esperantan elparolon, la propran »muzikon« de la lingvo. Ian idealan modelon de muziko, kiun almenaŭ priklopodi devus ĉiu espisto.

Ĝis nun ekzistas du ĉefaj prononcmanieroj en Esperanto.

La unu estas la zamenhofa. Tio estas : elparoli

la vokalojn ĉiam egale, duonfermite, nek tro longe, nek tro mallonge kaj signi la akcenton sole per la iometa plilaŭtigo de la vokalo.

Estas interese, ke tiu ĉi prononcmansiero tute ne fariĝis ĝenerala,* kvankam por ĝi pledis la nepra aŭtoritato de Zamenhof, kvankam ankaŭ nun de plej kompetenta oratora katedro oni deklaras ĝin modela.

Kio estas la kaŭzo de ĉi tiu obstina malobeo?

Laŭ mia opinio ekzistas du kaŭzoj: unu teoria kaj unu praktika.

La teoria kaŭzo estas, ke Esperanto konsistas ĉefe el romanaj, parte el anglo-germanaj elementoj, laŭ vortaspekto kaj sonstrukturo ĝi estas plej parenca al la itala lingvo, dum la zamenhova prononcmansiero

* Post la apero de parto el ĉi tiu artikolo en la Literatura Mondo venis en miajn manojn (per la komplezo de sro Aleksandro Schwartz) artikolo de *Eugen Wüster* pri la sama temo. (Germana Esperantisto 1923. Junio.) Goje mi vidis, ke miaj konstatoj preskaŭ tute konformas al tiuj de nia ŝatata Esperantologo. Ankaŭ li diras, ke, laŭ la prononcado de la plej spertaj espistoj diverslandaj, Esperanto havas multe pli ol nur kvin vokalojn, diferencajn inter si laŭ longo kaj koloro. Kaj li diras (en mia traduko):

»La »meza« aŭ »duonlonga« elparolo, rekomendata de multaj Esperanto-instruistoj, kontraŭas la parolaparaton de pluraj popoloj kaj farus la lingvon tre monotona.«

Ankaŭ li akcentas la *aposteriorian*, do simple *konstatan* karekteron de ĉi tiuj elparolprincipoj, kaj raportas eĉ pri elparol-provoj, faritaj de li per diversnaciaj (germana, angla, sveda, rusa) espistoj. Ĉe tiuj ĉi provoj li trovis relative tre malgrandajn diverĝojn de la elparolprincipoj, kaj ankaŭ la diverĝoj ŝajnis deveni el okazaj kutimoj, ĉar ili ne konformis al la elparolo de aliaj vortoj el la sama kategorio; krome, la diverĝoj ĉe la diversaj provpersonoj ĝenerale ne konformis unu al la

estas slava, kaj speciale pola, do fremda al la elementoj, el kiuj konsistas la lingvo.

La praktika kaŭzo estas, ke la zamenhofa elparolo, postulante la egale duonlongan elparolon de la vokaloj, ne permesas, ke oni ripozu iom ĉe la akcentoj. Per tio ĝi trudas al la parolanto troan rapidecon kaj tia truda rapideco nek por la parolanto, nek por la aŭskultanto estas bonvena en lingvo, kiu estas nenies lingvo gepatra. Eĉ okaze de tre klara vokalformado konfuzas ĉi tiu maŝinpafilmaniera, malmulte nuancita elparolo. Kiom pli, se tiel parolus ekzemple aŭstralia samideano !

Jen kial, malgraŭ ke ĉi tiu prononcregulo estas tre simpla, oni ne povis amikiĝi al ĝi, kaj, laŭ mia

alia. Tio signifas, ke la principoj restis validaj. »Meza« elparolo tute ne estis observebla.

Pri la unua parto de la artikolo de Wüster, kiu pritraktas la *silabadon* en Esperanto, mi havas nun nenion por diri. Pri la elparola parto nur du rimarkojn mi faras :

1. La maldekstrenŝoviĝo de la akcento en la kunmetitaj vortoj : *libertempo*, *alivesti* tute ne ŝajnas al mi apriorie malĝusta. En Esperanto estas fera principo prononca : *manko de du sinsekvaj akcentoj*. Ĉi tiu principo validiĝas ankaŭ en la supraj prononcoj. La *klariga*, aŭ *lerneja* elparolo povas ja insisti pri : *alivesti*, *libertempo*. Sed en poemoj *alivesti* nepre povas esti uzata en anapesta ritmo.

2. Laŭ mia ĝisnuna sperto oni ne prononcas longe la finaĵojn *i* kaj *u* en *iri*, *iru* ktp., nek la finaĵojn *oj* ; la longa prononco de ĉi lasta eĉ estus malbela. Ilia longa prononco eble estas nur nacia apartaĵo (precipe franca). Sama erara nacia apartaĵo estas ĉe la hungaroj la longa prononco de la ofinaĵo (*kóró*, *ámó*), devenanta el tio, ke en la hungara lingvo ekzistas la longa *ó*, kiel finaĵo de participo.

sperto dum kongresoj kaj en la radio, oni uzas prononcmanneron alian, multe pli komplikitan. Ĉi tiun »herezan« prononcmanneron, praktikatan de la plejmulto de espistoj mi provas ekspliki en la sekvantaj reguloj :

1. Ĉiu vokalo estas *duonfermita*.*

2. La akcentaj silaboj estas longaj, la senakcentaj estas *vokale* mallongaj.

* *L. Thomson* (Australio) en sia Diskuto (L. M. 1931. Junio) malaprobas, ke mi diras la espajn vokalojn duonfermitaj. Laŭ li ili estas ĉiam tute malfermitaj.

Nu, ĉi tiu regulo de Thomson estas eble taŭga por anglalingvanoj, kiuj parolas kun *tro fermitaj* vokaloj, kiujn do oni devas instigi, ke en Esperanto ili uzu siajn vokalojn plej malfermitajn. Sed ekzemple la hungaroj havas tre malfermitaj e-sonon, kiun alinaciano aŭdas *i*. Kaj ili ankaŭ uzas en Esperanto tiun ĉi e-sonon, tiel ke oni konstante devas bridi ilian malfermemon. Aliparte, la hungaroj havas en sia lingvo tro fermitan a-sonon, kiu alinaciano aŭdas preskaŭ *o*. Por ili do en ambaŭ okazoj plej konvena estas la regulo : parolu *duonferme*. Kaj same konvenas ĉi tiu regulo por ĉiuj en kies lingvo ekzistas tro fermita, aŭ tro malfermita vokalo. Ĉar la *duonferma* prononco signifas nur, ke oni nek tro fermu, nek tro malfermu, oni parolu meze, puran vokalon, kiel en la itala lingvo.

Cetere troa malfermo de la buŝo dum la elparolo de ĉiuj vokaloj, estus tiel granda peno por la buŝmuskoloj, ke tion oni ne povas daŭre plenumi.

Krome la akcento de mia artikolo ne estis sur la *fermo-maniere*, sed sur la *longeco* de la vokaloj.

Sdo Thomson krome indigniĝas pri mia rimarko rilate la aŭstralian samideanon. Pardonon, mi tute ne volis ofendi. Mia rimarko aludis nur tion, ke, laŭ mia sperto dum kongresoj, la aŭstralianoj uzis plej forte la anglan »muzikon«, t. e. la garnadon de la vokaloj per flanksonoj. Tio devenas certe el ilia izolateco. Ĉar je la fino de la kongreso ili ĉiam parolis pli pure, pli klare, pli *itale*.

3. La elparolo de vokalo en akcenta silabo dependas de tio, ĉu ĝin sekvas unu, aŭ pluraj konsonantoj.

a. Se ĝin sekvas *pluraj konsonantoj*, ĉi tiuj mem certigas la longecon de la silabo, la vokalo do estas mallonge prononcata (ardo, esti, inda, ondo, urĝa ; bullo, brutto, finno, regatto).

b. Se ĝin sekvas *unu konsonanto*, aŭ *vokalo*, la akcenta vokalo devas mem certigi la longecon de la silabo, ĝi do estas longe, tirate prononcata (bāti, véra, víro, parólo, múro ; balái, kréi kríi, heróa, enúa ; búlo, brúto, fino, regáto).

Escepto : La dusilabaj vortoj de la Tabelo (tio, **kia**, iu ktp.), la dusilabaj pronomoj (mia, via, ili, oni) kaj prepozicioj (super apud) kaj *unu* estas *duonakcentaj*, t. e. ilia akcenta vokalo estas *iom pli laŭta*, sed *mallonga*. Nur en la poezio ili fariĝas longaj, se ili estas forte akcentitaj per la ritmo, aŭ ili estas rimvortoj.

4. La unusilabaj vortoj estas senakcentaj, aŭ duonakcentaj (se ili havas akcenton *sencan*).

Escepto : *Ve* estas longa. *Ho* memstare (ekz. : hó, mi bedaŭras) estas longa, sed, se ĝi signas vokativon (ho patro), ĝi estas mallonga. Krome longiĝas la vokalo de la unusilabaj vortoj, se ili estas rimvortoj.

Jen la prononcreguloj, kiuj kun plej proksima fideleco difinas la okcidenteŭropan elparolon de Esperanto. Kaj laŭ mia opinio, ili plene konvenas al sonstrukturo de la lingvo. Ilia apliko, el la buŝo de bona parolanto, donas tre elegantan kaj nuancriĉan efekton. La alterno de la senakcentaj, duonakcentaj kaj longaj akcentaj vokaloj donas al la lingvo agrablan ondadon, tute similan al la ĉarma muziko de la itala lingvo. La ripozoj sur la akcentaj vokaloj bonvene malrapidigas la parolfluon.

Kaj per ĝi oni bone povas distingi la vortojn kun duoblaj konsonantoj (brutto kaj bruto).

Krome per ĝi oni povas klarigi kaj pravigi kelkajn nepre necesajn ritmajn licencojn kaj adapti nian lingvon ankaŭ al la klasika metriko de la greka-latina poezio.

Pri la Esperanta ritmo

La Esperanta metriko, fiksita praktike de Zamenhof, severe tenas sin al la regula alterno de akcentaj kaj senakcentaj silaboj. Ĝi do konformas al la striktaj germanaj, anglaj kaj rusaj ritmoreguloj, laŭ kiuj rigida skemo fiksas la lokon de ĉiu akcenta kaj senakcenta silabo. Laŭ la maniero de ilia alterno ni distingas skemojn *ascendajn*

jambo : o—
kaj skemojn *descendajn* :

anapesto : oo—

trokeo : —o

daktilo : —oo

(— signas akcentan, o signas senakcentan silabon.)

La klasikan Esperantan metrikon do karakterizas, ke la versoj havas difinitan marŝmanieron, aŭ leviĝan (jambo, anapesto), aŭ malleviĝan (trokeo, daktilo). Ĉiu silabo en la verso, laŭ la loko, kiun ĝi okupas, devas esti aŭ akcenta, aŭ senakcenta.

Tamen, de ĉi tiu severa regulo oni trovas kelkajn diverĝojn.

Ritma akcento. Teoria akcento.

Multfoje oni renkontas en akcenta loko silabon senakcentan : unusilaban vorton, aŭ senakcentan silabon de pli ol dusilaba vorto. Ekzemple :

Per flugiloj *de* facila vento... (Zamenhof)

Li malsanigis la militistaron... (Kofman)

En la supraj ekzemploj la vorteto *de*, kaj la gramatike senakcentaj silaboj de la vortoj *malsanigis* kaj *militistaron* ricevas la akcenton nur de la ritma pulsado. Precipe la dua ekzemplo estas interesa. Ĝi estas propre parto el heksametro, do ĝia skando devas esti :

Li malsanigis la militistaron...

sed oni povas ĝin skandi ankaŭ laŭ la jamba ritmo :

Li malsanigis la militistaron...

Do, en ĉi tiuj kaj similaj okazoj ni havas inter la gramatikaj akcentoj ankaŭ akcentojn *ritmajn*, naskitajn nur de la ritma pulsado.

Ĉi tiu ritma pulsado estas tre forta en la *triopaj* ritmoj (daktilo kaj anapesto), tie ĉi do la ritma akcento forte validiĝas.

Male, en la duopaj ritmoj (trokeo kaj jambo), la ritma akcento estas multe pli malforta, tiel ke ĝi preskaŭ tute forviŝiĝas. Dum skandado oni ja nepre sentigas ĝin, sed dum deklamado oni ĝin transglitas same kiel en prozo. Do la supran version oni deklamas en jamba skemo jene :

Li malsanigis la militistaron

Eventuale sur la vorteton *la* oni metas tre malfortan akcenteton, sed la silaboj *militis-* restas nepre senakcentaj. La akcenton sur *lit-* oni do povas nomi ankaŭ *akcento teoria*.

Malgraŭ la opinioj de *Parisot* kaj *Waringhien*, mi, laŭ miaj spertoj, devas insisti pri tio, ke la forviŝiĝo de ĉi tiuj teoriaj akcentoj ekzistas. Kaj tio eĉ estas tre bonvena. La triopaj ritmoj prezentas malpli enuan ondadon, sed la duopaj ritmoj, kun la senĉesa alterno de unu akcenta kaj unu senakcenta silabo, fariĝus tede sekaj, se la teoriaj akcentoj ne ebligus agrablan ripozon, interrompante la monotonan tiktakadon de la skemo. Aliparte, la forviŝiĝo de la ritmo

ĉe la teoriaj akcentoj komprenebligas la ekziston de la poste pritraktota *ŝvebo*. Kaj krome, ilia ekzisto, trarompanta la nepran kaj senĉesan tiktakadon de la *ĉuopa* ritmo, klarigas ankaŭ, kial oni estas malpli ĝenata de certaj (poste pritraktotaj) ritmaj licencoj en la *ĉuopa* ritmo, dum en la *fortpulsaj* triopaj ritmoj ĉia licenco estas nepre kondamnita.

Akcentperdo.

Kelkfoje okazas, ke en la loko de mallonga silabo oni renkontas silabon *gramatike* longan (akcentan). Ĉi okaze la akcento de ĉi tiu silabo perdiĝas, ĝi estas kvazaŭ transdonita al la apude staranta akcenta silabo. En triopaj ritmoj (daktilo kaj anapesto) tio estas senduba. Ekzemple :

La kamp' estas larĝa kaj rekta la vojo...
(Zamenhof)

En nord' unu pino en solo... (Zamenhof)

La kursive presitaj silaboj en la supraj versoj senakcentiĝas, ĉar ili senpere sekvas akcentan silabon. Tiaj senakcentigeblaj silaboj (enklitikoj) estas plejparte tiuj, kiujn supre (Esperanta Elparolo) mi nomis *duonakcentaj*.

Sama akcentperdo povas okazi ankaŭ en la komenco de anapestaj versoj. Ekzemple :

Tiel kantis la parkoj... (Zamenhof)

Tiam ankaŭ Oresto... (Zamenhof)

Kelkfoje, sed multe pli malofte, oni trovas ĉe Zamenhof ankaŭ la akcentperdon de plenakcentaj silaboj. Ekzemple :

Al *Vi*, granda *fonto* de *amo* kaj *vivo*...

Ŝipet' iras *sur* la *rivero* ...

En ĉi tiuj versoj *granda* kaj *iras* prezentas po

du mallongajn silabojn, kvankam la unua silabo de ili ambaŭ estas akcenta.

Sed la lastmanierajn akcentperdojn Zamenhof uzis treege malofte, vere nur en ekstrema neceso, do evidente li rigardis ilin eble pardoneblaj, sed pli malpli pekaj licencoj. Ili do estas laŭeble evitindaj.

Ritmaj licencoj.

Kiel mi supre diris, en la duopaj ritmoj ekzistas kelkaj ritmaj licencoj, kiuj trarompas la severan skemon.

Kvar tiajn diverĝojn oni trovas :

1. *Komenca ĥorjambo*. Anstataŭ la du komencaj jamboj staras la jena ĥorjamba piedo : —oo—.

Ĉi tiun ritman permeson nepre postulas tiu cirkonstanco, ke en Esperanto ĉiuj demandaj kaj rilataj pronomoj estas dusilabaj, kaj oni ne povas trudi al lingvo skemon, uzatan en longaj verkoj, kiu nebligas, ke ĉi tiuj pronomoj staru en sia *natura* loko, en la komenco de verso, en la komenco de frazo. Elektante el la du eblaĵoj : obei al la skemo, aŭ obei al la *natura* vortsekvo, oni nepre devas voĉdoni por la lasta. Kaj tion faris ankaŭ Zamenhof, dirante :

Kiel diino al pastrino sia...

Aliparte, se oni permesas ĉi tiun licencon ĉe la pronomoj, neeviteble sekvas ankaŭ ĝia apliko ĉe aliaj vortoj. Ekzemple :

Lang' de saĝulo, man' de militisto ... (Zamenhof)

Signo de kor' sovaĝa kaj senbrida ... (Zamenhof)

La diverĝo, ĉar ĝi estas en la komenco de verso, kaj sekve aliigas nur solan piedon, apenaŭ konfuzas la irmanieron de la verso. Krome, ĉi tiu ĥorjambo ja ne estas tute fremda al la jamba skemo, ĉar ekzemple en la kvinjambo, se al ĝi kroĉiĝas ankaŭ plia

duonpiedo (hendekasilabo), ja ekzistas tia ĥorjambo inter la fino de la verso kaj la komenco de la verso sekva. En la versoj :

Kaj Lucifer, silentas vi memfide,
Ne trovas vorton vi por mia laŭdo...

jen estas la ĥorjambo ĉe la vortoj : *memfide, ne trovas*. Do ĉe la komenca ĥorjambo okazas sole la forŝoviĝo de la interversa ĥorjambo, je unu vers-piedo.

Oni do trankvile povas deklari, ke *la komenca ĥorjambo estas rajta licenco*.

2. *Svebo*. Ĝi estiĝas, se per apostrofado de substantivo apudiĝas akcenta silabo kaj duonakcenta silabo. Ĉi okaze la duonakcenta silabo transdonas sian akcenton al la antaŭa akcenta silabo, kaj ĝi mem fariĝas tute senakcenta. Ekzemple (Zamenhof).

Sen lim' *estas la* faro, kiun volus...

En la ĉi supra verso la kursivaj silaboj ne havas akcenton, ĉar la silabo *es-* transdonis sian akcenton, la ceteraj silaboj estas gramatike senakcentaj. Li ritmo do dum unu tuta piedo paŭzas, *ŝvebas*.

Oni povas diskuti pri tio, ĉu la ritmo tute ŝvebas ĉiokaze, aŭ la ritma pulso donas neeviteble iom da akcento al la cetera senakcenta silabo *-tas*, estas certe, ke ĉi tiu licenco ekzistas ; *duonakcentaj silaboj, kaj la unua silabo de estas* povas senakcentiĝi, se ili senpere sekvas akcentan silabon.

Laŭ mia opinio tiu ĉi *ŝvebo* estas tute konforma al la forviŝiĝo de la duopa ritma skemo ĉe la t. n. *teoriaj akcentoj*. Ambaŭokaze la ritmo paŭzas dum unu tuta piedo.

3. *Stumblo*. Mi nomas *stumblo* (faleto) *de ritmo*, la anstataŭigon de tri jamboj per du anapestoj. Ekzemple :

La koro *sangis en granda doloro...*

Same, en trokea ritmo, la anstataŭigon de um tri trokeoj per du jamboj. Ekzemple :

Sidas eĉ nun superporde *sur pala Pallas-statu'..*

Ĉi tiu licenco jam estas multe malpli konsilinda, ĉar ĝi, troviĝante en la mezo de la verso, estas forte sentebla. Sed, ĉar ĝi ne ŝanĝas la (ascendan aŭ descendan) karakteron de la verso, ĝin eble oni povas uzi malofte, en okazo de granda neceso, proksimiĝante per tio al la pli libera itala metriko.

4. *Karambolo*. Tiel mi nomas la senperan sinsekvon de du akcentoj. Ekzemple :

Mi amas vin tutkore, knabin' *kara...*

En ĉi tiu verso *kara* ne povas perdi sian akcenton, ĉar ne nur ĝi ne estas duonakcenta vorto, sed krome ĝi estas eĉ rimvorto, kaj la rimo pliakcentigas eĉ la duonakcentajn silabojn. Do nepre staras du akcentoj sinsekve, tiel ke oni kvazaŭ devas halti post la unua akcento, por prepari sin por la dua. Krom ĉi tiu ĝena halto, tre malbone efikas, ke la karaktero de la verso ŝanĝiĝas, la jamba marŝo (knabin') ŝanĝiĝas je trokea marŝo (*kara*).

Pro tiu ĉi du kaŭzoj (deviga abrupta halto inter la du sinsekvaj akcentoj ; ŝanĝo de la irmaniero de la verso) la karambolo estas nepre malbona. Ĝia sola escepta uzebleco ekzistas en tiuj okazoj, kiam oni intence volas fari abruptan efekton, kaj kvazaŭ devigi la deklamanton je paŭzo inter la du vortoj. Ekzemple :

Vent', vent' ! La ŝip' indignas, eskapas ĝi senbride..

Precipe en la komenco de versoj estas allasebla tia karambolo, ĉar tiamaniere ĝi ne aliĝas la irmanieron de la verso. Krome, por akceli la supre menciitan abruptan efekton, oni ja povas loki karambolojn ankaŭ en la mezo de la versoj, sed tiaokaze, por ne

ŝangi la irmanieron de la verso, oni devas meti du karambolojn unu apud la alia. Ekzemple :

Stel', rab', murd', ĉiuj krimoj de l' infero...

Skemo : — — / — — / o — / o — / o — / o

L' inferon voki ! *Fi ! Halt' ! mia koro...*

(Zamenhof)

Skemo : o — / o — / o — / — — / o — / o

Kiel ni vidas, en ĉi tiuj ekzemploj la abrupteco de la parolo bone akordiĝas kun la abrupteco de la ritmo kaj per la estiĝintaj spondeoj (— —) la irmaniero restas konservita.

Pri la adapto de la diversaj ritmaj skemoj al la espa metriko mi nun ne intencas paroli, tio ja ampleksus tutan apartan libron. Mi volis fiksi nur la kvar diverĝojn de la klasika ritma skemo, akcenti la nepran necescon de la komenca ĥorjambo, la rajtecon de la ŝvebo, ĝian klarigon per la analogio de la teoriaj akcentoj, kaj montri la malbonecon de tiuj karamboloj, kiuj ŝanĝas la irmanieron de la verso.

Amfibraka verso.

La stumblo, laŭ la klasika metriko propre tute ne estas permesata. Tamen, oni ofte trovas ĝin, precipe ĉe latinidaj esperantistoj. Ĝian skemon, donitan de mi supre (anstataŭigo de tri jamboj per du anapestoj), oni povas doni ankaŭ alimaniere, per la tiel nomita amfibrako (o—o).

Laŭ ĉi tio la jamba skemo konsistas el komenca amfibrako kaj trokeoj :

o—o / —o / —o / —o / —o

Nun, la amfibrakon oni povas libere ŝovi tien kaj ĉi tien en la verso :

—o/o—o/—o/—o/—o (komenca ĥorjambo)

—o/—o/o—o/—o/—o (stumblo)

—o/—o/—o/o—o/—o (stumblo)

Laŭ ĉi tiu versfarado do tute forviŝigas la diferenco inter la leviĝaj kaj malleviĝaj skemoj ; la stumbloj, kiuj, laŭ mia ĝisnuna opinio, devas esti tre malofte uzataj, aperas en ĉiu verso. Oni do alvenas al la pli libera franca-itala-hispana-pola metriko.

Ĉu la evoluo de la espa metriko iam prenos ĉi tiun direkton, aŭ plue tenos sin al la ĝermana metriko kun la supraj licencoj, tion oni apenaŭ povas antaŭdiri. Verŝajne ekzistos ambaŭ metrikoj unu apud la alia. Same, kiel en la tradukpoezio de *Grabowski*, kiu en la *Parnaso de Popoloj* plej ofte uzis la striktan ĝermanan metrikon, sed en kelkaj elpolaj tradukoj kaj en la Sinjoro Tadeo uzis skemon amfibrakan, liberan, ligitan sole per severa cezuro :

Litvo, patrujo mia/ simila al sano,
Vian grandan valoron/ ekkonas litvano
Vin perdinte. Belecon/ vian mi admiras,
Vidas ĝin kaj priskribas/ ĉar mi hejmsopiras.

Sed mi volas atentigi pri io. La tro forta, senĉesa akcentado de ĉiu antaŭlasta silabo tiel fortege evidencigas la neregulecon de ĉi tiu ritma skemo, ke ĝi fariĝas tute netolerebla. Ĝi estas ebla nur, se oni lasas senakcentaj la duonakcentajn kaj gramatike senakcentajn silabojn, eĉ se ili havas ritman akcenton, kaj tiamaniere oni malpliigas la akcentojn tiel, ke ekzemple en la supra tradukaĵo de *Grabowski* restu antaŭ kaj post la cezuro nur po du fortaj akcentoj, jene :

Litvo, mia patrujo, /simila al sano,
Vian grandan valoron/ ekkonas litvano

Tiamaniere oni apenaŭ sentas, ke la loko de unu el la po du akcentoj ŝanĝiĝas. (La alia akcento estas ĉiam en la lasta piedo antaŭ la cezuro kaj en la lasta piedo de la verso.)

Cetere, estas certe, ke Esperanto estas tute taŭga al ambaŭ ritmosistemoj.

Klasika metriko en Esperanto

La klasika metriko havas kvin ĉefajn piedojn ritmajn : la *jambon* (mallonga-longa), la *trokeon* (longa-mallonga), la *spondeon* (longa-longa), la *anapeston* (mallonga-mallonga-longa) kaj la *daktilon* (longa-mallonga-mallonga).

La esp-a metriko prenas por longa silabo akcentan, por mallonga silabo senakcentan, aŭ duonakcentan silabon (ĉi lastaj, precipe, se ili senpere sekvas akcentan silabon, povas tute senakcentiĝi, ekzemple en : *ĉe l' font' apud arbo* — la unua silabo de *apud* tute perdas sian akcenton, kvazaŭ transdonante ĝin al la antaŭa akcenta silabo).

Tiamaniere oni povas formi en Esperanto

jambon : *riĉul'* ;

trokeon : *bona, granda* ;

anapeston : *batalil'* ;

daktilon : *amu min*.

Sed, ĉar du akcentaj silaboj ne povas stari sinsekve, en Esp-o la spondeo (longa-longa) ne estas ebla.

Ĉi tiu neebleco de la spondeo plej ĝena estas ĉe la heksametro.

La heksametro, kiel konate, konsistas el ses piedoj, el kiuj la lasta estas nepre spondeo (aŭ trokeo),

la antaŭlasta estas nepre daktilo, la ceteraj estas laŭplaĉe daktiloj, aŭ spondeoj. Guste tiu ĉi alterno de spondeaj kaj daktilaj piedoj donas al la heksametro grandan variecon, de la preskaŭa daktileco :

— — /oo— /oo— /oo— /oo— /oo—

ĝis la preskaŭa spondeeco :

— — / — — / — — / — — / —oo/ — —

En Esp-o, kiel ni diris, spondeo ne ekzistas, do sole la daktila heksametro estas ebla. Nu, la nura daktileco eble estas akceptebla en pli mallongaj poemoj, sed en longaj versaj verkoj (kaj la heksametro ja estas formo de tre longaj poemoj), ĝi fariĝas tede monotona. Ekzemple, la cetere tre bonan tradukon de *Hermano kaj Dorotea* ege malagrabiligas la seninterrompa daktileco per sia monotona ondado.

Aliparte, se oni prenas senelekte ĉiam senakcentan silabon por uzi ĝin kiel duan silabon de spondeo, la spondeo propre iĝas trokeo, kaj per tio la verso fariĝas iel malcerta, la piedo ne estas bone apogita, la heksametro ŝajnas lami.

Kiel oni povus fari esp-ajn spondeojn ? Ĉu tio estas ebla iamaniere ?

Mi proponas la jenan solvon :

La esp-ajn silabojn oni povas klasi jene :

2. silaboj *akraj*, *malpezaj*. Tiaj estas la antaŭlasta silabo de la dusilabaj posedaj pronomoj (mia, kies *pezecon* donas aŭ la pluraj konsonantoj postvokalaj, aŭ, se tiaj mankas, la tira elparolo de la akcenta vokalo. Ekzemple : *granda*, *entuziasmo* ; *kóro*, *amáso*.

2. silaboj *akraj*, *malpezej*. Tiaj estas la antaŭlasta silabo de la dusilabaj posedaj pronomoj (mia, via), la dusilabaj Tabelo-vortoj (kia, tia, iu), krome : unu, ili, super, apud, super. Ili estas prononcataj pli laŭte (akre), sed *malpeze*, sentire.

3. silaboj *malakraj*, *pezaj*. Tiaj estas ĉiuj silaboj, kiuj estas senakcentaj (malakraj), kaj kies vokalon

sekvas (en la vorto mem, aŭ ankaŭ en la sekva vorto) pli ol unu silabo. Ekzemple : entuziasmo, homfrato, sendito, grandaj domoj, en domo, sen koro. Krome la finaĵo *aŭ*.

4. silaboj *malakraj*, *malpezaj*. Tiaj estas la senakcentaj silaboj de plursilabaj vortoj kaj la unusilabaj vortoj, se ilin sekvas vokalo, aŭ nur unu konsonanto. Ekzemple : batado, entuziasmo, sen ago, pro Dio, pri tio.

El ĉi tiuj kvar kategorioj la unua (silabo akra peza) anstataŭas ĉiam *longan* silabon, la lasta (silabo malakra malpeza) ĉiam *mallongan* silabon. La du mezaj kategorioj (akra malpeza kaj malakra peza) estas silaboj *hibridaj*, do povas anstataŭi jen *longan*, jen *mallongan* silabon.

Ekzemple en la sekva moka epigramo de la Greka Antologio :

Vir', kiu estis jam edz' kaj serĉas edzinon denove,
Estas ŝiprompul', ree iranta al mar'.

la *i* en *kia* (akra malpeza), la *is* en *estis* (malakra peza), la *edz* kaj *non* en *edzinon* (malakraj pezaj) estas hibridaj silaboj, kiujn oni uzas tie ĉi kiel mallongajn. La silabo *kaj* antaŭ *serĉas* (malakra peza) *tas* en *estas* (malakra peza), *romp'* en *ŝiprompul'* (malakra peza) estas hibridaj silaboj, uzataj tie ĉi kiel longaj.

Kompreneble, oni devas atenti, ke la verso glitu, do oni ne uzu tiajn pezajn silabojn, kiel silabojn mallongajn, en kiuj la vokalon sekvas tro multaj konsonantoj, ĉar tiel la daktilo perdas sian facilan ŝvebon. La idealo estu tiu heksametro, en kiu ĉiuj mallongaj silaboj estas malakraj malpezaj, aŭ almenaŭ akraj malpezaj. Sed mi devas konfesi, ke ĉi tiu idealo apenaŭ estas efektivebla. Tre bone saltantan hek-

sameton oni ricevas, se oni zorgas almenaŭ pri tio ke la unua mallonga silabo de la daktilo estu malpeza silabo, aŭ almenaŭ unu el la du mallongaj silaboj estu malpeza.

Laŭ la ĉi supraj principoj oni povas atingi en Esp-o la saman variecon, kiel en la greka, aŭ latina heksametro. Ni vidu kelkajn ekzemplojn :

Pleja daktileco :

Ho, senindulga maljun', ho vi sulkoj, alvenu
rapide...

Spondeo meze :

Sur la deklivo de *mont'* ekŝalmas la gaja
paŝtisto...

Du spondeoj :

Ŝipoj *eknaĝas* jam tra la *ondoj* bele fluantaj...

Pleja spondeeco :

Jen sol sola sav', ĝin devas nun vi akiri...

Krome mi atentigas pri grava apartaĵo de la heksametro, ne nepre, sed neglektebla nur escepte, tio estas la *cezuro post la tria duonpiedo*. El la supraj ekzemploj nenie mankas ĉi tiu cezuro ; ĝi donas *spinon* al la heksametro, distingante ĝin de la amfibiraka verso. Kaj precipe en distikoj ĝi estas grava, ĉar ankaŭ la cezuro de la pentametro estas en la sama loko.

Certe, per la eksplikitaj postulatoj la heksametro fariĝas iom pli malfacila ol ĝis nun, sed rekompence ĝi gajnas fiksan spinon kaj agrablan kaj interesan variecon. La ĝisnuna heksametro estis tre facila (Esp-o, oni povas diri, estas daktila lingvo, oni povas paroli post iom da ekzerco horojn longe en daktila ritmo), sed ĝi estis disflua kaj monotona.

Por fini, mi metu tien ĉi belan distikan epigramon de *Kallimachos* el la Greka Antologio :

Kiel ĉasist' en arbar piedsignojn kaj vente kurantan
Ombron de kapreolet' pelas tra akvo kaj neĝ',
Kaj li ne lacas, sed se li aŭdus: »Jen la ĉasaĵo
Antaŭ vi sen mov'« — eĉ ne rigardus li ĝin :
Same ja estas la am' : persekutas la fuĝe kurantan,
Turnas de tio sin for, kio proponas sin mem.

La mezepoka Esperanto

Vere, estas granda neglektemo de mia flanko, ke mi ankoraŭ ne prezentis al vi mian amikon C. E. R. Bumy. Ĉar li estas tre originala homo, kun siaj eternaj problemoj, eterna senkombeco, eternaj tri libroj sub la brako. Kio estas lia profesio? Mistero. Eĉ tion mi ne kuraĝas aserti decide, ke li manĝas, kiel la ordinaraĵoj homoj. Eble el antikvaj kaj mezepokaj poemoj li elsuĉas por si ian ambrozion. Eble pro tia eteria nutraĵo li estas tiel diafane malgrasa.

Li estas espisto. Mi varbis lin jam antaŭ longe. Tuj li ekinteresiĝis kaj eksprese li ellernis la lingvon, laŭ sia maniero: li lernis la gramatikon, poste la vortaron, poste li ellegis mian bibliotekon. Post ok semajnoj li jam liveris al mi — tute pretan reformprojekton. Mi priridis lin, klarigis, ke Esperanto estas vivanta lingvo, havas popolon, oni ne plu povas ĝin tondi kaj glui laŭplaĉe. Mi demandis, ĉu li kuraĝus reformi vivantan nacian lingvon, ekzemple la hungaran?

— Kial ne? — li respondis.

— Kaj ĉu vi sukcesus akceptigi vian reformon?

— Eh! Ĉu tio gravas? — li mansvingis, tute malŝate pri mia »naŭza realismo«.

Tamen, ĝis nun li ne liveris al mi la grandan reformon de la hungara lingvo, kaj enterigis ankaŭ

sian Esperantan reformon. Li komencis labori literature. Kompreneble dum tio li inventis kelkajn aferojn. Mi menciuj nur la prepozicion *graŭ*, kiel »senmaligon« de *malgraŭ*, kaj la adjektivon *ica*, kiel »senmaligon« de *malica*. Liaj lingvaj konsiloj ĉiam estis frapantaj, vere kapfrapantaj. Foje oni diskutis pri la tro longaj vortoj : estinteco, estanteco, estonteco. Iu insistis pri la formoj : pasumo, nuntempo, futuro, alia riskis : itempo, atempo, otempo.

— Azenoj vi estas ! — interkriis nia C. E. R. Bumy. — Jen la sole ĝusta solvo : *timpo*, *tampo*, *tompo* !

Jes, tia li estas. Ĉiam li havas geniajn ideojn, kaj ĉiam li malprosperas kun ili. Sed tio ne interesas lin. Li ja ne estas »abomena realisto«.

Lastatempe li ŝajne elreviĝis pri Esperanto, ne sufiĉe taŭga por naski problemojn. Mi longe ne vidis lin en la grupo. Hazarde ni renkontiĝis sur la strato.

— Nu ? — mi demandis riproĉe. — Kial vi perdiĝis ?

— Mi estas tro okupita.

— Problemo ?

— Jes. Sed nun ne literatura. Mi laboras pri teknika problemoj.

— Teknika problemoj ?

— Jes. Sed tio ne interesas vin, vi, versvermo !

— Eĉ, tre interesas min, vi, realisto ! Rakontu do !

— Nu, mi provos al vi komprenigi la aferon. En la tuta mondo, vi scias, estas granda ekonomia krizo. Kial ? Ĉar oni ne povas tiom konsumi, kiom oni produktas. Kial ? Ĉar oni produktas per maŝinoj kaj konsumas per homfortoj. Jen la granda maledaleco ! Kompreneble homo ne povas konkuri kun maŝino, sekvas troproduktado, laborĉesigo, senlabor-eco. Ĉiu homo scias tion, kaj, ho, la azenoj, tamen

ne trovis la solvon. Mi devis alveni rekte el la paĝoj de mezepoka fablolibro por solvi la problemon. Kvankam ĝi estas ja ovo de Kolumbo. Maŝinon oni devas meti kontraŭ maŝino. Mi jam projektis preskaŭ komplete.

— Kion ?

— Homo ! eĉ nun vi ne divenas ? La *konsum-maŝinon* !

— Ko... ko... kons...

— Kial vi balbutaĉas ? Jes, la konsum-maŝinon. Oni simple ekirigos mian maŝinon kaj ĝi konsumos. Ho, kiel ĝi konsumos ! Per centoj kaj miloj da ĉevalpovoj ĝi konsumos ! La magazenoj malpleniĝos fabelrapide ! Oni ree devos produkti, la fabrikoj ree eklaboros, la senlaboreco ĉesos. Mia maŝino forblivos la krizon ! La mondo estas savita !

— Mi gratulas ! Kara Bumy ! Mi gratulas ! — mi kriis entuziasme premante lian manon. — Vi estas geniulo ! Ĉiam mi sciis tion !

— Mi dankas. — Li diris memfide. — Nu, kaj kion vi faras ? Ĉu vi ankoraŭ esperantas ?

— Jes. — Mi diris tre modeste. — Ekiros ree Literatura Mondo.

— Eh ! — Li mansvingis malŝate.

— Kial eh ? Vi ofendas min per ĉi tiu eh.

— Kion fari ? Mi devas diri eh. Kion komenci per lingvo, kiu ne havas arkaikajn formojn. Mi tradukis mezepokan fablon kaj ĝi fariĝis moderna, kvazaŭ gazetartikolo. Al la diablo tiun lingvon, en kiu oni ne povas traduki la Groteskajn Rakontojn de Balzac, ne farante el ili enuajn modernajn trivialajn klaĉaĵojn.

— Sed, kara Bumy ! — mi diris. — Esperanto estas juna lingvo ! Ankaŭ Dante apenaŭ estus povinta siatempe uzi arkaikajn formojn. Sed la lingvo evoluas, iom post iom kelkaj ĝiaj elementoj eluziĝos, elmodiĝos, kaj tiam...

— Dankon ! — li interrompis krude. — Ĉu mi

atendu kelkajn centjarojn? Mi ne havas tiom da tempo. Cetere — mi tute ne havas tempon. Adiaŭ.

— Haltu! — mi postkriis lin malespere. Li haltis.

— Nu?

— Kara Bumy! — mi subpremis rideton. — Se tiel mankas al vi la arkaika Esperanto, faru ĝin mem.

— Ĉu mi? Kiel? — kaj la brilo de »problemo« ekfajreris en liaj okuloj.

— Nu, simple. Esperanto estas, ĉu ne, ĉefe latinida lingvo. La arkaikaj formoj de la latinidaj lingvoj propre estas kvazaŭ transiraj formoj inter la nuna lingvo kaj la pura latino. Elcerbumu do tiajn transirajn formojn ankaŭ por Esperanto kaj vi havos, kion vi bezonas.

— Jen la unua saĝa vorto, kiun mi aŭdas de vi! — li kriis kaj sensalute eksvingis siajn longajn piedojn. La manoj en la poŝoj, la kapo profunde klinita, kvazaŭ sub la ŝarĝo de la »problemo«, li velis for.

Post kelkaj semajnoj subite malfermiĝas mia ĉambropordo kaj tempeste enflugas C. E. R. Bumy.

— Jen — li diris sen enkonduko kaj ĵetis sur mian skribotablon dikan kajeron. Mi rigardis.

Grammaticu kaj vocabularu antiques mundales lingues Sperantu.

— Jen! — li ripetis triumfe. — Vi povas ĝin eldoni. Oni povas el ĝi lerni la Esperanton de la mezepoko, la Esperanton de la Rolandkanto, de Vogelweide, de Francisko de Assisi. Vi estis mizere senpovaj, malriĉaj, nun vi riĉiĝis. Esperanto estas savita!

— Ne koleru, kara Bumy, — mi diris, — sed tio ne estus ĝusta sinsekvo: fari antaŭe arkaikan grammatikon, kaj poste serĉi al ĝi arkaikajn tekstojn. Trovu

kelkajn tiajn fosilajn tekstojn kaj poste komentariu ilin per tiu ĉi grandioza verko.

— Ho, ĉi tiun pretekston mi antaŭvidis! — li triumfis. — Jen, kion vi volas! Eterna gloro de Hungarlando estas, ke ĉi tie, en la antikva monaĥejo de Utop, mi trovis ĉi tiun pergamenon, devenintan el la fino de la dekdua jarcento. Sur ĝi vi trovos en la mezepoka Esperanto la laŭvortan tekston de la Primorta Prediko; la unua prilingva dokumento de la hungara lingvo. Legu kaj miru!

Mi legis. Sur flaviginta pergameno, kun belaj ruĝaj inicialoj, kun la splitaj gotikaj literoj de la mezepokaj manuskriptoj, tie antikvis la teksto. Pene mi deĉifris:

Widats wui, confratruy, quio nui estams? Ya pulvu kaj cindru estams. En quiomt graceu principe Diu creays nuialn praun Adamun kaj donnays ad llui paradisun quiele domun. Kay ell omna fructuy trovibiluy en paradisu dirays al llui wiwir. Solel interd rays al llui unes arbores fructun. Sed Llui dirays al llui, pro quio llui ne mandduz. Ya, quiudie tui manddors ell fructu, tui mortors mortes mortun. Avdays suialn mortun de creatoru Diu, sed oblivays. Llui cedays diaboles tentun kaj manddays ell fructu kay en fructu manddays mortun. Colerays Diu kay lluin jectays ad istiunci laborosun mondun. Kay llui fiays nestu mortes infernesquay. Kay totu llualgentu. Quiuy estas istiuy? Nui estams, quiele powats wui widir per wuialy ocululuy. Ya nec un homu povas ewitir istiun cavun. Ya nui chiuy estams irantuy ad iddi. Nuy pregiumz pro favoru siniores Diu por istiu

animu, que Llui habuz al llui indulgun kaj misercordun kaj pardonnuz al llui llualyn culpuyn. Kaj nui pregiumz sanctan mullyerun Maria kaj beatun archangielun Michaelu kaj chiomt angielun, que illi pregiuz por llui. Kay pregiumz sanctun siniorun Petru, ad quiu donnatis potentu kay ligir kay solwir, que llui solwuz chiomt llualyn culpuyn. Kaj nui pregiumz chiomt sanctuyn, que illi estuz al llui auxilu coram nuial sinioru Diu. Que Diu pro illialy pregiuy pardonnuz llualyn culpuyn kay libericuz lluin de diaboles persecutuy kaj infernes turmentuy. Kaj Llui conducuz lluin ad paradisaln tranquilun kay donnuz al llui voion ad cielun kay partun ell chiomt bonu. Kay clamutz tri foiuyn : Kyrie eleison !

Amatuy fratrui ! Pregiumz por animu isties povres homnes, quiun Sinioru ell falses mundes carceru hodie salvays, quies corpun hodie nui entericams. Que Sinioru lluin locuz cum favoru en sinun de Abrahamu, Iacobu kaj Isacu, que en ultimo jugiu Llui rewiwicz lluin por commandir lluin dextre inter Llualy sanctuy kay electituy. Kay anch wuin. Clamate ter : Kyrie eleison !

— Nu ? — li demandays, pardonon, demandis, kiam mi estis fininta la legon.

— Mi gratulas ! — mi kriis entuziasme. — Tiu ĉi malkovro certe tute konfuzos ĉiujn esperantologojn, kiuj kredis ĝis nun, ke Esperanto estas la verko de Zamenhof. Jen, la embrio de la lingvo ekzistis jam en la mezepoko kaj kaŝe ĝi evoluis sur ĝis nun ne-trovitaj pergamenoj. Ĉu vi ne serĉos ilin ? Ĉu vi ne

volas trovi ekzemple la lingvon de la dekkvina jarcento?

— Eble mi trovos ĝin, — li diris reve. — Kaj tiam mi eklaboros! Mi tradukos en la trovotan lingvon la tutan *Rabelais* kaj la tri dekojn da Groteskaj Rakontoj de *Balzac*. Ĉu ne, Literatura Mondo eldonos la librojn?

— Ne! — mi diris tute decide.



E N H A V O

ESPERANTA VORTFARADO	7
LA EVOLUO DE NIA POEZIA LINGVO	44
SENDEMANDAJ RESPONDOJ	70
La difina artikolo : 70. Iu kaj ia : 74. Kvazaŭ : 75. Duoblaj konsonantoj : 76. Konjunktivo : 77. Iom pri la vortsekvo : 79. Virinaj nomoj : 81. Ata kaj ita : 83. Kun- metitaj verbo-formoj : 84. Edziĝi, enamiĝi : 86. Mirinda : 87. Kutimi : 87. De, depost, ekde ktp. : 88. Ci : 90.	
LA ESPERANTA RIMO	92
ESPERANTA ELPAROLO	116
PRI LA ESPERANTA RITMO	122
KLASIKA RITMO EN ESPERANTO	131
LA MEZEPOKA ESPERANTO	136

KOREKTO

Pg. 132., de malsupre 11. kaj 12. linioj — legu :

1. silaboj *akraj*, *pezaj*. Tiaj estas la antaŭlastaj silaboj de la plenakcentaj plursilabaj vortoj.

ELDONAĴOJ

DE LITERATURA MONDO

JULIO BAGHY : Preter la vivo

- " " Pilgrimo,
- " " Dancu Marionetoj
- " " Migranta Plumo
- " " Viktimoj
- " " Hura !

JEAN FORGE : Mister Tot
aĉetas mil okulojn

K. KALOCSAY : Streĉita kordo
" Rimportretoj
" Lingvo, Stilo, Formo

KENELM ROBINSON :
Homarisma Laboro

BALDAŬ APEROS :

JULIO BAGHY : Infero

K. KALOCSAY : Ŝtelita Trezoro
" Hungara Antologio

F. SZILÁGYI : Modernaj Fabeloj

I. ŜIRJAEV : Esperanta-
Leksikono

SENDUBE

Ĉiuj ŝatantoj de la Esperanto-
literaturo legas aŭde la gazeton

LITERATURA MONDO

ĉar ĝi estas la **PLEJ BELA**,
PURE LITERATURA gazeto en
Esperantujo. Ĝian valoron
garantias la ĉefredaktoroj :

JULIO BAGHY

kaj

KOLOMANO KALOCSAY

kaj la regulaj kunlaborantoj,
inter ili la plej famaj esperant-
istaj originalaj verkistoj kaj
tradukistoj.

Abonprezo :

Por unu jaro P 10.—

duonjaro P 5.50

kvaronjaro P 3.—

Opa numero P 1.—

aŭ egalvaloro.

Postulu senpagan specimenon.

Postulu detalajn prezaron kaj prospekton de

LITERATURA MONDO

Bleier Vilmos, Hungarujo, Budapest, IX, Boráros-tér 6, IV
kaj de niaj reprezentantoj en la tuta mondo